

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo n-ro 15 (aprilo 2025)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Laure Patas d' Illiers, Laimundas Abromas, Yin Jiaxin, Evgeny Khvalkov, Rita Mkrtĉjan, Bardhyl Selimi, Detlef Karthaus, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Duaŭtulo, Sergei Isakov, Vejdo, Mikaelo Bronŝtejn, Yi Qiao, Marzena Wawrziczкова, Elena Popova, Rovere Emanuele, Minosun, Eto, Yi Shaomin, Puramo W Chong

AI-ilustris John Huang, karikatur-esperantigis Paula Adúriz

Enhavo

Originala prozo

Laure Patas d' Illiers: Muzikemulo.....	003
Laimundas Abromas: Kiel Nikodemo lernis Esperanton.....	005
Yin Jiaxin: Denove renkonti Flavon.....	007
Eugene Khvalkov: Neniu bezonas malbonan edzinon.....	010
Rita Mkrtĉjan: En unu neĝa tago k.a.....	014

Tradukita prozo

Iljet Aliĉka: Mallonga rakonto pri bone naskitaj homoj (trad. Bardhyl Selimi).....	016
Pearl S. Buck: Vento orienta—Vento okcidenta (2) (trad. Detlef Karthaus).....	024
Fratoj Grimm: Sep kovroj k.a. (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser)..	034
Xu Dishan: Persika Ornjo (trad. Duaŭtulo).....	039
Maksim Boĉkarev: Jaga (2) (trad. Sergei Isakov).....	045
Chiung Yao: En profunda korto (15) (trad. Vejdo).....	083

Originala poezio

Mikaelo Broŝtejn: Penseroj.....	091
Yi Qiao: Amo estas pli forta k.a.....	094
Tiberio Madonna: Sen ni k.a.....	097
Marzena Wawrzickova: Kelkaj poemoj.....	100
Erika Godó: Monatoj k.a.....	102
Vejdo: Balai la korton k.a.....	104

Tradukita poezio

Rovere Emanuele: Kiom pluvis k.a.....	111
Du Fu: Verskvaro k.a. (trad. Minosun).....	117
Han Shan: Kelkaj strofoj (trad. Eto).....	119
Liu Weijie: Najman-flago, la hejmo en mia koro k.a. (trad. Yi Shaomin)..	121

Artikolo kaj eseo

Rita Mkrtĉjan: La “Ora Jarcento” de Armena Literaturo.....	125
--	-----



John Huang, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por tri sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022, 2023 kaj 2024. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis en multaj Esperanto-agadoj en la sekvaj jardekoj.



Karikaturoj esperantigitaj de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Bildo sur la kovrilo: Dayan-turo (pagodo) en Xi'an, Ĉinio



Laure Patas d' Illiers (Francio)



Muzikemulo

"Neniel mi kapablas vivi sen muziko!" La leĝera fluta voĉo de mia onklo Sosteno sonoriletis en la salono. "Al mi muziko tiom necesas kiel aero!" Lia mano afekte me ripozis sur lia brusto, kie li supozis batas lia koro, kaj liaj okuloj rigardis ĉielen.

aŭtorino, Laure Patas d' Illiers

Mi ne respondis. Lian gurdaĵon pri muziko mi sufiĉe ofte aŭdis.

"Pardonu min, kara, la sumon petitan de vi mi ne donos. Ho, mi plene konscias ke vi estas mia nevino. Mia kara, mia ununura nevino. Neniu edzino, nek infano, do vi estas mia tuta familio. Vi heredos ĉion, kiam mi ne plu estos. Miajn artaĵojn, mian pianon, mian kolekton de muzikaj registraĵoj – ĉu mi jam diris al vi kiel unika estas mia kolekto? Ĉion ĉi vi ricevos."

Mi ĵetis nigran rigardon al la damninda kolekto.

"Kiel bedaŭrinde! Domaĝe, via fianĉo estas ĉarpentisto. Manlaboro! Materialisma, filistra, proza metio! Vere plorinde!" Lia pufa vizaĝo paŭtis pro elreviĝo. "En nian familion mi esperis ke vi allogos muzikiston. Nu, kiel bonvole mi akceptintus danciston aŭ poeton. Mi havas larĝan menson, kiel ĉiuj veraj artemuloj."

Mi ne plu eltenis liajn stultaĵojn. Mi stariĝis, ĝisis kaj revenis hejmen al Roberto. Kiu estas Roberto? Mia fianĉo, kompreneble. Por edziĝi, li deziras krei sian propran entreprenon. Por tio necesas granda investo. La sumon mi vane petis de onklo Sosteno.

Onklo Sosteno vizitis ĉiusemajne la Operejon. Iam li diris al mi la prezon de la bileto. Mi ne sciis, ke tiom multekosta bileto ekzistas. Onklo Sosteno povintus dum kelkaj monatoj deteniĝi pri Opero, ŝpari la monon kaj doni ĝin al mi. Bonkora onklo tiel agintus, ĉu ne? Tiel Roberto kaj mi opiniis. Ĉar onklo Sosteno montriĝis kruela, li meritis sian destinton.

Kiel ni murdis lin? Ni ne murdis! Roberto kaj mi ne estas murdistoj. Ni nur enfermis lin. Roberto havis ŝlosilon de la sonorilturo, ĉar li estis laboranta pri riparo

de la trabaro. Ni irigis onklon Sosteno en la sonorilejon, plej supre, ĵus sub la sonorilegoj.

Kion ni faris al li? Nenion! La polico diris ke lia korpo havis neniun vundon, sed sango estis fluinta el liaj oreloj. Nu, eble, sed ne ni suferigis lin. Ni nur forprenis la ŝtupetaron por malhelpi lian foriron.

Kio okazis? Ni enŝlosis lin sabaton. La sekvanta tago estis dimanĉo. Kiel okazas ĉiudimanĉe, la sonorilegoj sonore anoncis la mesojn. Ĵus sub la sonorilegoj la bruoj estis neeltenebla. Ne ni murdis lin, sed la sonorilegoj. Do, li mortis pro muziko. Bela morto por muzikemulo, ĉu ne?



*esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)*

Laimundas Abromas (Litovio)



Kiel Nikodemo lernis

Esperanton

Iun tagon, promenante tra la urbo, Nikodemo rimarkis sur anonctabulo la allogan afiŝon. Oni invitis al prelego pri internacia lingvo Esperanto, kio okazos ĉi sabate posttagmeze en la urba kulturpalaco. Sabate en la urba gazeto oni legis tiun saman anoncon.

aŭtoro, Laimundas Abromas

Oni ja soifas pri ĉio nova. Scivoleme Nikodemo kune kun dudeko da aliaj personoj partoprenis tiun ĉi prelegon por varbi homojn por Esperanto-kurso. Tiu prelego iugrade Nikodemon imponis, ĉar li aŭdis ion novan, pri kio li antaŭe sciis nenion.

Nikodemo kelkfoje partoprenis Esperanto-lecionojn. Instruisto multe laŭdis Esperanton, ĝian facilecon, ĝiajn valoron, kulturon, internan ideon kaj substrekiis tion per kantado kaj deklamado. La personeco de instruisto lin ne imponis. Post kvar lecionoj Nikodemo finis la kurson, sufiĉe seniluziiginta.

Foje, tio okazis post unu aŭ du jaroj, Nikodemo promenadis tra la urbo kaj preteriris surstrate du junulojn, kiuj flue interparolis en iu lingvo, nek angla, nek rusa. Unu junulo ŝajne estis el Afriko, alia el Azio. Ili alparolis lin en lingvo iam aŭdita, kaj demandis pri iu „stacio“. Ĉar ili ne eldiris la vortojn „aŭto“ kaj „buso“, sekve ili serĉis fervojstacion. Nikodemo montris la vojon direkte al fervojstacio. Adiaŭante unu el junuloj, kiu ŝajnis afrikano, donacis al Nikodemo libreton. Tio estis konversacia libreto portugala-esperanta, eldonita en Rio de Janeiro de Brazilo. Sur antaŭlasta paĝo ili skribis siajn adresojn, unu junulo estis el Brazilo, alia el Japanio. Nikodemo komprenis, ke tiuj junuloj parolis en Esperanto. Ili ne altrudis sian lingvon al li. Nikodemon denove kaptis la afero pri Esperanto. „Se tiu lingvo estas tiom facila, mi lernos ĝin kaj skribos leterojn al tiuj junuloj“, decidis Nikodemo.. Unu semajnon post tiu ĉi renkontiĝo, li jam povis esprimi kelkajn frazojn en Esperanto, kvankam ne senerare. Jes, li jam estis kaptita de la regule planita kaj

sufiĉe facile lernebla lingvo. Precipe por li, Nikodemo, memlernanta pensiulo. Esperanto facile kaptis lin. Pli forta ol reklamado estas ekzemplodona konduto.

Ses monatojn post lia memlernado, Nikodemo trapasis en la urba Esperanto-klubo la ekzamenon pri lingva kapablo kun rezulto „tre bone“. Simpatiaj geklubanoj afable akceptis Nikodemon kaj li baldaŭ fariĝis membro de urba Esperanto klubo. Li ne forgesis siajn konatulojn el Japanio kaj Brazilo kaj sendis al ili siajn leterojn. Laŭ rekomendo de aliaj klubanoj Nikodemo partoprenis esperantistan aranĝon Baltiaj Esperanto-Tagoj kaj trapasis tie paroligan kurson.

Kiu novbakita esperantisto ne volas plibonigi tiun artefaritan lingvon? Ankaŭ Nikodemo ne sentis ĝenon diskuti kun la instruisto kaj kunlernantoj pri la necesaj ŝanĝoj en Esperanto. Bedaŭrinde, lia troa agado ne ŝajnis al ĉiu agrabla. Nikodemo komprenis, ke tiu troa lia aktiveco malhelpas lecionon.

Post la paroliga kurso Nikodemo jam kuraĝis, fieris, ke li preskaŭ ĉion komprenas. Tamen li ne havis sufiĉe da kuraĝo por partopreni en la diskutoj. Nur dum la manĝado aŭ en la paŭzoj inter la programeroj li babiladis, kuraĝigante sin. Aparte lin ĝojigis la interparolo kun iu ĉino, kun elstara klereco. Iam post la vespermanĝo li bonkore parolis kun Nikodemo, ne mokante lian malĝustan prononcadon. Tiu malgranda konversacio lin finfine decidigis iri al la sukceso en tiu afero.

Dum paŭzoj Nikodemo intencis babili kun iu ajn komencanto. Li trovis junan polinon por interparolo. Sed ŝi estis vera komencantino. Estis agrabla sento por li, kiu antaŭ du jaroj mem komencis lernadon, nun ludas rolon de instruisto. Ili interŝanĝis la adresojn kaj estigis agrablan korespondadon.

Multajn artikolojn kaj aliajn literaturajn verkojn Nikodemo tradukis en Esperanton por sia propra plezuro. Kaj li ĝojis pro sia sukceso. Nun Nikodemo mem provas verki beletron. Nikodemo abonas kaj legas multajn plej diversajn Esperantlingvajn periodaĵojn. Lia Esperanta biblioteko kreskis kaj kreskas. Kaj li konvinkigis, ke ankaŭ Esperanto estas portanto de la kulturo, ke esperantistoj devas mem lerni kaj uzi la lingvon, por fortikigi tiun kulturon, riĉigi ĝian enhavon kaj plivastigi la reton de la komunaj kulturaj posedaĵoj. Jen tiel!



*esperantigita de **Paula Adúríz** (Hispanio)*

Yin Jiaxin (Ĉinio)



Denove renkonti Flavon

Iun vesperon, en somero de 2022, mi laŭkutime promenis ĉirkaŭ la malgranda lago apud nia loĝkvartalo. Sur la pado troviĝis malmulte da promenantoj. Mi ekvidis, ke sur herbejo duonkuŝas granda flava hundo. Antaŭe, ĉe la lago hazarde videblis sole vaganta hundo, al kiu mi neniam donis atenton. Ankaŭ ĉifoje min

aŭtoro, Yin Jiaxin

ignoris la hundon. Kontraŭ mia atendo, ekvidinte min, ĝi sin levis kaj al mi lame paŝetis. Mi rimarkis, ke ĝia dekstra antaŭa kruro estas rompita, kaj bukla drato volviĝas ĉirkaŭ ĝia kolo. Unu ekstremo de la drato trapikas ĝian nukon, kiu elŝvitas sangon. Mi komprenis, ke la hundo petas de mi helpo.

Mi telefonvokis la edzinon alstiri nian aŭton kaj mi veturigis la hundon al veterinara kliniko.

Dum kuracado, la veterinaro diris al mi ke krom la evidentaj vundoj, la hundo havas aliajn vundojn sur sia korpo, eble ricevinte plurfoje batadojn per bastono kaj piedoj.

“Kiu atakis la hundon tiel kruele?” – mi iom indignis.

“Ĝenerale, fremdulo malfacile trafas hundon per bastono aŭ piedo. Mi suspektas, ke estis ĝia mastro kiu vundis ĝin,” diris la kuracisto.

“Ĝia mastro?” Mi estis kaptita de surprizo, kaj demandis: “Ĉu ĝi ne estas senhejma hundo?”

“Ne. Ĝi devas havi mastron,” la kuracisto asertis: “Rigardu, ĝi estas kastrita kaj ne tiel malpura kiel vaganta hundo. Cetere, ĉe la kolo videblas ŝnursigno.”

“Kial la mastro traktis sian hundon tiel malbone?” Mi sentis min pleksa.

La kuracisto indiferece respondis: “Iuj homoj sin distras per turmentado de bestoj. Ili estas persekutataj manuloj kun anormala psiko. Mi mem ja konas kelkajn tiajn homojn.”

Mi estis mirigita kaj ankore malbenis tiajn barbarajn homojn. La kuracisto

konjektis, ke la hundo probable fuĝis el la hejmo de sia mastro. Mi decidis ĝin akcepti en mian hejmon.

Sed ĉe la pordo de mia domo, kie mi teretaĝe loĝas, la hundo rifuzis eniri, sin kuntirante kaj tremadante. Mi perforte prenis ĝin en la gastokambro, kaj ĝi obstine rampis al la pordo por eliri. Mi telefone konsultis la bestokuraciston. Li opiniis, ke en la estinteco la hundo turmentiĝis enĉambre, tial ĝi nun timas resti en ĉiu ajn ĉambro. Do ekstere, sub la fenestro apud mia aŭto, mi el tabulo konstruis simplan dometon, en kiu la hundo volonte ekuŝis. Mia edzino donis al la hundo la nomon “Flavo”.

En la sekva frumateno, antaŭ ol eliri kun la edzino por laboro, mi metis manĝaĵon kaj akvon ĉe la hunda dometo, Flavo pene sin levis kaj svingante la voston sekvis nin per tri kruroj ĝis nia aŭto ekmoviĝis. Hejmenirinte ĉe sunsubiro, ni trovis la hundejon malplena kaj Flavo ne videblis ĉirkaŭe. Maltrankvila je tio, ke Flavo pro fideleco returnis sin al la eksmastro, ni serĉis ĝin ĉie, vokadante: “Flavo, Flavo...” Finfine, ni trovis ĝin sidantan sur herbejo ĉe la lago. Aŭdinte nian vokadon, Flavo ŝancele trenis la krurojn al ni, svingante la voston.

En la sekvaj tagoj, kiam finiĝis nia laboro, Flavo ne estis hejme: ni ne ĉagreniĝis, sciante ke ĝi nepre revenos ĉe vesperiĝo. Pasis unu monato. Iun tagon, Flavo ne revenis. Mi kaj la edzino tie kaj ĉi tie serĉis plurajn tagojn, sed vane. Ni malĝojis perdi Flavon. Dum la tuta somero, nin ofte ĝenis la sopiro al ĝi. Kun la tempofluo, la sopiro iom post iom mildiĝis.

Matene de iu dimanĉo, apud superbazaro mi vidis, ke malpura flava hundo, kun sia vosto inter la kruroj, traserĉas rubujon por akiri manĝeblaĵon. Mi rekonis en la hundo Flavon. Kun miksado de ĝojo kaj surprizo mi laŭte vokis: “Flavo!”

Je mia voko, la hundo turnis sian kapon kaj vidis min. Ĝi, rapide svingante la voston, lame alkuretis kaj antaŭ mi paŝadis tien kaj reen. Mi gaje diris al ĝi: “Flavo, sekvu min, ni hejmeniru, ĉu ne?” Mi iris kelkajn paŝojn, Flavo ne sekvis min. Returne mi alvokis ĝin, sed ĝi ne moviĝis. Mi provis ĝin brakpreni, sed ĝi evitis min kaj foriris, retrorigardante min foj-foje.

Kun trista humoro, mi iris hejmen kaj rakontis la okazaĵon al la edzino, kiu korbore larmis dum tempeto. Ni ambaŭ scivolis, kial Flavo ne volas vivi kun ni. Mi telefone petis klarigon de la bestokuracisto, kiu eksplikis: “La hundo iam turmentiĝis furioze kaj vundiĝis multfoje, tiel ke ĝi ne plu kredas je la homaro, do ĝi preferas vivi libere ol kun ĉiu ajn homo.”

Post nelonge, mia edzino gravediĝis. Krom laboro, por la infano ni sinsekve faris antaŭnaskiĝan preparon kaj postnaskiĝan vartadon. Ni do senvole tute forgesis pri Flavo.

Iumatene mi kaj la edzino, kun nia infano jam kvarmonata, faris aĉetojn en

superbazaro. Antaŭtagmeze ni ekrevenis. Mi apenaŭ veturigis la aŭton en la loĝkvartalon, kiam tre malpura hundo bojante baris al mi la vojon. Kvankam oni ne povis distingi ĝian koloron ĉar ĝi tro malpuris, tamen mi kaj la edzino per la unua rigardo rekonis Flavon.

Mi ne sciis kio okazis al Flavo, sed pensis ke ĝi refoje petas de ni helpon. Mi elaŭtiĝis kaj observis, ke malgraŭ la malpureco Flavo estas en bona stato. Sed ĝi, starante antaŭ mia aŭto, obstine laŭte bojadis al mi. Rezignacie, mi proponis al la edzino, ke ŝi unue piediru hejmen portante la infanon.

Ŝi elaŭtiĝis kaj metis la envolvititan infanon en la bebĉareton. Neatendite, Flavo, galopinte al la bebĉareto, per la buŝo kaptis mian infanon kaj forkuris rapide. La edzino terurigis kaj tuj postkuris, kriegante: “Flavo, revenu! Flavo, redonu mian infanon...” Konsternite, mi stiris post ĝi la aŭton.

Baldaŭ Flavo atingis la placon ekster la loĝkvartalo, lasis la infanon surtere kaj malaperis kiel vaporo. Mi ambaŭmane levis la infanon, ankoraŭ profunde dormantan. Dum palpebruma daŭro, la edzino anhelante alkuris kaj plorvoĉe demandis: “Kio estas al la infano?”

“Ne gravas. Ne vundita,” mi respondis.

La edzino transprenis kaj premis la infanon en sian sinon, insultante: “Damninda Flavo! Maldankema Flavo! Hundaĉo...”

Subite mi eksentis vertiĝon, kaj la tero ektemis forte. Mi haste subtenis la edzinon, kaj ni kune ekkaŭris. Ni sentis nin kvazaŭ en boato flosanta sur furioze onda maro. Kun surdigaj bruegoj, sinsekve disfalis ĉiuj etaĝdomoj ĉirkaŭ la placo. Rigardante nian loĝkvartalon, mi vidis nenion alian ol ĉeno da kolosaj ruinoj kaj densa nubo de polvo.



Tiun momenton, same kiel Flavo mi fariĝis senhejma, tamen, danke al Flavo, mi ankoraŭ havis la tutan familion.

el Literatura Foiro kun permeso de la aŭtoro por republikiĝi

Eugene Khvalkov (Rusio)



Neniu bezonas malbonan edzinon

aŭtoro, Eugene Khvalkov

Antaŭ multaj, multaj jaroj, en regno ĉe la Okcidenta Bordo de la Meza Maro, vivis reĝo kaj reĝino, kaj ili havis solan filon nomitan Egbert. Kiam venis la tempo por ili forlasi ĉi tiun mondon, ili konfidis la prizorgon de sia filo al sia plej fidela servisto - la ĉasisto Witold.

La juna reĝo Egbert plenkreskis kaj volis edziĝi. Sed li nur volis, ke la plej bela sinjorino el ĉiuj marbordaj regnoj fariĝu lia edzino. Witold mendis portretojn de ĉiuj plej famaj belulinoj por la reĝo, sed Egbert ŝatis neniun el ili. Fine, li alportis lertan portreton de bela princino el Arigroth, la pli juna fratino de la loka reĝo, sub kiu estis surskribo: "Kiu solvos miajn tri enigmojn, mi edziniĝos kun li."

"Estas ŝi!" ekkriis la juna reĝo. "Jen tiu, kiun mi vidis en miaj songoj, pri kiu mi songis! Rapidu, ordonu seli la ĉevalojn, mia Witold, kaj ni iros svati ĉi tiun sinjorinon."

Ili ne bezonis longe por pretigi sin kaj tuj ekvoji. Survoje, Witold elpensis enigmon, kiun la juna reĝo demandos al la bela sinjorino. Ili veturis kaj veturis, kaj ili vidis maldensejon, en kiu estis granda fajro, preskaŭ atinganta la ĉielon mem, kaj apud la fajro — knabino en ĉasmantelo kun zibelkolumo, kaj apud ŝi — ŝia sekvantaro, sidanta kaj trankvile interparolanta. Estis lumo en la maldensejo, kvazaŭ de la suno, nur ĝi ne estis sunlumo, sed de la vizaĝo de la knabino. La vojaĝantoj alproksimiĝis al la fajro kaj salutis tiujn, kiuj sidis apud ĝi. Kaj la knabino diris:

"Kiom malproksimen vi iris, bonaj sinjoroj, kaj kion vi serĉas?"

"Ni iras al Arigroth al la reĝa kortego por peti la manon de ilia princino."

"Ĉu vi scias, ke la princino Arigroth ĵuris, ke ŝi donos sian manon nur al tiu, kiu solvis ŝiajn tri enigmojn? Ĉu vi regas la arton de ĉi tiu antikva ludo?"

“Ni scias, bela sinjorino,” Egbert respondis, “kaj mi ĵuras al vi, la arto de ĉi tiu ludo ne estas fremda al ni.”

“Nu,” diris la sinjorino, “ĉu vi ne provos diveni mian enigmon?”

“Kial ne?” diras la vojaĝantoj, “Ni divenu.”

La bela sinjorino elmetis enigmon. Egbert kaj Witold flankeniris por interkonsiliĝi kaj Witold diris:

“Bela sinjorino donis malfacilan enigmon, kaj se la Arigroth-reĝidino faros la saman enigmon, tiam ĝi ne estos facila por vi kaj mi, sinjoro. Sed mi trovis la respondon.” Kaj li diris al Egbert la respondon.

La reĝo kaj la ĉasisto revenas al la fajro kaj Egbert diris:

“Kvankam vi faris al ni malfacilan enigmon, bela sinjorino, mi trovis la respondon,” li eldiris la respondon al la enigmo.

La sinjorino kaj ĉiuj, kiuj estis kun ŝi, estis surprizitaj.

“Nu, ruza kavaliro,” ŝi diris, “ŝajne ne vane vi iras al la kortego en Arigroth; provu vian sorton tie! Dume malstreĉu ĉe la fajro, vojaĝantoj, jam malfrue.

Egbert kaj Witold ekloĝis en la varmo de la fajro kaj ekdormis. Ili vekigis la sekvantan matenon — estis nek la bela sinjorino nek ŝiaj kunuloj, nur la fajro brulis. Ili rajdis plu, rajdis, rajdis kaj atingis Arigroth mem. Ili venis al la reĝa kortego, la heroldoj raportis pri ilia alveno, kaj la reĝo kaj la ĉasisto atendis la reĝidinon. La reĝidino eliris — kaj ili rekonis ŝin kiel la belan sinjorinon, kiun ili renkontis hieraŭ en la arbaro.

“Vi jam solvis unu el miaj enigmoj, reĝo Egberto,” diras la princino. “Aŭskultu la duan.” Ŝi elmetis al li la duan enigmon.

Egbert kaj Witold flankeniris por interkonsiliĝi kaj Witold diris:

“La reĝidino demandis malfacilan enigmon, sed mi trovis la respondon,” li diris al Egbert la respondon.

Egbert turnis sin kaj diris:

“Kvankam vi donis al mi malfacilan enigmon, princino, mi trovis la respondon,” li eldiris la respondon al la enigmo.

La princino kaj ĉiuj ŝiaj korteganoj estis surprizitaj.

“Nu, reĝo Egberto,” ŝi diris, “estas klare, ke vi venis ĉi tien ial. Aŭskultu la trian enigmon.” Kaj ŝi elmetis la enigmon.

Egbert kaj Witold flankeniris por interkonsiliĝi kaj Witold diris:

“La reĝidino demandis malfacilan enigmon, sed mi trovis la respondon,” li diris al Egbert la respondon.

Egbert turnis sin kaj diris:

“Kvankam vi donis al mi malfacilan enigmon, princino, mi trovis la respondon.” Kaj li donis la respondon al la enigmo.

La princino kaj ĉiuj ŝiaj korteganoj estis surprizitaj.

“Ŝajne, reĝo Egbert, vi estas la plej ruza kavaliro sur la tuta marbordo,” diris la princino, “ĉar vi solvis ĉiujn miajn enigmojn. Mi konsentas esti via edzino!”

Ili decidis geedziĝi kaj pretis iri al la regno de Egbert. Ja ne estas bone por lando resti longe sen reĝo, kaj oni ne vane diras: “Estas malfacile por kapo sen ŝultroj, estas malfacile por korpo sen kapo.” Ili ekiris sur la vojon, sed la princino nur suspektis, ke Egbert ne solvis siajn enigmojn per sia propra menso. Foje en la arbaro ŝi petis lin etendi al ŝi la manon kaj skuis ĝin — kaj la reĝidino sentis, ke la juna reĝo estas tre malforta, kaj li havas malmulte da forto kaj bonŝanco. Ŝi komprenis, ke ne Egbert, sed lia ĉasisto solvis ĉiujn ŝiajn enigmojn, kaj ke la reĝo povas fari malmulton sen sia fidela servisto.

Iun vesperon ili haltis por la nokto. Ĉe la vespermanĝo, la princino servis al Egbert kaj al lia ĉasisto ebria trinkaĵo, kaj kiam ili ekdormis, ŝi ordonis al siaj servistoj kapti Witold, detranĉi liajn brakojn kaj kruojn kaj lasi lin en la arbaro, kaj demeti la reĝajn vestaĵojn de Egbert, vesti lin kiel porkiston kaj konduki lin al stalo en najbara vilaĝo.

La juna reĝo vekiĝis la sekvantan matenon en garbejo — estis nek la princino nek lia fidela asistanto — nur malpuraĵo, porkoj kaj la estro pelanta lin al la laboro. Kaj tiel reĝo Egbert fariĝis porkopaŝtisto.

Kaj la senkrura kaj senbraka Witold vekiĝis en la arbaro. Lia reĝo ne estis proksime, nek la Argyryth-reĝidino estis tie. Li rigardis kaj vidis blindulon irantan laŭ arbara vojo kaj frapantan per bastono.

“Bona viro,” Witold vokis al li, “kompatu, helpu la senkruran kaj senbrakan kriplulon!”

“Mi mem estas kriplulo,” la blindulo respondis, “mi vidis nenion ekde infanaĝo.”

“Metu min sur viajn ŝultrojn,” diris Witold, “mi montros al vi la vojon! Do kune ni prenos nin ambaŭ por unu sana: mi estos viaj okuloj, kaj vi miaj brakoj kaj kruoj.

Pri tio ili decidis. La blindulo metis la senkruran Witold sur siajn ŝultrojn kaj li marŝis tra la arbaro. Li marŝas kaj Witold rigardas — la kabano staras.

“Atendu, frato,” diras Witold, “ni eniru kaj varmigu nin.”

Ili frapis — neniu respondo. Ili eniris kaj ne estis animo ene. Ili decidis, ĉar la domo estis malplena, ekloĝi ĉi tie en la mezo de la arbaro. Do ili ekvivis, sed nur mankis al ili gastigantino. Witold kaj la blindulo konspiris kun la arbarbestoj, kaj kune ili forrabis preterpasantan principon, kaj kvankam la homoj de la princino postkuris ilin, ili ne povis postatingi ilin. Kaj ŝi fariĝis edzino de blindulo kaj mastrino de arbara kabano.

Witold iam rimarkis, ke la knabino komencis ĉagreniĝi. Kaj li diris al ŝi:

“Kial vi estas, princino, malĝoja? Ĉu vi estas malsana?”

“Mi estas malĝoja,” diras la princino, “ĉar iu venas nokte kaj suĉas la sangon el mia brusto. Kaj mi ne povis vidi kiu. Do mi ĉagreniĝas, do mia forto forlasas min.”

Witold decidis ne endormi en la blindulo nokte kaj elspuri la misteran fiulon, kaj ili vokis por helpo la grizan lupon, kiu loĝis en truo ne malproksime de ili. Witold kaj la blindulo kaŝis sin sur la forno, kaj la lupo kaŝis sin malantaŭ la forno. Nokte la fenestro malfermiĝis, kaj sorĉistino flugis en la domon, falis al la brusto de la princino kaj komencis suĉi sangon. Estis tiam kiam la lupo rapidis kaj li, Witold kaj la blindulo kaptis la maljunan sorĉistinon.

“Ne pereigu min, bonaj sinjoroj!” kriis la sorĉistino. “Mi povas esti utila al vi.”

“Por kio vi utilas, maljuna ĉapelo?” demandas Witold kaj la blindulo.

“Mi scias, kie vi trovos puton kun viviga akvo,” diris la maljunulino. “Ĝi povas redoni krurojn al sengamba persono, brakojn al senmana persono, kaj vidon al blindulo.”

La amikoj pensis kaj konsentis. La sorĉistino montris al ili puton kun viviga akvo, kaj rezulte, iliaj amikoj resaniĝis el ĉi tiu akvo: la brakoj kaj kruroj de Witold revenis, kaj la vido de la blindulo estis restarigita. Ili liberigis la sorĉistinon, sed nur malpermesis al ŝi damaĝi la principon denove.

Witold ekmemoris sian reĝon Egbert.

“Aŭskultu,” li diris al sia amiko, “ni kune spertis multon, sed nun estas tempo por ni disiĝi: mi devas helpi mian majstron, reĝo Egbert. Ja li nun, kompreneble, estas en problemoj, same kiel mi iam estis!”

Ili adiaŭis. Witold sidis sur la griza lupo kaj ili iris serĉi la junan reĝon. Ili serĉis longe, ĝis ili trovis lin en maldensejo kun grego da porkoj. Egbert estis nekredeble feliĉa, vidante sian maljunan serviston kaj amikon, kaj Witold diris al li:

“Sinjoro, vi suferis de ĉi tiu humiliga servo. Ni iru hejmen, ne estas bone por la regno esti sen reĝo! Kaj ni trovos al vi alian edzinon, ne tiel perfidan kiel la Argyroth-princino.

Tiel ili faris. Ĉiuj regatoj ĝojis, kiam ili vidis, ke ilia reĝo revenis, kaj longe li regis en sia regno. Kaj de tiam neniu alia komencis svati la principon el Argyroth, do ŝi mortis fraŭla.

Ekde tiam, ĉe la bordo de la Meza Maro cirkulis proverbo: “Neniu bezonas malbonan edzinon.”

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



En unu neĝa tago

En lernejo, la instruistino donis al ĉiuj taskon skribi ekzercan verkon pri neĝa tago.

Peter eksidis ĉe la tablo, antaŭ fenestro en sia ĉambro, kaj malfermis kajeron. Hejmanoj paroladis mallaŭte, ĉar filo preskaŭ neniam sidis por prepari hejmajn

aŭtorino, Rita Mkrtĉjan

taskojn.

Unua frazo jam estis skribita - Neĝas...

Peter spektis belajn neĝerojn kaj imagis, kiel la instruistino laŭdos lin, ĉar li skribos plej bonan verketon, sed la skribilo "rifuzis" daŭrigi la "vojon".

Li tre ŝatas vintron, ŝatas, ĉar Meri, lia samklasanino, atentis lin nur kiam li malforte batas ŝin per neĝbuleto. Ŝi ridas kaj diras al li - Peter....

Finon de la frazo li jam ne aŭdas, sufiĉas, ke ŝi alvokas lin laŭ nomo.

Neĝas...

- Kia hela tago, kiel beliĝis arboj, ŝajnas, ke la urbo transformiĝis en iu mistera neĝa regno,- pensis Peter.

Nerimarkeble alproksimiĝis tempo por iri en lernejon.

- Peter, ĉu vi finis skribi hejman taskon, - demandis patrino.

- Jes, vikle respondis Peter kaj fermis la kajeron, kie estis skribita nur unu vorto

- Neĝas...

“Ankoraŭfoje pri la amo”

el Esperanto-rememoroj

Iam, antaŭ multaj jaroj, ni, kun esperantistoj de nia urbo, vojaĝis, dum ripozaj tagoj, en bonegan ripozejon, kiu situis ekster la urbo.

(Eksterlandaj esperantistoj bone konas la ripozlokon, ĉar niajn Esperanto - aranĝojn ĝenerale ni organizis tie).

Tage ni supreniris apudajn montetojn, vespere kolektiĝis, kantadis amatajn Esperanto-kantojn, dancadis, rakontadis pri estontaj someraj planoj.

Mi forgesis mencii, ke estis vintraj ripoztagoj.

Unu el niaj "novbakitaj" esperantistoj amindumis nian amikinson.

Kiel ĉiuj junulinoj, ni ŝercis, ridis, kaj povra junulo, kiu, interalie havis fobion de alteco, neniam supreniĝis kun ni kaj sopire rigardis, starante malsupren. La naturo estis belega, silentis blankaj neĝaj montetoj kun arboj, multaj el kiuj ankoraŭ havis foliojn.

Plej admirindaj estis arbustoj kun etaj ruĝaj fruktoj.

Blanka neĝo kaj ruĝaj "gutoj" aspektis preskaŭ fabele.

En tiu tago, post surmonta promonado, ni ĉiuj jam malsupreniris, kiam nia amikino ekkriis: "Kia beleco! Mi dezirus forŝiri unu branĉeton por memoro!"

Kio okazis post minuto? Nia amanto (lia "ombro" ĉiam okazis nemalproksime), kurante komencis supreniĝi. Li preskaŭ rampe, atingis arbuston kaj ni ekvidis, ke li singarde revenadis. En lia mano estis unu branĉeto kun ruĝaj fruktoj.

Neniu imagis, kiel malfacila estis por li revena vojo, ĉar lia mano estis okupita per tre valora "donaco".

Nia amikino rigardis kun miro kaj ĝojo.

Sed plej "grava" ekmiro okazis post tio, kiam la junulo transdonis branĉeton. Nek unu frukto restis sur la branĉo, ĉiuj falis laŭvoje.

Lia vizaĝo iĝis blanka kiel neĝo, post tiuj teruraj (por li) agoj, ĉar li ne alportis "signon" de lia amo.

Sed la vizaĝo de nia amikino iĝis ruĝa kaj ŝi ridetis, dankis, ili longe staris, poste, interparolante, daŭrigis la vojon.

Ni ĉiuj malproksimiĝis, kaj nek iu ion diris.

Eble ni ekvidis unu simplan "okazaĵon" - ateston de la amo, kiu vere estas sentima, kuraĝa, preta fari ĉion por alia homo, por homo, kiun ni amas.



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Iljet Aliĉka (Albanio)



Mallonga rakonto pri bone naskitaj homoj

aŭtoro, Iljet Aliĉka

En la naŭdekaj jaroj, ie en la forgesita albana provinco Xixilla kverelegis du fremduloj – anglo kaj nov-zelandano. En la publika loko, superŝutante unu la alian per insultoj, sed observante la normojn, kiel decas al ĝentlemanoj. La kaŭzo de la kverelego estis tro malsimpla kaj tiel ofenda, ke ili stariĝis antaŭ la tribunalo, do nur malmultaj povis ekscii, kio okazis. Kompreneble se ne tio, ke ambaŭ renkontiĝis samtempe kaj en la sama loko, ne estus okazinta la publika kverelo, kaj la kampuloj traktus ilin kiel Jehovanojn aŭ reprezentantojn de bonfaraj organizaĵoj, kiuj dum la lastaj jaroj venadis eĉ al la plej malproksimaj lokaĉoj. Ĉiukaze la kampuloj el Xixilla diris konkorde: neniam en la vivo ili vidis anglon aŭ nov-zelandanon, krome tiel fervore kverelantajn.



Ni diris, ke ĉiu vizitis propravole niajn vilaĝojn. Tamen estus sence, ke ni suspektu ilin pri spionado, ĉar nenio estis vidinda tie. La anglo venis kun sia familio kaj – laŭŝajne – estis devigita por defendi ĝiajn honoron kaj dignon antaŭ tiu nov-zelanda rivalo.

Ambaŭ fremduloj kvrelegis en sia lingvo kaj neniu el la vidintoj komprenis ilin.

– Pri kio ili kverelas? Kio okazis? – demandis la kampuloj. Kiel montriĝis, la kaŭzo estis grava kaj sufiĉa, por perdi ne nur fridan sangon, sed ankaŭ prudenton. Koleregon ĉe la fremduloj malbridis la rajto pri la nobela titolo, kiun ili aĉetis per multe da mono ĉe iu albana Societo (Societo por la Renaskigo de la Naciaj Valoroj Spiritaj) kontraŭ granda sumo. Ili havis la saman titolon de la grafo de Xixilla – kaj nun unu akuzis la alian pri senleĝa akiro de tiu ĉi titolo aŭ pri trompo. Ili prezentis la akuzon ĉe la tribunalo, kaj eĉ ĵetis kalumnion sur la Societon, riproĉante la vendon de la falsaj nobel-titoloj. Kaj por ili ne estis grave, ke en la lando, al kiu ili venis, ne estis la nobel-titoloj, sed ke la lokaj titoloj, kiel „bejo”, „agao”, „efendio”, „bajraktaro” ne konvenis aŭ malplaĉis en Okcidento.

La mirinda ideo fondi la Societon por la Renaskigo de la Naciaj Valoroj Spiritaj ĝermis en la kapo de eksa diplomato, kiun oni ĵus liberigis de la plenumataj funkcioj en la albana ambasadejo en lando, kiu havis la historion riĉan je nobel-titoloj. La diplomato estis juristo kaj spertiĝis pri similaj aferoj. Li formis la Societon laŭ ĉiuj postuloj de la leĝo, registris ĝin en la Ministrejo de Kulturo, kaj en la regularo kaj ĝeneralaj principoj li difinis la patriotan celon de la Societo: diskonigi kaj renaskigi tiujn naciajn valorojn, al kiuj minacas forgeso aŭ malapero, por ke ili formu parton de la spirita heredaĵo de tiu antikva nacio.

La restarigado de la valoroj estus okazonta per diskonigo de la historiaj blazonoj de moŝtaj familioj, per malkovro de la historiaj radikoj de tiuj familioj kaj rehavigado de la nobel-titoloj, kiujn senleĝe kaj ne hazarda la antaŭa reĝimo kondamnis al la plena forgeso. La regularo de la Societo determinis, ke la titoloj estos donataj enlande, kaj ankaŭ eksterlande, laŭ reguloj de la internacia leĝo kaj komercaj principoj.

La eksa diplomato invitis al partopreno en la Societo eminentajn personojn el la mondo de la kulturo, kaj ili ĝoje konsentis agadi por la nobligo kaj spirita renaskigo de la propra lando. En la unua kunsido la fondinto aŭdigis sian paroladon, en kiu patriotaj argumentoj miksiĝis kun psikanalizo:

– Rekonstruado de lando komenciĝas per fundamentoj aŭ per simboloj, blazonoj kaj titoloj de la moŝtaj familioj – li diris enkonduke. La tono de lia voĉo, kiel ĉe la aliaj diplomatoj, estis serioza. Fojfoje li ĵetis sian traborantan rigardon al la aŭskultantoj, por komprenigi, ke li pensas kun laŭ perspektiva maniero. – Memkompreneble la renaskigo de la veraj naciaj valoroj, do la restarigo de la titoloj

de moŝtaj familioj estos ĉefa devo por ĉiu patrioto kaj honesta intelektulo en nia lando.

Poste la eksa diplomato parolis: – La hodiaŭa mondo estas plena je eminentaj, riĉaj, kapablaj, sindonemaj homoj, konsciaj pri sia aparteneco al la elito kaj reprezentantaj diversajn grupojn en la nacia kaj politika vivo aŭ en la mondo de la bizneso (angle: business). Sed ili suferegas pro tio – mi volus diri – ili malbenas la fakton, ke ili ne havas nobel-titolon, kiun ili povus lasi al siaj heredontoj, aŭ ion, kio estus gravurebla kiel ilia titolo en tomboŝtono. Hodiaŭ en la mondo ne estas homo, kiu ne revus pri tomboŝtono aŭ ŝtonplato kun la vortoj: *ĉi tie kuŝas la grafo de Burgonjĉ, Leskovik aŭ iu alia.*

La aŭskultantoj rigardis surprizite unu la alian.

– Hodiaŭ la homoj sentas frustrigon, kiam ili vidas, ke iu malpli riĉa aŭ malpli estiminda estas respektata kaj starigata pli alte en la monduma hierarkio. Kompreneble sekvas la senigo je privilegioj kaj profitoj, kiuj nur unuavide povas ŝajni bagatelaj, kiel ekzemple la neebleco partopreni en golfa, tenisa, ŝaka aŭ damluda klubo. Multaj noblaj homoj neniam aliĝos al tiuj kluboj, sed ili ankoraŭ riskas, ke oni brufermos la pordon antaŭ ili. Estas aferoj treege delikataj, malfacile klarigeblaj, sed ili baziĝas sur kelkaj universalaj principoj: la homo estas nur homo kaj pretas oferi multon por akiri konvenan pozicion, lokon en la socio, ĉe prezida tablo aŭ nur en teatra loĝio (eĉ se li tute ne scias, pri kio rakontas la spektata dramo).

– Kion ne povis toleri niaj komunistoj? – parolis la eksa diplomato. – Ne la perdon de la materiaj privilegioj, ĉar – efektive – preskaŭ ĉiuj estis sen groŝo en la poŝo. Mankis al ili tiu feliĉo, orgasmo, kiel oni povus diri, havigata per tiu sento de supereco, per la aparteneco al la elito de la socio aŭ per la ebleco decidi pri la vivo de aliaj homoj. Ilia plej granda malfeliĉo estis la manko de invito al kongresoj de la partio, sindikatoj kaj inventintoj. Ĉu ili ne revis kaj insiste klopodis okupi lokon sur la honora tribuno kaj rigardi de supre tiujn abomenajn marŝojn okaze de la unuamaja tago?

– Ĝuste estas la sama principo – daŭrigis la eksa diplomato – nur en alia formo. Ĉar por individuo ne gravas, kian juran, ideologian, politikan aŭ socian pozicion li okupas, sed kien li povas apartenigi sin, kien li povas veni, por superi aliajn, por ke la aliaj respektu lin kaj servadu al li. Tio estas kaŝita en la homa naturo. Ĉu mi diris klare?

Vidante miron sur la vizaĝoj de la aŭskultantoj, la eksa diplomato devis konigi pli fortajn argumentojn.

– Konfesu – kun mano sur la koro: ĉu vi ne klopodis iam aŭ ne strebis por fariĝi io grava? Se, jes, do oni povas redukti ĉion al la komuna celo: longdaŭraj klopodoj

kaj peniga strebado por akiri la titolojn, kiujn vi meritis, kaj kiujn oni forprenis kontraŭleĝe.

– Jen la esenco de la agado de nia Societo – li plu konvinkis – ĝi konsistas en tio, por saĝe kaj elegante kontentigi la eternajn homajn sopirojn. Ĉi tiu agado estos la garantio por la bona nomo de la Societo, la fundamento por ĝia funkciado, kaj ankaŭ – ĉar kiel ne! – la fonto de enspezoj.

La diplomato finis sian paroladon en profunda silento. Estis ja evidente, ke al ĉi tiaj argumentoj povos kontraŭstariĝi neniuj vera patrioto.

La silenton rompis unu el la plej grandaĝaj membroj de la Societo. Kun ioma hezito li demandis:

– Sed kiamaniere ni trovos ĉi titolojn? Ĉu niaj titoloj, kiel „bejo de Këlkyre”, „agao de Myzeque” aŭ „efendio de Kruja” havas la saman valoron, kiel „lordo”, „milordo de Jorko” aŭ similaj?

– Ne, estimata sinjoro, mi ne diris, ke ni okupiĝos pri la titoloj, kiuj ne estis uzataj, tio signifas, mi volis diri, ke ili ne trovos aĉetontojn en la okcidenta merkato. En la liston ni enkondukos la samrangajn titolojn al tiuj, kiujn vi bonvoleme nomis, sinjoro, ekzemple „vicgrafo de Mallakstra” aŭ „barono de Sofratik”. Komence ili povas ŝajni iom strangaj, sed estos grave nur al kutimiĝi: kun tempopaso vi vidos, kiel proksimaj ili fariĝos al ni. Krome, ĉu vi opinias, sinjoro, ke iu kuraĝos dubi pri tiuj ĉi titoloj, kiam nia Societo estos registrita? Kial? Ĉi tie mi helpas min per malgranda analogio – ni ja ofte parolas pri la regionoj, kiuj eĉ ne plu estas sur mapoj?

– Mi havas ankoraŭ unu demandon – nekuraĝe diris fama kulturaganto.

– Bonvolu ne heziti, sinjoro – konsentis la eksa diplomato kaj malkviete li komencis tamburi la tablon per fingroj.

– Mi parolos pri la lasta punkto de la tagordo, en kiu ni legas, ke post listigo kaj difino de la nobel-titoloj ni povos ilin vendadi. Mi volus ekscii, kiel ili estos vendataj, kiom, en kiu loko kaj kie ni trovos aĉetontojn landajn kaj eksterlandajn? Ĉu ni malfermos vendopunktojn por tio?

– Ni vendados tion en la bazaroj sur kamplitoj – murmuris subnaze la eksa diplomato, jam kolera, poste, kaŝante sian koleron, li ekparolis trankvilige al la aŭskultantoj:

– Sinjoroj! Antaŭ ol mi decidiĝis por tio, mi konsideris kaj pritraktis ĉiujn argumentojn por kaj kontraŭ. Bone mi konas la avantaĝojn de nia Societo, ĝiajn eblecojn, sed ankaŭ la manieron de vendado kaj surmerkato eksterlande. Eksterlande, ĉar – por diri la veron – ĝuste eksterlande troviĝas nia ĉefa kliento. Enlande ni ankoraŭ ne atingis tian nivelon de la ekonomia progreso, por kontentigi la bezonojn de tiu luksega hobia. Ĉar ni ne estas konataj eksterlande, ni prezentos al la vendo (do por la divido) ĉefe titolojn el forgesitaj lokoj, pri kiuj – sincere dirite –

ĝis nun aŭdis neniu inter ni, kaj des malpli, ĉu estis tie iu princo aŭ barono. – Kaj finfine – la eksa diplomato okupiĝis pri la praktika flanko de la tuta entrepreno – ni devos komence pagi malgrandajn kostojn, tio signifas: aĉeti blanketojn sur ĉina papero kun orumitaj literoj kaj mendi ĉe artisto eksterordinaran stampilon. Koncerne la vendadon, hodiaŭ ni havas tiajn rimedojn por transdonadi informojn, ke aliro al la klientoj ne estos malfacila. Ni povos ankaŭ efektiviĝi tion sen aldona bruo enlande, kio ŝirmos nin kontraŭ envojo kaj malnecesa ĉi tie diskoniĝo. Sufiĉos pago en interreto, kun adreso de nia Societo kaj informo, ke estas aĉeteblaj nobel titoloj, krome ni povas aperigi pagitan anoncon en gazeto aŭ serioza eksterlanda revuo – kaj vi mem vidos, kia amaso da homoj sopirantaj titolon venos al ni.

La supozoj de la eksa diplomato konfirmiĝis plene. La unua peto – de iu kaduka nederlanda vidvino, heredinta de sia edzo tre grandan sumon, pri kiu ŝi ne sciis kion fari – venis unu monaton poste, kiam aperis la anonco. Ŝi decidis aĉeti nobelan titolon – ne gravas per kiom da mono, nur ke – ŝi skribis – „mi ricevu ĝin en la lando de tulipoj, ĉar la aĝo ne permesas al mi viziti Albanion – la landon de agloj.”

La sekvaj klientoj ankaŭ ne montris grandan emon veni al la lando, kiu donis al ili titolojn. Nur iu angla ĝentlemano – du monatojn post la aĉeto – deziris viziti la landon, kie li ricevis sian nobelan titolon.

La ĝentlemano estis riĉa entreprenisto el industriaj distriktoj de la norda Anglujo. Rimarkinte la anoncon en la gazeto, li hezitis komence inter la titoloj „vicgrafo de Xixilla” kaj „barono de Karavasta”, fine li decidiĝis kaj sendis al la Societo la konvenan petskribon. Neniam ili eksciis, kial al la angla milionulo pli multe plaĉis la unua titolo.

En la Societo ĉio funkciadis kiel en svisa horloĝo, do la respondo al lia petskribo venis fulmrapide.

„Ni havas la honoron sciigi Vin, Estimata Sinjoro, ke la Estraro de nia Societo – post la akcepto de via peto kaj ĝenerala informiĝo pri Via agado por la paco kaj progreso, decidis unuanime havigi al Vi la titolon de la vicgrafo de Xixilla. Ni kore gratulas al Vi kaj Via titolo servu al la gloro de la homaro.”

Al la letero estis aldonita la fakturo por la konvena sumo, kiun la estonta nobelo ĝiru al la konto de la Societo en banko de neŭtrala lando. La angla riĉulo delonge atendis tian okazon. Unue li kaŝe presigis novajn vizitkartojn kun la nobela titolo. Li ankaŭ pendigis super la pordego tabulon, en kiu oni gravuris per oraj literoj lian nomon, kaj sube la ĵus aĉetitan titolon.

Tiutempe la agado de la Societo floris. Sed – kuraĝigita kaj fervorigita per amasego da petskriboj, ĝi faris eraron aŭ pli ĝuste stultaĵon kaj vendis du aŭ tri titolojn el la sama provinco. Kaj okazis tio, kio devis okazi. La montaran regionon de Xixilla vizitis ne nur la ĝentlemano el Anglujo. Al Xixilla li venis kun siaj edzino

kaj filo-inĝeniero, diplomita pri elektroniko en la Kembriĝa universitato. La unua loko sur tiu fremda tero, kie ili starigis la piedojn, estis malgranda, mizerega flughaveneto, ne tro konvena al la imagoj de la vicgrafo. Sed li klopodis en ĉio, kion li vidas, trovi spurojn de iama prospero. Eĉ en la malpura ĉambrego por alflugantoj, en la malĝentila konduto de policistoj, en la mallarĝaj kaj truplenaj stratoj, en la almuzuloj, kiuj sin alkoĉis kiel sangavidaj kuloj.

La edzino kaj la filo rigardis lin dubeme. Kun timo ili atendis, kion li diros.

– Ni estas ĉi tie – finfine li diris, ne lasante al ili tempon por malnecesaj impresoj. Do, ili ne eksciis, ĉu li kontentas pri la alveno aŭ faras bonan mienon, kaŝante elreviĝon.

Xixilla povis havigi al la gastoj nenion, kio estus konvena al ilia rango. Sed antaŭ la okuloj de la vicgrafo ĉio prezentiĝis kun alloga ekzotiko: malgranda akvomuelejo ĉe la rivereto, kie oni produktas maizo-farunon, ŝtondomoj, kiuj memorigis pri mezepokaj eŭropaj fortikaĵoj ...

Montriĝis, ke la Societo ne tro precize informis la vicgrafon pri la ĵus aĉetita heredaĵo. Ekzemple la vasteco de la regiono havis tute aliajn dimensionojn ol estis skribite en la letero. „Sed la nobelecon oni ja ne mezuras per latitudo, sed per la tragikeco de la historio kaj famaj eventoj” – pensis la vicgrafo.

En la ĉefurbo de la regiono akceptis ilin varme la prezidanto de la konsilio, al kiu la nobeligita anglo sendis telegramon, por sciigi lin pri sia mallonga turisma vizito, nur unu semajnon pli frue (la vicgrafo ne ŝatis fari bruon ĉirkaŭ si).

Ĝuste tiutempe el Nov-Zelando venis alia ĝentlemano. Li prezentis al la anglo sian nomon, kaj tuj poste li aldonis: „vicgrafo de Xixilla”. Komence la anglo akceptis tion kiel ŝercon aŭ kiel esprimon de la respekto por lia titolo, sed kiam li vidis la seriozan vizaĝon de la nov-zelandano li diris moke:

– Vi havas la honoron, sinjoro, renkonti vian samtitolan aŭ saman fraton – kaj plengorĝe li ekridis pri la ŝerco.

Tamen la nov-zelandano estis malcedema por defendi sian pravecon. Kviete, sed decide li respondis:

– Mi devas diri al vi, estimata sinjoro, ke mi ne estas la unua, kiu aspiris pri tiu ĉi titolo. Prezentis sin ankoraŭ unu persono antaŭ vi, kio permesas juĝi, ke la Societo troigis.

La anglo montris siajn dokumentojn pri la aĉeto de la titolo, elprenante samtempe vizitkartojn kiel pruvon, ke li pravas. Responde la nov-zelandano tuj donis al la anglo sian vizitkarton kun la sama titolo (krome metita antaŭ la nomon). Kompare al la incitiga anglo, la nov-zelandano klopodis pli bone maski koleron kaj proponis, ke ili kompromisu. Sed la angla vicgrafo estis kun siaj edzino kaj plenkreska filo kaj por nenio en la mondo li povus ridindigi sin. Li devis nomi la

nov-zelandanon tiel, kiel li meritis, do ne plilaŭtigante sian voĉon, sed kun klara malŝato: Vi estas ne nur internacia trompanto. Mi diros al vi, sinjoro, kio vi estas. Vi venis kaj ŝajnigas gravulon en mia lando, kiun arogante vi nomas forgesita truaĉo. Dume gapuloj ariĝis ĉirkaŭe. Sen trovi respondon, la nov-zelandano nur suspiris:

– Ho, Dio, kia aroganteco!

Post la terura ofendo ĉion devis prijuĝi kompreneble la urba tribunalo.

La kampuloj, kiuj aŭskultis la kverelon, povis atesti nenion, ĉar same kiel la juĝistoj, ili ne komprenis, kio okazas.

Kiel atestanto estis vokita la prezidanto de la Societo – eksa diplomato – kiu fariĝis la ĉefa heroo de la proceso. Zorgeme kaŝante tremadon de la voĉo kaj manoj, li respondadis digne kaj kompetente. Kun patoso li aludis la neceson spirite renaskigi la nacion, sed ankaŭ kun emfazo li dankis al ĉiuj estimindaj homoj, kiuj aĉetante nobel-titolojn, havas sian propran kontribuon al la progresigo de grandiozaj valoroj ĉe la martira albana nacio.

Post tiu longa enkonduko la eksa diplomato diris ankoraŭ kelkajn vortojn pri „negrava miskompreno, ĉirkaŭ kiu fariĝis tiom da bruoj”. Laŭ lia opinio la diversaj kulturoj en la mondo havas siajn distingilojn kaj ekvivalentojn.

– Jen ekzemple – li klarigis – ĉe ni oni mezuras distancojn per metroj aŭ kilometroj, en Anglujo per futoj, mejloj aŭ coloj, volumenon per galonoj kaj simile. Precize la samo okazas pri nobeltitoloj. Se ĉe ni unu el la titoloj nomiĝas *bejo*, oni ne povas diri, ke la saman nomon ĝi havas en Anglujo, sed ĝia ekvivalento estas la titolo de vicgrafo. La nobel-titoloj – ĉie, kie ili estas uzataj – havas siajn ekvivalentojn en la landoj kun antikva historio. Por tion pruvi, mi citos la decidon de nia Societo, en kiu estas skribite, ke la gesinjoroj el Anglujo aĉetis la titolon „efendio de Xixilla”, al kiu en ilia lando konvenas „vicgrafo”, en Hispanujo „markizo” kaj tiel plu.

Prezentiĝas la demando – parolis la diplomato – kial estis venditaj du vicgrafaj titoloj el la sama provinco? Ĉar – kiel ĉiu infano scias – Albanio distingiĝas per la malmanko de bejoj kaj agaoj. Kaj ĉu simile ne okazas en aliaj landoj? Ĉar kiu kontestos, ke Versajlo, kvankam ĝi estas nur vilaĝeto, posedas grandan kolekton da titoloj, kiujn aĉeti revas ĉiu ĝentlemano? Nur ke ĉi titolojn ankoraŭ neniu proponis al la vendo per aŭkcio ...

Do, ni opinias – parolis la diplomato – ke ni malzorgis nenion. Tamen responde al la okazinta, ni tuj kunsidigis la Estraron kaj – por eviti similajn incidentojn en la estonteco kaj por defendi la bonan nomon de la Societo kaj ĝian mision – ni decidis senvalidigi la titolon de la ĝentlemano el Nov-Zelando, redonante la pagitan sumon.

La juĝisto, kiu jam ne povis ĝisatendi la finon de la proceso (kiu cetere estis tute nekomprenebla por li – la civila kodo antaŭvidis nenian paragrafon je simila kazo) tuj akceptis ĉi proponon kaj fermis trankviligita la kunsidon.

Oni devas aldoni, ke la nov-zelandano – malkiel la honora anglo – konfirmis per sia ĝisnuna riproĉinda konduto, ke li tute ne meritis la titolon el la lando, en kiun li venis. Ĉar ne sufiĉis, ke oni repagis la monon pro la perdita titolo, kaj li ankoraŭ postulis la repagon de la vojaĝkostoj kaj de aliaj elspezoj, kiujn li kvazaŭ havis en ĉi tiu „senhomejo” pro la aĉeto de la titolo.

Ĉi tiuj postuloj – laŭ la prezidanto de la Societo – estis plene senbazaj.

– Montru al mi, estimataj gesinjoroj – li tondris indigne – kie en la civilizita mondo, en kiu civitana socio, en kiu lando, kie iam vivis la veraj nobeloj kaj kie hodiaŭ okazas la vendado de nobel titoloj – en kiu el ĉi tiuj lokoj oni antaŭvidas redoni la monon pro la elspezoj de *vagabondoj*! (mi pardonpetas pro la maldeca vorto).

Ŝajnas, ke jena argumento finfine konvinkis la tribunalon, ke ĝi prezentu verdikton pravan kaj justan.

La triumfanta anglo tute ne ekkonis la paragrafon pri publika ofendo. Ĉar neniu el la kampuloj povis atesti, kion li efektive diris. Do, tiu angla vicgrafo kontentigis sin per la honora venko, akceptante la verdikton de la tribunalo kiel omaĝon al lia civila kuraĝo kaj kiel provon rehavigi al li la dignon.

Por eviti incidentojn kompromitajn al la klopodoj restarigi grandajn valorojn, la Societo por la Renaskigo de la Naciaj Valoroj Spiritaj decidis, post la fino de la proceso, ĉesigi la vendadon de nobelaj titoloj, do fermi la mallongan, sed profitodonan ĉapitron de sia ekzisto. De tiam la Societo okupiĝis pri alia agado, skribita en la Statuton – pri kopiado de historiaj blazonoj aŭ de aliaj naciaj simboloj.



elalbanigis **Bardhyl Selimi** (Albanio)

Pearl S. Buck (1892-1973)



Vento orienta – Vento okcidenta (2)

Ĉapitro 3

Adiaŭinte la domon de mia patrino, mi paŝis en la grandan ruĝan seĝon per kio oni portis min al la hejmo de mia edzo, mi eĉ ne imagis ke mi ne povus plaĉi al li. Koncerne min, mi memoris

aŭtorino, Pearl S Buck

kaj ĝojis ke mi estas malalta kun delikata ostaro, kun ovala vizaĝo kiu plaĉas al aliaj homoj. Almenaŭ en tio mi ne trompus liajn esperojn.

Dum la vinceremonio, mi ŝtelrigardis lin el malsupre de la ruĝa, silka franĝo de mia vualo. Jen li staris en siaj rigidaj, nigraj, fremdaj vestaĵoj. Li staris alte kaj rekte kiel juna bambuo. Mia koro fariĝis frida kaj varma samtempe. Mi sopiris al lia sekreta rigardo. Sed li ne turnis siajn okulojn por travidi mian vualon. Ni kune trinkis tasojn da vino. Ni riverencis antaŭ la tabeloj de la prauloj. Mi genuiĝis kun li antaŭ liaj respektindaj gepatroj. Mi fariĝis ilia filino, forlasinte por ĉiam mian propran familion kaj klanon. Li neniam rigardis al mi.

Tiun nokton, post la fino de festado kaj ŝerca ridado, mi sidis sola sur la sofo en la fianĉina ĉambro. Timo suferigis min. La horo kiun mi imagis kaj timis kaj pri kiu mi sopiris dum mia tuta vivo estis veninta; la horo kiam mia edzo por la unua fojo rigardus mian vizaĝon kaj ni estus solaj. Miaj fridaj manoj estis premitaj unu kontraŭ la alia sur miaj genuoj. Tiam li eniris aspektante alta kaj sombra en tiuj malhelaj, fremdaj vestaĵoj. Li tuj venis al mi kaj silente suprenigis la vualon for de mia vizaĝo kaj longe rigardis min. Tiel li agnoskis min. Tiam li prenis unu el miaj fridaj manoj. La saĝo de mia patrino instruis jene:

“Estu frida pli ol varma. Estu la penetranta gusto de vino pli ol la troigita dolĉeco de mielo. Tiam lia deziro neniam mankos.” Tial mi hezitis doni al li mian manon.

Tujtute li retiris sian manon kaj rigardis min silente. Tiam li komencis paroli kun

alta seriozeco. Unue mi ne povis kompreni liajn vortojn pro lia miriga voĉo en miaj oreloj, – trankvila, profunda, vira voĉo kiu ruĝigis mian korpon pro sinĝeno. Kiam mi kaptis liajn vortojn ili surprizis min. Kion tio signifas?

“Oni ne povas supozi ke vi estus allogita al mi, kiun vi ekvidas je la unua fojo, kiel ankaŭ mi neniam vidis vin antaŭe. Oni devigis nin ambaŭ akcepti ĉi tiun geedziĝon. Ni estis senhelpa en ĉi tiu afero ĝis nun. Tamen, nun ke ni estas solaj, ni povas krei nian vivon laŭ niaj propraj deziroj. Mi mem volas sekvi la modernajn manierojn. Mi volas rigardi vin ĉiel kiel mian egalulon. Mi neniam devigos vin fari ion ajn. Mi ne posedas vin; vi ne estas mia posedaĵo. Vi povas esti mia amikino, se vi volas.”

Tiuj estis la vortoj, kiujn mi aŭdis je mia edziĝnokto. Mi unue estis tiel mirigita, ke mi ne komprenis ilian signifon. Mi estu lia egalulo? Sed kial? Ĉu mi ne estis lia edzino? Se mi ne ricevus ordonojn de li, do de kiu? Ĉu li ne estis mia laŭleĝa mastro? Neniu devigis min edziniĝi kun li, sed kion mi povus fari se mi ne edziniĝus? Kaj kiel mi povus edziniĝi krom laŭ la aranĝoj de miaj gepatroj? Al kiu mi povus edziniĝi se ne al la viro al kiu mi estis fianĉinigitaj dum mia tuta vivo. Ĉio funkciis laŭ nia tradicio. Mi ne komprenis en kiu senco mi estis devigita.

Tiam liaj vortoj refoje brulis en miaj oreloj. “Oni devigis nin ambaŭ akcepti ĉi tiun geedziĝon.” Subite mi febliĝis pro timo. Ĉu li volis diri, ke li ne volis fariĝi mia edzo?

Ho Fratinjo, kia angoro, kia amara doloro!

Mi komencis tordi la manojn sur miaj genuoj kaj ne aŭdacis paroli, ĉar mi ne sciis kiel respondi. Li metis unu manon sur miajn du, kaj ni silentis dum iom da tempo. Sed mi nur deziris, ke li forprenu sian manon. Mi sentis liajn okulojn sur mia vizaĝo. Fine li parolis, lia voĉo estis mallaŭta kaj amara.

“Estas kiel mi timis. Vi ne volas kaj ne povas montri al mi vian veran menson. Vi ne aŭdacas distanciĝi de tio instruita al vi pri kion vi devus diri kaj fari en nia nuna situacio. Aŭskultu min. Mi ne petas vin paroli. Sed mi petegas unu etan geston. Se vi estas ema provi la novan vojon kun mi, klinu vian kapon iomete suben.”

Li atente observis min; mi povis senti la konstantan premon de liaj manoj. Kion tio signifis? Kial la aferoj ne povus sekvi la kutiman vojon? Mi pretis esti lia edzino. Mi deziris esti la patrino de filoj. Ho tiam, pro mia malfeliĉo, mi spertis tiun pezon, kiu neniam forlasas min tage aŭ nokte. Mi ne sciis kion fari. Kaj pro mia malespero kaj nescio mi klinis la kapon.

“Mi estas dankema”, li diris ekstarante kaj forprenante sian manon. “Ripozu trankvile en ĉi tiu ĉambro. Memoru ke vi havas nenion por timi, nek nun, nek estontece. Trankviliĝu. Ĉi-nokte mi dormos en la apuda ĉambreto.”

Li turnis sin rapide kaj foriris.

Güanjin,¹ Diino de Mizerikordo, kompatu min, kompatu min, infanon kiel mi, tiel terorigita pro mia soleco! Neniam mi dormis aliloke for de mia hejmo, kaj nun kuŝas sola, fine konsciante, ke mi ne trovis favoron en liaj okuloj.

Mi kuris al la pordo pensante en mia frenezo, ke mi povus eskapi kaj reiri al la patrino domo. Sed mia mano sur la peza fera stango klarpensis min. Ĉar reiro por mi neniam eblis. Eĉ se pro miraklo mi eskapus tra la nekonataj kortoj de mia nova hejmo, ekzistis ankoraŭ la fremda strato; kaj eĉ se mi trovis mian vojon al la konata pordego, ĝi neniam malfermiĝus por ricevi min. Se mia voĉo kompatigus la maljunan pordiston tiel ke li permesus min stumble eniri la pordon de mia infanaĝo, mia patrino atendus tie kaj sendus min reen al mia devo. Mi povus vidi ŝin nepetegeblan, mornan, ordonantan mian tujan reiron al la domo de mia edzo. Mi ne plu apartenis al ŝia familio.

Mi malrapide forprenis mian nuptorobon, faldis kaj formetis ĝin. Mi sidis dum longa tempo je la rando de la granda kurtenita lito timante retiriĝi en la ombbron ene. Liaj vortoj freneze kaj sensignife turniĝis en mia menso. Fine larmoj plenigis miajn okulojn kaj mi kuŝe kaŭris sub la litkovrilo kaj plorsingultis dum lacigaj horoj ĝis maltrankvila, malprofunda dormo min venkis.

Kiam mi vekiĝis je krepusko mi unue estis mirigita pri la fremda ĉambro, sed tuj frapis min mizeraj rememoroj. Haste mi leviĝis kaj vestiĝis. Kiam la servistino envenis kun varma akvo, ŝi ridetis kaj scivole ĉirkaŭrigardis. Mi rektiĝis. Mi estis feliĉa ke mi lernis la dignon de mia patrino. Almenaŭ neniuj devus scii, ke mi ne plezurigis mian edzon. Mi diris:

“Prenu la akvon al via mastro. Li vestiĝas en la interna ĉambro.”

Mi vestiĝis fiere en karmezina brokaĵo kaj pendigis oron en miajn orelojn.

Tutan lunmonaton da tagoj pasis ekde nia renkontiĝo. Fratinjo! Mia vivo estas konfuzo kun strangaj okazintaĵoj.

Ni translokiĝis for de lia prapatra hejmo! Li ne aŭdacis diri, ke lia honorata patrino estas aŭtokrateca, kaj ke li ne akceptas ke lia edzino estu servistino en la hejmo.

Tio baziĝis sur bagatelajo. Kiam la edziĝfestado estis finita, mi prezentis min al lia patrino jene: Mi leviĝis frue, vokis sklavon por alporti varman akvon, kiun mi verŝis en latunan pelvon, kaj tiam, kun la sklavo antaŭirante, mi iris al la loĝloko de la patrino de mia edzo. Riverence mi diris al ŝi:

“Mi petas ke la honorindulino konsentos refreŝigi sin per banado en ĉi tiu varma akvo.”

Ŝi kuŝis kiel monteca amaso en sia lito sub satenaj, stebitaj litkovriloj. Mi ne aŭdacis levi mian kapon kiam ŝi rektiĝis por lavi la manojn kaj vizaĝon. Fininte, ŝi

¹Güanjin (ĉine: 观音; pinjine: Guānyīn) estas la diino de kompato kaj konsolo. el Vikipedio

gestis al mi senvorte forpreni la pelvon kaj foriri. Mi ne scias ĉu mia mano estis retenita de la pejzaĝo, silkaj kurtenoj de la lito, aŭ ĉu pro timo mia mano tremis, tiel ke kiam mi levis la pelvon ĝi kliniĝis, kaj iom da akvo estis verŝita sur la liton. Mi sentis mian sangon halti pro timo. Mia bopatrino kolere kriis per raŭka voĉo:

“Nu do! Kia bofilino estas tiu!”

Mi sciis ke mi ne devas paroli por senkulpigi min. Tial mi turniĝis portante la pelvon ŝanceliĝante pro la larmoj kiuj blindigis miajn okulojn, kaj foriris de ŝia ĉeesto. Kiam mi eliris el la pordo mia edzo estis tie, preterpasante, kaj mi vidis ke ial li estis kolera. Mi timis ke li kulpigus min, ĉar je tiu unua okazintaĵo mi ne kontentigis lian patrinon. Mi ne povis levi la manojn por forviŝi miajn larmojn, kaj mi sentis ilin akumuliĝi kaj superflui sur la vangoj. Mi murmuris stulte kiel infano:

“La pelfo estis glita.”

Sed li interrompis min.

“Mi ne kulpigas vin. Sed mi ne toleras ke mia edzino okupiĝu pri farenadaĵoj de servistoj. Mia patrino havas cent sklavojn!”

Mi tiam provis diri al li, ke mi deziras montri al lia patrino la obeon, kiun mi ŝuldas al ŝi. Mia patrino zorge instruis min pri tiuj komplezoj, kiujn bofilino ŝuldas al la patrino de sia edzo. Mi leviĝas bonmaniere kaj restas staranta en ŝia ĉeesto. Mi kondukas ŝin al la plej honora seĝo. Mi tralavas ŝian tebovlon kaj malrapide enverŝas la freŝe infuzitan teon kaj zorge prezentas ĝin per ambaŭ manoj. Mi nenion rajtas rifuzi al ŝi. Mi devas ami ŝin kiel mian propran patrinon; kaj ŝiajn kritikojn, kiel ajn maljustajn, mi devas silente elteni. En ĉio mi submetiĝas al ŝia volo. Sed lia decidemo estis neŝancelebla. Li atentis al neniu el miaj vortoj.

Oni ne supozu, ke la translokiĝo okazis facile. Liaj gepatroj eĉ ordonis lin resti en la praula domo laŭ la praktikado. Lia patro estas klerulo, malalta, malpeza kaj kurbiĝinta pro lernado. Sidante dekstre de la tablo en la familia ĉambro, sub la tabeloj de la prauloj, li karesis sian maldensan, blankan barbon tri foje, kaj diris:

“Mia filo, restu en mia domo. Kio estas mia estas via. Ĉi tie manĝaĵo kaj spaco abundas. Vi neniam bezonos damaĝi vian korpon per fizika laboro. Pasigu viajn tagojn en digna libertempo kaj studado laŭplezure. Permesu ke tiu, la bofilino de via honorinda patrino, nasku filojn. Tri generacioj de viroj sub unu tegmento plaĉas al la ĉielo.”

Sed mia edzo estas vigla kaj senpacienca. Nehaltante por riverenci al sia patro li kriis:

“Sed mi volas labori, mia patro! Mi estas trejnita al scienca profesio, la plej nobla en la okcidenta mondo. Kio rilatas al filoj, ili ne estas mia unua deziro. Mi volas realigi la fruktojn de mia cerbo por la bono de mia lando. Ordinara hundo povas plenigi la teron per la frukto de sia korpo!”

Mi mem, kaŝrigardante tra la bluaj kurtenoj ĉe la pordo, aŭdis la filon tiel paroli al sia patro, kaj tio hororigis min. Se li estus la plej aĝa filo, aŭ se li estus edukita laŭ la malnovaj manieroj, li neniam povus kontraŭi sian patron tiel. La jaroj kiujn li pasigis en tiuj landoj, kie junuloj ne honorigas maljunulojn, rabis lin de lia filia obeemo. Agnoskite ke li parolis afablajn vortojn al siaj gepatroj ĉe la foriro; li promesis al ili, ke li havos la koron de filo por ĉiam. Ĉiukaze, ni translokiĝis.

Ĉi tiu domo similas al nenio, kion mi vidis antaŭe. Ĝi ne havas korton. Estas nur eta kvadrata vestiblo tra kiu oni atingas la aliajn ĉambrojn, kaj de kie kruta ŝtuparo supreniras. La unua fojo kiam mi grimpis la ŝtuparon mi timis reveni malsupren pro la kruteco, al kiu miaj piedoj ne estis al kutimiĝintaj. Mi do sidiĝis kaj glitis de ŝtupo al ŝtupo, alkoĉante min al la ligna balustrado. Mi vidis poste, ke iom da freŝa farbo estis ŝmirita sur mian mantelon, kaj mi haste alivestiĝis, tiel ke mia edzo ne demandu min pri tio kaj ridu pri mia timo. Li ridas facile kaj subite kun granda bruo. Mi timas lian ridadon.

La arango de la mebloj perpleksigis min. Mi ne sciis kiel loki ilin en tia domo. Ne estis spaco por io ajn. Mi kunportis el la patrino domo, kiel parto de mia doto, tablon kaj seĝojn el solida tektono kaj liton grandan kiel la nuptolito de mia patrino. Mia edzo metis la tablon kaj seĝojn en duarangan ĉambron kiun li nomis “manĝoĉambro”, kaj la grandega lito, kiu laŭ mia penso estus la naskiĝloko de miaj filoj, tute ne taŭgas por unu el la superaj ĉambroj. Mi dormas sur bambua lito kiel tiu de servisto, kaj mia edzo dormas sur fera lito mallarĝa kiel benko, kaj eĉ en alia ĉambro. Mi ne povas al kutimiĝi al tiom da strangaĵoj.

En la ĉefa ĉambro, aŭ kion li nomas la “salono,” li metis seĝojn kiujn li mem aĉetis; ili estas strangaj misformitaĵoj, neniuj kiel la alia, kaj iuj estas eĉ faritaj el ordinaraĵoj kanoj. En la centro de la ĉambro li metis malgrandan tablon kaj sur ĝin li metis tukon el ponĝeo,² kaj aldone kelkajn librojn. Terure malbela!

Sur la muroj pendis enkadritaj fotoj de liaj kunstudentoj kaj kvadrata peco da felto ŝtofo kun fremdaj literoj sur ĝi. Mi demandis lin ĉu ĝi estas lia diplomo, kaj li multe ridis. Li tiam montris al mi sian diplomon. Ĝi estis streĉita haŭto kun surskribitaj, strangaj, nigraj skrib-signoj. Li indikis sian nomon sekvita de malrektaj signoj. La unuaj du signifis lian grandan altlernejon, kaj la du postaj atestis lian kapablon kiel kuracisto en la Okcidenta medicino. Mi demandis, ĉu tiuj signoj estis samvaloraj kiel nia tradicia Hanlin,³ kaj li refoje ridis kaj diris ke tio nekompareblas. Tiu

² ponĝeo – Japanorigina, tre supla ŝtofo el lano k floksilko. PIV

³ La Hanlin-Akademio (ĉine: 翰林院; pinjine: Hànlín Yuàn) estis akademia kaj administra institucio fondita en la oka jarcento de la imperiestro Xuanzong. Membreco en la akademio estis limigita al elita grupo de fakuloj, kiuj plenumis sekretariajn kaj literaturajn taskojn por la kortego. el Vikipedio

diplomo estas enkadrita malantaŭ vitro kaj pendas en la honora loko sur la muro, kie en la gasthalo en la domo de mia patrino troviĝas la majesta pentraĵo de la maljuna imperiestro de la dinastio Ming.

Sed kia hida Okcidenta domo! Kiel, mi pensis, mi povus senti ke ĝi estas mia hejmo? La fenestroj havas vitron anstataŭ ĉizitan latison kun diafana rizpapero. La intensega sunlumo glimas sur la blankajn murojn kaj videbligas ĉiun eron da polvo sur la mebloj. Mi ne estas al kutimiĝinta al tiu senkompata lumo. Se mi tuŝas vermiljonon al miaj lipoj kaj glatan rizpulvoron sur miajn brovojn kiel oni instruis al mi, tiu lumo malkaŝas ĉion tiel ke mia edzo diras:

“Mi petas vin, ne por vin tiel por mi. Plaĉas al mi kiam virinoj aperas naturaj.”

Sed ne profiti de la moleco de pudro kaj de la varmece de vermiljono signifas neglekti la ilojn, kiuj emfazas belecon. Tio estus kvazaŭ mi konsiderus mian hararon esti kombita sen doni al ĝi la finan glatigon per oleo, aŭ se mi metus miajn piedojn en ŝuojn kiuj ne estas broditaj. En ĉina domo la lumo estas mildigita de latiso kaj skulptaĵoj kun la efekto ke ĝi milde trafas la vizaĝojn de virinoj. Kiel mi povas aperi bela al mia edzo en tia domo?

Plue tiuj fenestroj estas sensencaĵo. Mia edzo aĉetis blankan ŝtofon kaj petis min fari kurtenojn, kaj mi miris, ke unue oni faras truon en muro kaj poste enmetas vitron kaj tiam oni kovras la vitron per ŝtofo!

Koncerne la plankojn, ili estas lignaj, kaj la fremdaj ŝuoj de mia edzo klakas je ĉiu paŝo. Tiam li aĉetis pezan lanaĵon kun flora dezajno kaj metis ĝin sur la plankojn en grandaj kvadratoj. Tio mirigis min multe. Mi timis ke ni makulos ĝin aŭ ke la servistoj forgesos kaj kraĉos sur ĝi. Sed li tre koleris kiam mi menciis tion, kaj li diris ke li ne permesos kraĉadon sur la plankon.

“Kien do, se ne sur la plankojn?” mi demandis.

“Ekstere, se nepras”, li respondis koncize.

Sed tio malfacilis por la servistoj, kaj eĉ mi kelkokaze forgesis kaj elkraĉis la ŝelojn de akvomelonoj semoj sur la lanaĵon. Tiam li aĉetis etajn malaltajn ujojn por ĉiu ĉambro kaj devigis nin uzi ilin. Strange, ĉar li mem uzis naztukon kaj eĉ remetis ĝin en sia poŝo. Kia abomeninda Okcidenta kutimo!

Ĉapitro 4

AJ-JA, estas horoj en kiuj mi emus fuĝi se mi povus trovi la rimedojn. Sed mi ne aŭdacas paŝi antaŭ la vizaĝo de mia patrino en tiaj cirkonstancoj, kaj mi ne povas iri aliloken. La tedaj tagoj pasas malrapide – longaj solecaj tagoj. Ĉar li laboras kvazaŭ li estus laboristo kiu devas gajni sian rizon, dum li vere estas filo de riĉa funkciulo. En la frua mateno, antaŭ ol kolektiĝis la tuta suna varmo por la tago, li jam estas for al sia laboro kaj mi restas sola en la domo ĝis vespero. En la kuirejo estas nur la

strangaj servistoj, kaj mi hontas aŭskulti al ilia klaĉado.

Ve al mi, iam kaj iam mi pensas ke estus pli bone servi lian patrinon kaj loĝi en la kortoj kun miaj bofratinoj! Almenaŭ mi aŭdus voĉojn kaj ridadon. Ĉi tie la silento pendas super la domo kiel nebuleto dum la tuta tago.

Mi povas nur sidi, pensi kaj revii pri kiel kapti lian koron!

En la mateno mi leviĝas frue por prepari min antaŭ ol aperi antaŭ li. Eĉ se mi ne dormis pro maltrankvileco en la nokto, mi leviĝas frue kaj lavas la vizaĝon en vaporanta, parfumita akvo kaj glatigas ĝin per oleoj kaj parfumoj, sopirante surprizi lin en la mateno kaj kapti lian koron. Tamen, kiom frue mi leviĝas, li ĉiam jam sidas ĉe sia tablo kaj studas.

Ĉiu tago samas. Mi tudas mallaŭte, kaj leĝere turnas la rondan klinkon de lia pordo. Ho tiuj strangaj, malmolaj bulboj, kiel mi devis turni kaj turni ilin multfoje por lerni ilian sekreton! Li estas senpacienca kun mia fuŝpalpado kaj tial mi ekzercas min pri tio dum lia foresto. Sed eĉ tiam, kelkokaze dum la frua mateno, miaj fingroj elglitas sur la glata porcelano, kaj mia koro malkuraĝiĝas kiam mi provas hasti. Li abomenas lantecon kaj kiam li marŝas lia korpo estas tiel rapidmova, ke mi timas ke li lezos sin.

Sed li faras nenion por protekti sian korpon. Tagon post tago kiam mi prezentas al li teon en la frideto de la mateno, li akceptas ĝin sen levi siajn okulojn for de la libro. Kio utilas do, ke je krepusko mi sendis serviston por aĉeti freŝan jasmenon por mia hararo? Eĉ tiu aromo ne ŝteliras tra la paĝoj de la fremdlanda libro. Dum dek unu matenoj el dek du, kiam mi revenas dum lia foresto por vidi ĉu li trinkis sian teon, mi konstatas ke li ne movis la kovrilon de la bovlo kaj la tefolioj flosas nemoviĝinte en la pala likvo. Li interesiĝas pri nenio krom siaj libroj.

Mi cerbumis pri ĉio, kio laŭ la patrino instruo povas plaĉi al mia edzo. Mi preparis bongustajn manĝaĵojn por amuzi lian buŝon. Mi sendis serviston, kaj li aĉetis kokidaĵon freŝe buĉitan kaj bambuajn ŝosojn de Hangĝoŭo kaj mandarenan fiŝon⁴ kaj zingibron kaj brunan sukeron kaj saŭcon de sojfaboj. La tutan matenon mi preparis tiujn pladojn kaj forgesis nenion, kion oni diris al mi pri kiel pliiĝi la riĉecon kaj delikatecon de la gusto. Preparinte ĉion mi ordonis, ke oni enportu ĉion je la fino de la manĝo, tiel ke li ekkrios:

“Ho, la plej bono estis rezervita ĝis la fino. Ĝi estas manĝaĵo digna de imperiestro!”

“Sed kiam la pladoj venis li akceptis ilin senkomente kiel parto de la manĝo. Li apenaŭ gustumis ilin kaj ne laŭdis ilin. Mi sidis kaj fervore rigardis lin, sed li diris

⁴ Mandarena fiŝo aŭ ĉina perko (Siniperca chuatsi) estas tre populara manĝaĵo en Ĉinio. Ĝia nomo

(鳊鱼) aperas en multaj ĉinaj poemoj kaj libroj. el Vikipedio

nenion, manĝante la bambuajn ŝosojn kvazaŭ ili estus brasiko el kamparana ĝardeno!

Tiun nokton, kiam la doloro de mia elreviĝo pasis, mi diris al mi mem:

“Li tiel reagis ĉar tio ne estas lia plej ŝatata plado. Pro tio ke li neniam parolas pri siaj preferoj mi komunikos kun lia patrino kaj demandas kion li ŝatis dum lia junaĝo.

Mi do sendis serviston, sed la patrino de mia edzo respondis:

“Antaŭ ol li transvojaĝis la kvar marojn, li amis brune rostitan anasajon trempitan en gelatenajo de sovaĝa rozfrukta saŭco. Sed pro lia multjara manĝado de la barbara kaj duonkuirita nutraĵo de la Okcidentaj popoloj, li perdis sian guston kaj ne plu ŝatas delikatan kuiraĵon.”

Mi tial ne plu provis. Mia edzo nenion deziras de mi. Li nenion bezonas, kiun mi povas doni al li.

Unu vesperon post duonmonato en la nova domo ni sidis kune en la salono. Li estis leganta unu el siaj grandaj libroj kiam mi eniris, kaj mi ekrigardis la bildon sur la paĝo dum mi preterpasis al mia seĝo, kaj mi vidis ke estis vertikala homa formo, sed je mia hororo, sen haŭto, nur la sanga karno! Mi estis ŝokita kaj miris, ke li legas tiaĵon, sed mi ne aŭdacis demandi lin pri tio.

Mi sidis tie en unu el la kuriozaj kanseĝoj, neapogante la dorson, ĉar ŝajnis esti maldigna ripozi tiel publike. Mi sopiris pri la hejmo de mia patrino kaj memoris ke je ĉi tiu horo, en la flagranta kandellumo, ili grupiĝas por la vespermanĝo, la konkubinoj kun siaj bruantaj infanoj. Mia patrino estas sur sia loko ĉe la kapo de la tablo, kaj la servistoj sub ŝia direkto prezentas bovlojn da legomoj kaj vaporanta rizo kaj disdonas manĝbastonetojn por ĉiuj. Ĉiu feliĉe okupas sin pri la manĝaĵo. Mia patro eniros kutime post la manĝo kaj ludos iomete kun la infanoj de la konkubinoj, kaj fininte sian laboron la servistoj sidos sur etaj taburetoj en la korto, kune flustrante dum la krepusko. Mia patrino reguligas la kontojn kun la ĉefkuiristo ĉe la manĝotablo, en la flagranta lumo de alta ruĝa kandel.

Ho, mi sopiregis esti tie! Mi promenis inter la floroj kaj ekzamenis la lotusguŝojn por vidi ĉu ĝiaj semoj estas maturaj. Tio estis en la malfrua somero kaj preskaŭ tempo por ilia maturiĝo. Eble kun la leviĝanta luno mia patrino petus min preni mian harpon por ludi la muzikon, kiun ŝi amas; la dekstra mano ludante la melodion, la maldekstra akompanante en minora gamo.

Instigita per tiu penso mi leviĝis por preni mian instrumenton. Mi forprenis ĝin zorge el la lakita ujo sur kiu troviĝas, inkrustita je perlamoto, ok figuroj de la spiritoj de muziko. Sur la harpo mem, pecoj de diversaj lignospecoj estas kunmetitaj sub la kordoj; ĉiu peco da ligno aldone variigas la riĉecon de la notoj kiam la fingroj glitas sur la kordojn. La harpo kaj ĝia ujo antaŭe apartenis al la patrino de mia patro, kaj ŝia patro venigis ĝin el Kantono kiam ŝi ĉesis plori pri la piedobindado.

Mi milde tuŝis la kordojn. Ili eligis leĝeran melankolian sonon. Tiu harpo estas la

pratipa harpo de mia popolo, kaj oni ludu ĝin sub la arboj en la lunlumo apud trankvila akvo. Tie ĝi eligas dolĉan feinan voĉon. Sed en ĉi tiu silenta, fremdlanda ĉambro ĝi estis sufokita kaj febla. Mi hezitis kaj tiam ludis kanteton el la tempo de Song.

Mia edzo levis la rigardon.

“Tio estas tre beleta”, li diris afable. “Mi ĝojas, ke vi scipovas ludi tion. Mi iam aĉetos pianon por vi kaj vi lernos ludi ankaŭ la okcidentan muzikon.” Tiam li ree atentis sian legaĵon.

Mi rigardis lin, dum li legis tiun timtremigan libron, kaj daŭrigis tre leĝere tuŝi la kordojn sen scii kion ili kantis. Mi neniam eĉ vidis pianon. Kion mi farus kun tia fremdaĵo? Tiam subite mi ne plu povis ludi. Mi formetis la harpon kaj sidis kun pendanta kapo kaj nenionfarantaj manoj.

Post longa silento mia edzo fermis la libron kaj rigardis min penseme.

“Kŭei Lan”, li diris.

Mia koro saltis. Tio estis la unua fojo, ke li vokis min per mia nomo. Kion li finfine diros al mi? Mi time levis miajn okulojn por rigardi lin. Li daŭrigis:

“Ekde nia geedziĝo mi deziris demandi vin, ĉu vi ne volas malbindi viajn piedojn? Tio estas malsaniga por via tuta korpo. Vidu, viaj ostoj aspektas tiel.”



Li prenis kraĵonon kaj haste skizis sur folio en sia libro, teruran, nudan, kripligitan piedon.

Kiel li sciis tion? Mi neniam vestis miajn piedojn dum lia ĉeesto. Ni ĉinaj virinoj neniam malkaŝas niajn piedojn al la vido de aliuloj. Eĉ nokte ni portas ŝtrumpojn el blanka ŝtofo.

“Kiel vi scias?” mi spiregis.

“Ĉar mi estas kuracisto trejnita en la Okcidento”, li respondis. “Kaj aldone mi deziras, ke vi malbindu ilin, ĉar ili ne estas belaj. Krome, piedbindado ne plu estas laŭmoda. Ĉu tio konvinke tuŝas vin?” Li iom ridetis kaj rigardis min en maniero ne malafabla.

“Sed mi haste tiris la piedojn sub mian seĝon. Frapis min liaj vortoj. Ne estas belaj? Mi ĉiam fieris pri miaj etaj piedoj! Dum mia tuta infanaĝo mia patrino mem kontrolis la trempadon en varma akvo kaj la bindadon de la bandaĝo, ĉiam pli strikta ĉiutage. Kiam mi ploris pro doloro ŝi petis min memori, ke iutage mia edzo laŭdos la belecon de miaj piedoj. Mi mallevis la kapon por kaŝi miajn larmojn. Mi pensis pri ĉiuj tiuj senripozaj noktoj kaj tagoj kiam mi ne povis manĝi kaj havis neniun emon ludi kiam mi sidis ĉe la rando de mia lito kaj lasis miajn kompatindajn piedojn svingpendi por kontraŭi la pezon de la sango. Sed nun suferinte ĝis la doloro ĉesis antaŭ nur unu mallonga jaro mi eksciis, ke mia edzo taksis ilin malbelaj!

“Mi ne povas”, mi diris per sufoka voĉo dum mi leviĝis nepovante reteni miajn larmojn. Mi forlasis la ĉambron.

Tio ne estis ĉar mi tro ŝatis miajn piedojn. Sed eĉ se miaj piedoj en siaj arte broditaj ŝuoj ne trovis favoron en liaj okuloj, kiel mi povis esperi gajni lian amon?

Du semajnojn poste mi entreprenis la unuan viziton al la hejmo de mia patrino laŭ nia ĉina kutimo. Mia edzo ne plu menciis la malbindadon de miaj piedoj. Kaj li ne plu alparolis min per mia nomo. (*daŭrigota*)



elangligis **Detlef Karthaus** (Kanado)

Fratoj Grimm



aŭtoroj, Fratoj Grimm

Sep korvoj

Viro havis sep filojn, sed ankoraŭ ne filinon, egale kiom forte li deziris ŝin. Fine lia edzino regravediĝis kaj esperigis lin pri infano, kaj kiam la bebo naskiĝis, estis efektive knabino. La ĝojo estis granda, sed la bebo estis apenaŭ vivkapabla kaj malgranda, kaj pro ties malforteco oni volis ĝin bapti pro bezono. La patro rapide sendis iun el la knaboj al la fonto por alporti la baptan akvon. La ses aliaj kunkuris, kaj ĉar ĉiu el ili

volis ĉerpi kiel la unua la akvon, falis la kruĉo en la puton. Jen ili staris kaj ne sciis kion fari, kaj neniu el ili kuraĝis iri hejmen. Kiam ili tute ne revenis, la patro fariĝis senpacienca kaj diris: „Certe ili denove forgesis la akvon pro la ludado, tiuj sendiaj buboj.“ La patro ektimis, ke la knabino devos morti sen baptito kaj ĉagrenigite li vokis: „Mi dezirus, ke la knaboj ĉiuj fariĝus korvoj.“

Apenaŭ li diris tion, li aŭdis flugilan flirtadon super sia kapo, li rigardis en la alton kaj vidis leviĝi kaj forflugi sep karbe nigrajn korvojn.

La gepatroj ne povis ŝanĝi la malbenon. Kaj kiom ajn malgajaj ili estis pri la perdo de siaj filoj, ili tamen iel konsoliĝis pro la kara filineto, kiu baldaŭ kolektis fortojn kaj ĉiutage fariĝis pli bela. Dum longa tempo ŝi eĉ ne sciis, ke ŝi havis iam fratojn, ĉar la gepatroj gardis sian langon menciit tian, ĝis kiam ŝi iutage aŭdis homojn paroli pri si mem, ke la knabino ja estas bela, sed ke ŝi fakte kaŭzis la malfeliĉon de siaj sep fratoj. La knabino fariĝis tute malĝoja, iris al la gepatroj kaj demandis ilin, ĉu ŝi havas fratojn kaj kie ili estas. Nun la gepatroj ne plu povis prisilenti la sekreton, sed ili diris, ke tio estis la destino de la ĉielo, kaj ke ŝia naskiĝo nur hazarde okazis samtempe. Tamen la knabino ĉiutage havis konsciencajn riproĉojn pro la fratoj kaj imagis, ke ŝi devos elaçeti ilin. Ŝi ne trovis trankvilon kaj ripozon, ĝis kiam ŝi sekrete forŝteligis por iri en la vastan mondon kaj trovi ie siajn fratojn kaj liberigi ilin, egale kiom tio kostos al ŝi. Ŝi kunprenis nenion krom ringeton de la gepatroj kiel

memoraĵon, panbulton kontraŭ la malsato, akvokruĉeton kontraŭ la soifo, kaj seĝeton kontraŭ la laceco.



Nun ŝi iris kaj iris pli kaj pli malproksimen ĝis la fino de l' mondo. Jen ŝi venis al la suno, sed tiu estis tro varmega kaj terura kaj manĝis infanetojn. Rapide ŝi forkuris kaj iris ĝis la luno, sed tiu estis tro frida kaj ankaŭ kruela kaj malica, kaj kiam ĝi rimarkis la infanon, ĝi diris: „Mi odoras, ja odoras homviandon.“

Ŝi rapide forkuris kaj venis al la steloj. Ili estis afablaj kaj bonaj, kaj ĉiu stelo sidis sur sia speciala seĝeto. La matenstelo ekstaris, donis al ŝi krueton

de juna kokino kaj parolis: „Se vi ne havas la krueton, vi ne povos malfermi la vitromonton, kaj tie en la vitromontro estas viaj fratoj.“

La knabino prenis la krueton, volvis ĝin zorgeme en tuketon kaj foriris, ĝis kiam ŝi atingis la vitromonton. La pordego estis fermita, tial ŝi volis elpreni la krueton, sed kiam ŝi malfaldis la tuketon, ĝi estis malplena, ŝi perdis la donacon de la bonaj steloj. Kion do fari? Siajn fratojn ŝi volis savi kaj ne havis ŝlosilon por la vitromonto. La kara fratino prenis tranĉilon, fortranĉis malgrandan fingron, metis ĝin en la pordegan ŝlosilon kaj bonŝance malŝlosis ĝin. Kiam ŝi estis enirinta, ŝi renkontis nanon, kiu diris: „Infano mia, kion vi serĉas?“

„Mi serĉas miajn fratojn, la sep korvojn“, ŝi respondis. La nano respondis: „La sinjoroj korvoj ne estas hejme, sed, se vi volas atendi tiom longe, ĝis kiam ili venos, enpaŝu.“

Poste la nano enportis la manĝojn de la korvoj, sep teleretojn kaj sep pokaletojn, kaj de ĉiu telereto la fratino manĝis manĝeron, kaj el ĉiu pokaletto ŝi trinkis gluteton, sed en la lastan pokalon ŝi lasis fali la ringeton, kiun ŝi havis ĉe si.

Subite ŝi aŭskultis en la aero flirtadon kaj blovetadon. Jen la nano diris: „Nun la sinjoroj korvoj flugas hejmen.“

Ili aperis, volis manĝi kaj trinki, kaj serĉis siajn teleretojn kaj pokaletojn. Jen unu post la alia diris: „Kiu manĝis de telereto mia? Kiu trinkis el pokaletto mia? Tio estis buŝo de homo.“

Kaj kiam la sepa tuŝis la fundon de la pokaletto, la ringeto ruliĝis renkonte al ĝi. Jen ĝi rigardis ĝin kaj ekkonis, ke ĝi estas ringo de la gepatroj, kaj ĝi diris: „Dio faru, ke nia fratino estu ĉi tie. En tiu okazo ni estus elaĉetitaj.“

Kiam la knabino staranta malantaŭ la pordo kaj orelumanta ilin, aŭskultis la deziron, ŝi alpaŝis, kaj tiumomente ĉiu korvo rericevis sian homan figuron. Ili kareseme brakumis kaj kisis sin reciproke kaj migris gaje hejmen.

Originalo: Die sieben Raben

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Die sieben Raben“

Ruĝĉapulino

Estis iam malgranda dolĉa knabino, kiun amis ĉiu, kiu foje vidis ŝin, sed plej amis ŝin ŝia avino, kiu tute ne sciis, kion ŝi donu al la infano entute. Iam ŝi donacis al ŝi ĉapeton el ruĝa veluro, kaj ĉar ŝi tiel bele aspektis kun ĝi kaj ne plu volis surmeti ion alian krom la ĉapeton, ŝi estis nomata de tiam Ruĝĉapulino. Iutage diris la patrino al ŝi: „Venu, Ruĝĉapulino, jen peco da kuko kaj botelo kun ruĝa vino, tiujn portu al la avino. Ŝi estas malsana kaj malforta, kaj ĝuos tion. Ekiru antaŭ ol fariĝos varmege, kaj se vi iros eksteren, iru tute bonkondukte kaj ne deflankiĝu de la vojo, alie vi falos kaj disrompos la vitron kaj la avino havos nenion. Kaj, kiam vi alvenos en ŝian loĝoĉambron, ne forgesu diri 'Bonan matenon' kaj ne rigardu antaŭe en ĉiujn angulojn.“



„Mi ja faros ĉion tute laŭorde“, diris Ruĝĉapulino al la patrino kaj certigis tion per manpremo. La avino vivis ekstere en la arbaro, duonon de horo surpiede for de la vilaĝo. Kiam Ruĝĉapulino venis en la arbaron, renkontis ŝin la lupo. Sed Ruĝĉapulino ne sciis, kia malica besto ĝi estas kaj ne timis ĝin.

„Bonan tagon, Ruĝĉapulino“, la lupo diris.

Ŝi respondis: „Mi tre dankas, lupo.“

„Kien vi iras tiom frue, Ruĝĉapulino?“

„Al la avino.“

„Kion vi portas sub via antaŭtuko?“

„Kukon kaj vinon, hieraŭ ni bakis, tio bonfartigu la malsanan kaj malfortan avinon kaj fortigu ŝin.“

„Ruĝĉapulino, kie loĝas via avino?“

„Ŝia domo staras, se oni iras surpiede, ankoraŭ iom pli ol kvaronon de horo for de ĉi

tie en la arbaro sub la branĉoj de tri grandaj kverkoj, malsupre estas la nuksoheĝoj, sed tion vi ja ekscios“, respondis Ruĝĉapulino.

La lupo pensis: „La juna delikata estaĵo estas grasa mordaĵo, ĝi gustos ankoraŭ pli bone ol la maljunulino. Mi devos agi ruze por kapti ilin ambaŭ.“

La lupo iris iom da tempo apud ŝi kaj tiam ĝi diris: „Ruĝĉapulino, rigardu foje la belajn florojn, kiuj staras ĉirkaŭe, kial vi ne ĉirkaŭrigardas? Mi pensas, ke vi tute ne aŭdas, kiel ĉarme kantas la birdoj, ĉu? Vi sole iras ja tiel, kvazaŭ vi irus al la lernejo, kvankam estas tiel gaje ekstere en la arbaro.“

Ruĝĉapulino vaste malfermis la okulojn, kaj kiam ŝi vidis kiel la sunradioj inter la arboj dancas tien kaj tien, kaj ĉie troviĝas amaso de belaj floroj, ŝi pensis: „Se mi kunprenos al la avino freŝan florbukedon, tiuokaze tio ĝojigos ŝin; estas tiel frumatene, ke mi tamen venos al ŝi ankoraŭ je la ĝusta tempo.“

Ŝi deflankiĝis de la vojo en la arbaron kaj serĉis florojn, kaj kiam ŝi plukis iun, ŝi opiniis, ke pli malproksime en la arbaro staras ankoraŭ pli bela, kaj ŝi deflankiĝis pli kaj pli de la vojo. Sed la lupro iris rekte al la domo de la avino kaj frapis la pordon.

„Kiu estas ekstere?“

„Ruĝĉapulino, ŝi alportas kukon kaj vinon, malfermu.“

„Nu, premu la klinkon“, vokis la avino „mi estas tro malforta kaj ne povas ekstari.“

La lupro premis la klinkon, la pordo salte malfermiĝis kaj ĝi iris sen diri eĉ vorton, rekte al la lito de la avino kaj voris ŝin. Poste la lupro surmetis ŝiajn vestojn, surkapigis ŝian kufon, kuŝiĝis en ŝia lito kaj fermtiris la kurtenojn antaŭ la liton.

Ruĝĉapulino vagadis pro la floroj, kaj kiam ŝi kolektis tiom da ili, ke ŝi ne plu povis porti pliajn, ŝi rememoris pri la avino kaj ekiris al ŝi. Ŝi miris, ke la pordo estas malfermita kaj kiam ŝi paŝis en la loĝoĉambron, ŝi sentis sin tiel stranga, ke ŝi pensis: „Aĥ, dio mia, kiel timema mi fariĝis, aliokaze mi estas tiel volonte ĉe la avino!“

Ŝi vokis: „Bonan matenon“, sed ŝi ne ricevis respondon. Tial ŝi iris al la lito kaj malfermtiris la kurtenojn. Jen kuŝis la avino kun la kufo profunde tirita sur la vizaĝon, kaj ŝi aspektis tiel nekutime.

„Aĥ, avino, kial vi havas tiajn grandajn orelojn?!“

„Por ke mi povu aŭskulti vin pli bone.“

„Aĥ, avino, kiajn grandajn okulojn vi havas?“

„Por ke mi povu vidi vin pli bone.“

„Aĥ, avino, kiajn grandajn manojn vi havas!“

„Por ke mi pli bone povos kapti vin.“

„Aĥ, avino, kian terure grandan buŝon vi havas?“

„Por ke mi pli bone povu vori vin.“

Apenaŭ la lupro diris tion, li saltis el la lito kaj voris la kompatindan Ruĝĉapulino. Post kiam la lupro jam kontentigis siajn voluptojn, ĝi denove kuŝigis sin en la liton, endormiĝis kaj komencis tre laŭte ronki. Tiumomente preteriris la domon ĉasisto kaj pensis: „La maljunulino ronkas tiom, ke mi devos rigardi, ĉu io mankas al ŝi.“

Li paŝis en la loĝoĉambron, kaj kiam li venis al la lito, li vidis, ke la lupro kuŝas en ĝi. „Nun mi trovas vin ĉi tie, eterna pekulo“, li diris, „mi serĉis vin jam dum longa tempo.“

Nun li volis celi per fusilo al ĝi, sed subite li ekhavis la ideon, ke la lupro eventuale manĝis la avinon, kaj ke ŝi eble ankoraŭ saveblas. Tial li ne pafis, sed prenis tondilon kaj komencis malfermtranĉi la ventron de la dormanta lupro. Kiam li tranĉis kelkfoje, li ekvidis lumi la ruĝan ĉapeton. Post kelkaj pliaj tranĉoj elsaltis la knabino kaj vokis: „Aĥ, kiel mi ektimis, kiom malhele estis en la ventro de la lupro!“

Kaj poste ankaŭ la maljuna avino elvenis vivanta el la lupro kaj apenaŭ povis spiri. Ruĝĉapulino alportis rapide grandajn ŝtonojn. Per tiuj ili plenigis la korpon de la lupro, kaj kiam ĝi vekigis, ĝi volis forsalti, sed la ŝtonoj estis tiel pezaj, ke la lupro tuj falis teren kaj mortis.

Tio plezurigis la triopon; la ĉasisto detiris la felon de la lupo kaj iris kun ĝi hejmen. La avino manĝis la kukon kaj trinkis la vinon alportitan de Ruĝĉapulino, kaj tiel ŝi refortiĝis. Kaj Ruĝĉapulino pensis: „Neniam en mia tuta vivo mi denove deflankiĝos de la vojo kaj kuros en la arbaron, se la patrino tion malpermesis al mi.“

Oni ankaŭ rakontas, ke iam, kiam Ruĝĉapulino denove portis ion bakitan al la avino, alia lupo alparolis ŝin kaj volis ŝin deflankigi de la vojo. Sed Ruĝĉapulino estis memgarda kaj iris plu sur la vojo. Kaj ŝi diris al la avino, ke ŝi renkontis lupon, kiu deziris bonan tagon al ŝi, sed malice rigardis: „Se la renkontiĝo ne estus okazinta meze de la vojo, li estus vorinta min.“

„Venu“, diris la avino, „ni riglos la pordon, por ke ĝi ne envenu.“

Baldaŭ poste frapis la lupo kaj vokis: „Malfermu, estas mi, Ruĝĉapulino. Mi alportas bakitaĵon al vi.“ Sed ili silentis kaj ne malfermis la pordon. Tial la fiulo kun la griza kapo ŝteliris kelkfoje ĉirkaŭ la domon, saltis fine sur la tegmenton kaj intencis atendi, ĝis kiam Ruĝĉapulino vespere iros hejmen, tiam ĝi volis ŝtelire persekuti kaj manĝi ŝin en la malhelo. Sed la avino rimarkis, kion li intencas. Antaŭ la domo staris granda ŝtontrogo. Tial ŝi diris al la infano: „Prenu la sitelon, Ruĝĉapulino, hieraŭ mi kuiris kolbasojn, portadu la akvon, en kiu mi kuiris ilin, al la trogo kaj enverŝadu ĝin.“

Ruĝĉapulino portis tiom ofte la akvon al la ŝtontrogo kaj enverŝis ĝin, ĝis kiam la grandega trogo estis tute plenigita. Jen leviĝis laodoro de la kolbasoj en la nazon de la lupo, ĝi flaris kaj rigardis malsupren. Fine ĝi etendis la kolon tiom, ke li ne plu povis teni sin kaj ekglitis. Tiel li glitis de la tegmento malsupren rekte en la grandegan trogon kaj dronis.

Ruĝĉapulino iris gaje hejmen, kaj neniuj suferigis ŝin.

Originalo: Rotkäppchen

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam



tradukis **Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser** (Germanio)
lingve kontrolis **Vladimir Türk**

Xu Dishan (1893-1941)



aŭtoro, Xu Dishan

Persika Ornjo

La persika ornjo (*Myrtus communis*) estas ĉiamverda arbusto kiu abunde kreskas en montoj kaj sovaĝejoj de Guangdong kaj Fujian. Ĝiaj folioj kreskas laŭ kontraŭa aranĝo. Ĝi floras en somero, kaj ĝiaj ruĝaj floroj estas tre belaj. Post florado ĝi ekhavas rondajn purpurajn fruktojn kiuj similis granatojn. Ĝi apartenas al la planta familio de mirtacoj (Myrtaceae). En tiu familio ankaŭ estas la jambosoj

(*Syzygium jambos*), sonorilfrukto (*Syzygium samarangense*) kaj ia verda frukto kun purpura suko kaj dolĉa gusto kies nomo en kantona estas “kangnimzi” kiujn la knabbovinto ofte plukas por manĝi, sed ĝi ne aperas en bazono.

Kiel mizera estas infano sen patrino! Vidante la malfeliĉaĵojn suferitajn de junaj orfoj, ni sentas ke estas granda bonsorto esti ŝirmata sub protekto de patrino. Nun mi volas diri rakonton pri orfino kiu luktis kontraŭ sia sorto.

En suda Fujian iam vivis la raso “kavuloj”, kies vilaĝoj estis konstruitaj apud kavoj. La tribestro, kiun ili vokis “kavestro”, vivis en la kavo. Plej famaj estis 18 kavoj. La Kavo de Persikoj ne estis inter la 18 famaj kavoj, kie la tribanoj plantis persikujojn. Ili interŝanĝis ĉiajn varojn per persikoj kun tribanoj de aliaj kavoj kaj bone fartis. En la tribo estis familio de juna knabino Ornjo kun sia onklino. En du monatoj post ŝia naskiĝo ŝiaj gepatroj estis en persika arbaro mortigita de tondro. Pro superstiĉo la tribanoj kredis ke la gepatro iel ofendis diojn, kaj rigardis la knabinon kiel malbonaŭgurulinon. Tial en socio neniu amikiĝis kun Ornjo, malgraŭ ŝia beleco. Ŝi neniam partoprenis en la triba balo, pro timo ke aliuloj abomenus ŝin. Ŝi ne rankoris kontraŭ aliuloj. Ŝi havis sian propran laboron. Ĉiun tagon ŝi helpis sian onklinon en teksado. Dum libertempo ŝi iris en la monton por observi belajn insektojn kaj florojn. Vidinte ŝin reveni de la monto kun floroj kovrante sian kapon, aliuloj rigardis ŝin kiel frenezulinon. Ŝi ne zorgis pri tio. Ŝi portis la insektojn kaj florojn hejmen ne por amuzo, sed por observi iliajn vejnojn kiujn ŝi teksos en la tolon. Kia sagaca virino ŝi estis! Ŝia onklino antaŭe ne ŝatis ŝin, pensante ke ŝia veno en la mondo baris la vivojn de ŝiaj gepatroj. Ŝi ofte nenial riproĉis kaj batis ŝin, dirante ke ŝi estus reenkariniĝinto de ia malbona spirito. Tamen ekde kiam ŝiaj

teksaĵoj kun delikataj desegnoj estis ŝatataj de la tribo, kiuj volis interŝanĝi la teksaĵojn per valoraj varoj, la onklino iomete pli bone traktis ŝin, kvankam okaze ŝi ankoraŭ riproĉis kaj batis ŝin.



Ĉar la desegnoj sur la toloj teksitaj de Ornjo ofte renoviĝis kaj ili estis ĉiam belaj, multaj junuloj forgesis ke ŝi estis malbonaŭgurulino. Sur la monto oni povas aŭdi tian kanton:

Vi amu Arĝnjon.

Mi amas Ornjon.

Arĝnjo bele dancas.

Ornjo bele tajlas.

Danco baldaŭ ĉesas.

Veston mi longe surmetas.

Vi amu Arĝnjon.

Mi amas Ornjon.

Arĝnjo estis la influhava filino de la kavestro. Tiu kiu edzigos ŝin estos al venonta kavestro. Tiel en la socio ĉiu montris galantecon al ŝi. Kiel filino de la kavestro, ŝi ne bezonis pene labori. Do ŝi malŝparis sian tempon al kanto kaj danco. Tiel ŝi fariĝis la plej bona dancistino en la tribo. Per sia danco ŝi povis gajigi ĉiun kiu estas malĝoja. Sed la gajigo estas provizora — kiam ŝia danco finis, la malĝojo revenis. Antaŭe Arĝnjo nur aŭdis laŭdojn. Nun venis malamiko de ŝia arto, kaj ŝi ne povis eviti ĵaluzon kontraŭ Ornjo. Ŝi diris al la kavestro ke Ornjo estis vampirino, kiu ĉarmis kaj atencis junulojn per sorĉforto sur siaj teksaĵoj. La kavestro venigis la onklinon de Ornjo, kaj demandis al ŝi, kiel Ornjo povus teksi tolon kiu ĉarmis virojn. Li

ordonis al la onklino forpeli Ornjon. Se ŝi ne forpelus sian nevinon, ŝi devis kune esti forpelita. La onklino ne volis diri la novaĵon al Ornjo, sed tiu jam sciis ĝin.

Ŝi diris: “Onklino, ne kaŝu la fakton de mi. La kavestro volis forpeli min, ĉu ne?”

La onklino ne respondis, sed ŝiaj larmoj falis sur la ankoraŭ ne finteksita tolo.

“Onklino, ne sentu ĉagrenon. Mi havas bonan kaŝejo kien mi povas iri. Vi povas daŭre teksti. Vi scias ke mi per mia tekniko teksis, kaj miaj teksaĵoj ne enhavas sorĉforton, kiun mi ne scipovas. Kiam vi volas vidi min, vi iru sur la monton kaj voku min al tiaj floroj.” Ŝi demetis rozkoloran floron de sia kapo kaj donis ĝin al sia onklino. Poste ŝi iris al la monto portante nenion.

Onklino rapide postkuris ŝin. “Ornjo, almenaŭ donu al mi direkton por serĉi vin.” Ornjo bone konis la geografion de tiu monto. Ŝi sciis ke inter tiuj rozkoloraj floroj estis multaj bongustaj fruktoj. Plue ŝi trovis tie kaveton je la grandeco de homo en kiu ŝi jam metis multajn de ŝi teksitajn tolojn por si ripozi. Neniu alia sciis tiun sekreton.

Post kelkaj tagoj la tribanoj malkovris ke Ornjo malaperis. Ili enketis kaj trovis ke estis kanto kiu koleris Arĝnjon, kiu forpelis Ornjo. Do la junuloj refoje kantis:

Ni malamas Arĝnjon.

Ni sopiras Ornjon.

La mensogo de Arĝnjo

ne povas nuligi la desegnojn

sur la toloj de Ornjo.

Mensogo malpurigis ŝin mem.

Desegnoj estas je restem’.

Ni malamas Arĝnjon.

Ni sopiras Ornjon.

Revenu! Faru vestojn por ni,

ho nia kara Ornjo!

Aŭdinte ĉie la rankorantan kanton kontraŭ si, Arĝnjo koleris. Ŝi ne povis riproĉi iun, ĉar Ornjo estis for, kaj tiam la tiea kutimo ne malpermesis la tribanojn esprimi sian senton per kantoj. La kavestro ankaŭ estis surprizita pro la ŝato al Ornjo de la junuloj. Li venigis la maljunulojn por gajni informojn pri Ornjo. Ili diris ke Ornjo estas sagaca laborema kaj deca junulino. Ŝia sola malmerito estis ke ŝiaj gepatroj estis mortigitaj de tondro. Tia knabino en la tribo facile instigas kverelon, ĉar ĉiu amas ŝin. Ŝia forpelo estis saĝa decido. La kavestro do trankviliĝis.

Vetero malboniĝas. Tempesto daŭris kelkdek tagojn, kaj tondro ĉiun tagon ĉirkaŭis la persikarbaron. Ĉar persiko estis la sola rimedo de la tribanoj, ili konstante anksiĝis, pro timo ke la persikaj arboj estus eltirataj de vento aŭ drivigataj de pluvo.

Tamen anstataŭ protekti la arbojn, ili metis la vestojn farita de Ornjo ĉe sekurejo. La kavestro demandis, kial ili pli valoras la vestojn ol la arbojn, ili respondis per kanto:

*Se persikaj arboj mortus,
ni dum venonta jar' replanti ilin.
Se la vesto farita de Ornjo perdiĝas.
ni ne scias kie ni povas trovi ŝin.*

Konante ke la tribanoj tiel ŝatis Ornjon, la kavestro venigis sian filinon kaj demandis: “Arĝnjo, ĉu vi havas metodon por la tribanoj refoje ami vin?”

Ŝi jam volis sendi lin al la infero kaj renkonti lian morton digne. Sed ne nur malbonaj eventoj venas neatendite, kiel kutime kredas pesimistoj. La maljuna onklo pravis: foje oni nur bezonas tiri la tempon.

Dum Sur ĝojegis kaj Seas levis la patron de Bajana el la kesto, okazaĵoj disvolviĝis ekster la kabano kiujn la malbona spirito ne antaŭvidis, kaj tiujn kiujn li ne povis antaŭvidi. Li supozis ke militistoj de ŝia taĉmento eble venos post Bajana, kaj postenis gardistojn laŭ la limo de la arbaro. Ili estis militistoj el tre malproksimaj landoj. Li aĉetis ilin de malnova konato, pli aĝa spirito el tre malproksimaj kaj tre varmaj landoj. Tiuj militistoj estis kreskitaj de junega aĝo por esti senkompataj murdintoj. Ili estis same sindonemaj al sia mastro kiel hundoj. De tempo al tempo li vendis ilin por certa tempo, post kiu ili revenis al li denove. Kaj nun ili estis en alia "komerca vojaĝo", fidele servante al Sur.

Neatendita savo

Stav gvidis sian taĉmenton laŭ la spuroj de Bajana kaj la kuriero. Estis simple neeble perdiĝi kaj perdi la spuron. Kaj iam la spuro montris, ke ili deĉevaliĝis. Ili staris tie, kaj nur unu spuro iris antaŭen, la dua turniĝis dekstren, en la arbedojn, kie Volĉok tuj estis trovita. Jes, li ne kaŝis sin, kaj li mem marŝis al ili renkonten. Ho, kaj li timis ĉi tiun renkontiĝon. La kuriero marŝis kun la kapo klinita, vortoj de pravigo ne venis al la menso. Jes, li ne povis pardoni sin.

“Nu, iru rapide! Kial vi paŝas!” - kriis Stav. Li komprenis la internan staton de la kuriero, kaj ankaŭ komprenis, ke li agis laŭ la ordonoj de Bajana kaj ne estis kolera al li jam de longe.

"Estas mia kulpo!" - la sendito elpremis kaj staris, klininte la kapon, antaŭ Stav sidanta sur ĉevalo.

“Nun ne estas la tempo serĉi la kulpulojn! Kie ŝi estas? - Stav parolis pli mallaŭte. “Ŝi promesis al mi, ke mi obeos ŝin en ĉio, kaj poste ŝi ordonis, ke mi estu ĉi tie ĝis la vespero, kaj se ŝi ne revenos, tiam unue mi kuros al vi, kaj poste al patrino Beljana!” Kaj ŝi mem galopis laŭ ĉi tiu vojo rekte en la Sonoran Arbaron,” Volĉok montris en la direkton per sia mano.

"Jen vulpo!" - Stav rikanis.

“Aŭskultu min ĉi tie! Via tasko restas la sama! Vi sidas ĉi tie ĝis mallumiĝo, se ni ne revenos, vi rajdas al Beljana kaj rakontas ĉion! Kvankam, kion vi povas diri! Ni preteratentis la knabinon!” - rapide ordonis Stav, kaj lia taĉmento denove rapidis antaŭen.

Volĉok estis denove lasita sen laboro. La duan fojon en 24 horoj, li estis forlasita kiel nenecesa aĵo. La humoro estis malbona. Sed ordono estas ordono.

Kiam la taĉmento de Stav elsaltis en la videblan spacon antaŭ la arbaro, la maljuna militisto rimarkis, ke ili estis rimarkitaj. Ne, li ne vidis, kompreneble, la transmarajn soldulojn tiel malproksime, li nur sciis tion. Lia intuicio malofte estis malĝusta. La tempo simple ne permesis al ni agi laŭ milita scienco, sendante skoldon kaj ĉion alian. Interna voĉo diris al li: Necesas agi nun, kaj poste ni vidos. Ili jam tragapis Bajanan kaj ili simple ne povis permesi duan eraron.

Stav donis nenium ordonon. Ĉiuj komprenis ĉion. Kaj, levante la ŝildojn pli alte, ili galopis, kiel oni diras, en frontan atakon kontraŭ nekonata malamiko.

La transmaraj solduloj tuj rimarkis malgrandan taĉmenton, kiu moviĝis rekte al ili. Ilia komandanto, kiu batalis en diversaj lokoj kaj kun diversaj popoloj, simple ne povis imagi, ke kompatinda aro da militistoj povas malkaŝe ataki la malamikon tiel, sciante nenion pri ilia nombro kaj loko. Neniam povis veni al li en la kapon, ke du dekoj da homoj povus moviĝi tiel! Trarompe! Kaj li decidis, ke tio estas esploro de la forto. Li ordonis forigi la arkojn kaj permesi al la proksimiĝanta taĉmento eniri la arbaron. Kion povas fari du nekompletaj dekoj kontraŭ kvin dekoj? Nenio! Ili venkis multajn tribojn kun malmulte da sangoverŝado, sed ĉi tie estis nenio. Ho, ĉi tiu "transmara ansero" ne sciis, kiun ili enlasis en la profundon de la defendo...

Stav komprenis ke ilia nura ŝanco ne esti mortigita per pafarkoj estis tuj miksiĝi kun la malamiko kaj devigi lin en proksiman batalon. Nenie estis por atendi helpo, kaj Bajana estis ĉi tie sola. Do estas nenio por pensi, ni devas batali. Oni atakis ilin de ĉiuj flankoj kiel hundoj. Provante elbati la militistojn de Stav el siaj seloj, la rajdantoj estis spertaj, kaj ĉe ĉevala kaj piedbatalo, kaj sciis batali duope kaj triope, kovrante la dorson de kamarado. Ĉevalo falis sub Stav, trapikita de lanco ĵetita de malproksime. "Sed niaj gastoj ne estas facilaj!" — pensis la maljuna militisto, disdonante batojn dekstren kaj maldekstren per sia grandega hakilo.

La atako, kompreneble, blokiĝis. Sed Stav sentis, ke li nur bezonas altiri atenton al si, kiel lia interna voĉo diris al li, kaj dum multaj jaroj da kampanjoj kaj bataloj, Stav lernis kredi siajn antaŭsentojn.

La gvidanto de la solduloj komprenis sian eraron: la ĉefaj malamikaj fortoj ne estos tie. Do ili ĉiuj estas ĉi tie, kaj li ĵetis sian tutan popolon kontraŭ ĉi tiun manpleno da frenezuloj.

Sur estis la unua, kiu aŭdis la sonojn de batalado en la malproksimo. Tio, kion li povis atendi, okazis. Iu venis al la savo de Bajana. Sed se juĝante laŭ la sono de la hufoj, ili ne estas tiom multe. Kaj li tuj revenis al la kaptitoj. Seas ne atentis la sonon de la armilo, la mastro estis proksime. Kaj kiu povas damaĝi la grandan Sur?

Kaj Bajana ĝoje eksaltis. Espero denove naskiĝis en ŝia koro.

"Ne rapidu, knabinjo! Nun viaj savantoj rapide estos mortigitaj, kaj vi komprenos, ke vane vi ĝojis!" - Sur mokis.

"Ni pli bone parolu pri kiel vi pensas redoni mian ŝtonon!" - la sorĉisto denove turnis sin al ĝentileco.

Seas jam unufoje forlasis la protektitan objekton, kaj ĝi kostis al li jarcentojn da malliberigo. Nun li ankaŭ vere volis foriri, sed la timo pri la kolero de la mastro estis pli forta, kaj li tretis ĉe la sojlo, tute ne atentante la kaptitojn.

Bajana venkis la stuporon, kiu retenis ŝin kaj, per unu salto, transsaltis la masivan tablon kaj trovis sin apud la kesto. Ŝi provis levi sian patron, sed ne povis, li estis tro peza, kaj la ĉenoj ankaŭ grave aldonis pezon.

Seas vidis tion, sed ne enmiksiĝis. La pli grava afero estis kompreni kio okazis kaj kiam venis la tempo por fuĝi.

Bajana tenis la kapon de sia patro en siaj manoj, iomete skuis lin kaj kviete, preskaŭ flustre, vokis lin.

Kaj en la maldensejo koliziis ne nur du taĉmentoj de militistoj. Preskaŭ tuj apud la kabano okazis duelo inter du malnovaj malamikoj. Kaj se iu hazarda preterpasanto troviĝus en la maldensejo, li vidus du maljunulojn starantajn unu kontraŭ la alia, kiuj praktike ne moviĝis, sed nur atente rigardis en la okulojn unu de la alia. Sed la plej interesa afero estas, ke la aero inter ili ŝajnis ekbrili kaj periode ekflami kun aŭ blankaj aŭ ruĝaj flamoj.

Kaj tiu, kiu havis grizajn, preskaŭ blankajn harojn kaj tenis en la mano aŭ lignan aŭ ŝtonan bastonon, komencis malrapide retiriĝi malantaŭen. Lia korpo ekstrems kvazaŭ en parksismo. Li komencis retiriĝi pli rapide, kaj iam aŭdiĝis akra klako kaj hela ekbrilo. Sur malaperis el la maldensejo.

Lia kontraŭulo, alta, maldika maljunulo kun densa nigra hararo kaj sama barbo, ĝemis kaj sidiĝis rekte sur la tero. Preskaŭ falis. Li sidis kaj spiris peze. Poste li kovris sian vizaĝon per la manoj kaj frostiĝis.

Kaj tiam io okazis, kion Seas ne povis imagi. Li sentis, ke la posedanto perdas forton, kaj pretis forkuri, sed io nekredebla okazis. La figuro de viro aperis en la pordo malantaŭ li. Li estis nekredeble ĉifonita, liaj vestaĵoj pendis sur li en pecetoj, kaj ĉi tiuj samaj pecetoj estis ornamitaj per bardanaj dornoj. Kaj tiu neatendita fremdulo similis al hundo perdita en la arbaro, kiu revenis al siaj mastroj. Ĝi estis la perdita kuriero Soj. Li eliris al la kabano el la direkto de la arbaro, kaj tuj, sen atendi

inviton, decidis eniri. Jes, li aŭdis la sonon de batalo, sed lia eltrovemo ordonis al li unue esplori la kabanon, kaj nur poste age laŭ la situacio.

Silente enirinte la koridoron, li vidis iun strangan viron, kiu staris dorse al li, kaj vidis sian plorantan junan mastrinon kliniĝantan super la kesto. Kaj la bildo formiĝis en la kapo de la perdita kuriero tuj. Ĉi tiu, kiu staras dorse, ofendas lian mastrinon kaj ne lasas ŝin foriri, barante la vojon. Soj ne demetis la ĉastranĉilon de sia patro eĉ kiam li dormis kaj promenis en la vento. Li eĉ ne sekundon pensis. Ĉiu, kiu ofendas virinojn, ne vivu, kaj saltis al la ofendinto de Bajana. En tiu sama sekundo Seas ekrigardis malantaŭen. Kaj eĉ la fakto, ke li estis el vico de pli aĝaj spiritoj, ne permesis, ke lia straba okulo evitu renkonti la tranĉilon de Soj.

Seas hurlis kaj kaptis la vundon kie lia okulo devus esti. Ne, kompreneble, mortemuloj ne povas murdi unu el la pli aĝaj spiritojn tiel simple. Soj nur provizore malinstigis kaj senkapabligis lin. Kaj ĉi-lasta ne estus feliĉa, se en tiu sekundo ne estus aŭdita potenca klako. Estis Sur kiu fuĝis de la batalkampo. Seas ne incitetis la sorton kaj ankaŭ malaperis. Jes, li nur fandiĝis en la aero. Soj kriegis kaj frostiĝis kiel arbo.

Kiam Sur malaperis, liaj solduloj, kvazaŭ laŭ komando, forlasis la batalon kaj malaperis en la densejon de la arbaro. Kompreneble, neniuj persekutis ilin. Kvin el la taĉmento pluvisis, inkluzive de maljuna Stav. Li estis tute vundita, sed ankoraŭ staris sur siaj piedoj. La tenilo de hakilo algluiĝis al la maldekstra manplato. La sango de lia frunto malklarigis liajn okulojn, sed li malrapide vagis al la kabano, apud kiu maljunulo nigre vestita sidis ĝuste sur la tero. Necesis serĉi Bajan. Kaj la maljunulo marŝis malrapide kaj senĉese stumblante. Se ne estus la hakilo, li jam falus. La tenilo estis longa kaj provizis bonan subtenon. La ceteraj el vivaj militistoj simple falis pro laceco tie, kie ili batalis.

Soj rekonsciiĝis kaj rapidis helpi al Bajana.

"Helpu!" - ŝi diris.

Kaj ili ambaŭ, sed ankaŭ malfacile, eltiris la malfeliĉulon el la kesto. Per kelkaj paŝoj ili trenis lin al la benko sub la fenestro. La ĉeno ŝajnis algluiĝi al la ligita viro. Soj kaj Bajana apenaŭ liberigis la viron kuŝantan de tiuj ligoj.

Kaj tuj kiam la tuta ĉeno kun muĝado falis sur la plankon, la viro kuŝanta sur la benko apenaŭ malfermis la okulojn. Li rigardis Bajan kaj ne palpebrumis. La anguloj de liaj lipoj ekmoviĝis en apenaŭ rimarkebla rideto.

"Filino!" - li flustris.

Bajana denove ploris, sed ĉi-foje pro feliĉo. Finfine! Ili renkontiĝis! Ŝia malnova songo realiĝis. Sed ŝi komprenis kaj sentis, ke tio ne longe daŭros.

Soj komprenis ĉion. Li estis superflua ĉi tie. Kaj li trankvile foriris.

"Patro! Mi tiel atendis vin! Kial vi ne venis pli frue? Patrino ankoraŭ atendas vin!"
- diris Bajana tra larmoj.

Estis klare, ke vortoj estas tre malfacilaj por li.

"Mi ne povis. Ni perdis la militon kun Sur. Li detruis preskaŭ nian tutan familion. Mi estis malliberulo dum ĉi tiu tempo. Estu apud Alaj! Li diros al vi ĉion kaj klarigos. Mi ne havas multe da tempo!" — post ĉi tiuj liaj vortoj, Bajana komencis laŭte plorsingulti.

"Vi scias, kiu mi estas, sed vi ne scias, kia potenco kuŝas en vi. Alaj klarigos ĉion. Kaj vi ankoraŭ ne konas mian nomon. Mi malpermesis al Beljana nomi lin ĝis mi mem venus. Ĉi tio povus altiri al vi plagon multe pli frue. Sur serĉis vin. Li dubis, ĉu estas vi, tial mi atendis tiel longe. Mia nomo estas Jagg. Kaj de nun, kiam estos bezono kaj vi bezonos helpon, nomu vin filino de Jagg, kaj ĉiuj, kiuj min konas, venos al vi helpi aŭ ne kreos obstaklojn!" - Jagg tre malfacile finis sian longan paroladon. Li fermis la okulojn lace kaj silentis.

Bajana ploris, enŝovante sian vizaĝon en lian ŝultron.

"Patro! Patro!" — ŝi vokis lin, sed li silentis.

En tiu momento eniris la kabanon alta nigrabarba maljunulo. En liaj okuloj ŝi vidis kompaton kaj antikvan malĝojon.

"Nu, saluton! La filino de Jagg! Voku min Alaj! "Mi estas amiko de via patro," la fremdulo salutis ŝin.

Poste Stav eniris la kabanon. Li apogis sin al la batalhakilo per unu mano kaj la alia sur la ŝultro de Soj. Vidante Bajan vivanta, la maljunulo ekploris. Por la unua fojo en sia vivo, tiu severa, nefleksebla militisto permesis al si verŝi larmon publike. Li nenion diris. Ĉio jam estis klara.

"Li iras al la Rifuĝejo, kie ni, la Spiritoj de la Tero, iras kiam ni laciĝas de la ŝarĝo de la surtera vivo, aŭ ricevas vundojn nekuraceblajn por ni. Kaj Jagg toleris tre longe. Neniu el la spiritoj, kiujn mi konas, povis elteni esti katenita en katenoj el ĉiela metalo tiom longe. Ĝi forprenas nian vivforton!" - Alaj parolis kviete.

Bajana ne povis kredi tion. Ne povas esti tiel! Serĉi sian patron dum tiom da jaroj kaj trovi lin mortanta. Ne estas juste! Ne! Ŝi ne meritis ĉi tion!

Alaj alproksimiĝis al Bajana, prenis ŝiajn ŝultrojn kaj trankvile levis ŝin sur la piedojn. Li brakumis ŝin milde kaj patrece kaj kondukis ŝin al la elirejo. Ŝi ne rezistis. La laceco de la lastaj tagoj kaj eventoj kovris ŝin tute.

Do ili eliris. Ĉiuj partoprenantoj en la lastaj eventoj kolektiĝis en la maldensejo. La postvivantoj de la batalo sidis ronde sur la tero. Soj staris antaŭ ili kaj rakontis la dekan fojon pri sia batalo kun Seas. Samtempe, ne forgesante montri la tranĉilon de sia patro, kies klingo fariĝis nigra, kaj kiom ajn Soj provis purigi ĝin, nenio funkciis. Oni devas diri, ke la nomo de tiu ĉi sendito restos longe en la memoro de siaj

samtribanoj. Li estos citita kiel ekzemplo de malzorgema kuraĝo, ne forgesante memori, ke li estis la sola kuriero, kiu sukcesis perdiĝi en konataj landoj.

Onklo Stav sidis kun la dorso apogita al la muro de la kabano. Li sidis kaj silentis. Mi pensis, ke estas tempo por li retiriĝi. Li fariĝis tro maljuna por tiaj amuzoj. Stav neniam timis rigardi morton en la okulojn. Li estis militisto, kaj lia animo estis la animo de militisto. Sed hodiaŭ, la unuan fojon, li spertis senton de timo. Ne, ne pro iliaj vivoj, sed pro tio, ke ekzistas tiaj reptilioj sur la tero kiel ĉi tiuj, kun kiuj ili interbatalis hodiaŭ. Kaj ili verŝis aliulan sangon ĝuste tiel, pro ies kaprico. Ili venas al fremdaj landoj kiel neinvititaj gastoj kaj faras ĥaoson. Sed ili estas ies patroj! Kion ili instruos al siaj filoj? Kaj ĝuste tio malĝojigis la maljunan militiston.

"Sed kie estas Volĉok?" - Bajana vigliĝis.

Unu el la vivantaj najbaroj, balanciĝante, ekstaris kaj respondis: "Ĝuste kie vi lasis lin, sinjorino, en la arbustoj!" Kaj ĉiuj subite komencis ridi. Eĉ Stav ridis kaj kaptis liajn kontuzitajn ripojn, tuis kaj denove ridis. Ankaŭ Bajana ekridis. Kaj ŝi subite fartis iom pli bone, sed post momento ŝi haltis kaj eksaltis al la pordo de la kabano. Alaj milde denove prenis ŝiajn ŝultrojn.

"Ne eniru, li ne plu estas tie," li diris kviete kaj malgaje.

"Humiligu vin, filino de Jagg! Trankvilo venos al vi tra la jaroj, sed ne baldaŭ," - Alaj diris kaj liberigis Bajan, kiu luktis. Ŝi kuris en la kabanon kaj vidis malplenan benkon. Sur ĝi ŝi trovis ledan braceleto kun ununura ŝtono lerte teksita en ĝi. Ŝi prenis ĝin kaj tuj metis ĝin sur sian dekstran poŝon. La filino de Jagg neniam disiĝis kun la braceleto. Nur unufoje ĝi estis mallonge ŝtelita de ŝi, sed tio estas alia rakonto.

La malhonora fino de Bujan

Bujan, tuj kiam li eskapis "de la gastoj" de Sur, tuj galopis al sia taĉmento. Li tuj sendis unu el siaj najbaroj al la taĉmento de Beljana. Li petis ilin diri al ŝi, ke li atendas ke ili helpas. Lasu ilin iri al ili kiel eble plej baldaŭ. Kaj li ankaŭ ordonis diri, ke li trovis tiun, kiuj starigis la embuskon kaj tuj atakos ilin!

La ruza vojevodo perfekte komprenis, ke, kompreneble, multaj havos demandojn, kiam li ordonos iri en batalon kontraŭ iliaj najbaroj. Sed li havis, kiel oni dirus nun, pruvojn. Kelkaj el la sagoj kiuj alvenis de nenie estis plumitaj ekzakte kiel la najbaroj faras.

La militistoj de lia taĉmento kaj la taĉmento de Beljana volos venĝi siajn kamaradojn. Kaj kiam li foriris al Sur, lia popolo jam komencis "labori" por instigi malamon kontraŭ siaj najbaroj en la taĉmento.

Kiam li alvenis al sia taĉmento, la malpura laboro jam estis farita. La militistoj estis pretaj por venĝo. Ja tro multaj estis batitaj kaj kriplitaj de tiu pluvo de sagoj. Oni decidis ne prokrasti. Skoldo raportis ke la najbara tribo tute ne atendis atakon.

Kaj ĉi tiuj vortoj ankaŭ fariĝis lerta mensogo. La popolo de la vojevodo diris: "Ili pensas, ke ili verŝajne mortigis nin ĉiujn, ĉar ili ĉirkaŭiras tiel trankvile!" Kaj malvero akiris novajn flugilojn kaj flugis ĉirkaŭ la militaj oreloj eĉ pli rapide.

Kaj la taĉmento moviĝis en preskaŭ malferma maniero. La vojevodo rakontis al ili ĉion, ke la taĉmento de Beljana atingas ilin, kaj ke ili venos al la savo en la plej oportuna momento.

En tiuj tagoj ne estis kutimo ataki ĉe sunsubiro. Bujan decidis ke ĉiuj pensis tiel, inkluzive de kiu estas atakita. Ne estis malfacile konvinki lian armeon. Ja ili mem estis atakitaj malnoble, pro embusko. Kaj tiel, kiam la suno preskaŭ malaperis malantaŭ la horizonto, la taĉmento de Bujan forkuris por "venĝi". La najbara tribo estis iom malsupera laŭ nombro kaj areo de la tero ol la tribo Beljana, sed ĝi estis de la sama radiko, nur iuj vortoj sonis malsame. Kaj ili estis same fieraj kaj liberemaj, kaj ili staris en batalo ĝis la lasta. Pasos multaj jarcentoj kaj ripetigos la milito inter triboj de la sama radiko. Sed en tiu malbenita vespero, tio okazis unuafoje. La defendantoj, kvankam ili estis malpli multaj kaj preskaŭ ne atendis atakon, estis hejme kaj batalis por ĉiu colo da la tero.

Vane la militistoj de Bujan rigardis malantaŭen, atendante la alvenon de la taĉmento de Beljana, kaj ĉiuj estis mortigitaj ĝis la lasta.

Kiam Beliana estis pafvundita kaj kuŝis senkonscia, Rat prenis komandon. Post nombrado de la mortintoj kaj vunditoj, Rat kunvenigis konsilion. Lavango da sagoj forportis por ĉiam trionon de la taĉmento. Triono de la pluvivantoj estis grave pafvundita, inkluzive de Beljana mem. La malrapidiĝon kaj konfuzon kaŭzis la fakto, ke eĉ la plej maljunaj en la taĉmento ne spertis tion en arma praktiko. Ŝajne, la nombro da pafarkistoj superis la nombron da militistoj en ilia taĉmento. Kiom da estas entute? Kaj la plej grava demando, kiu tenis Rat en la loko: kial eĉ la plej sperta patrolo ne vidis tian grandegan armeon? Mi eĉ ne vidis iliajn spurojn.

Estis danĝere resti ĉi tie, kaj eliri sur la kampon ne estis pli facila. Demando: kion fari? Kaj en tiuj tagoj ĝi estis la plej grava por niaj prapatroj. Kaj tiam Beljana komencis plimalboniĝi. Ŝi deliris kaj havis tre altajn febrojn foje. La vojaĝanta resaniganto certigis al ŝi, ke ŝi povas venki febron, ŝi nur bezonis rekonduki sin. Estas pli fortaj resanigantoj, kiuj certe helpas.

Do Rat decidis dividi la respondecon inter ĉiuj aguloj en la taĉmento. Kaj, verŝajne, li eĉ ne timis respondecon, sed li vere ne sciis kion fari.

"Ni serĉos batalon, ni eble perdos Beljanan! Ni sendu ŝin hejmen, se la gardistoj estos mortigitaj! Ni ĉiuj iru hejmen, kion fari kun la malamiko? Alie, la kontraŭulo rajdos en niajn domojn sur niaj ŝultroj!" - Rat preskaŭ kriis al la homamaso.

Estis nenio por diri al tiuj, kiuj venis al la konsilio. Ĉiuj estis turmentitaj de la samaj demandoj. Ni decidis fari aferojn laŭ la malnova maniero. Staru en perimetra defendo kaj sendu patrolojn. Laŭeble kaj laŭeble. Tion ili faris. Restis nur atendi.

La gardistoj alportis nenion novan. Ĉio estis trankvila ĉirkaŭe. Neniu spuro de la malamiko. Tiuj, kiuj iris en la plej foran patrolon, revenis samtempe kun la sendito de la vojevodo.

La proksimulo de Bajan parolis iun sensencaĵon. El liaj vortoj montriĝis, ke ilia taĉmento estis atakita de nekonataj homoj en komploto kun najbara tribo, kaj ke la vojevodo ordonis al ili urĝe veni al la savo. Ĉi tio estus okazinta, se Beljana ne rekonsciigis en tiu sama momento. Kiom da tempo daŭris por ke ŝi sentu sin pli bona? Kaj ŝi povis eĉ paroli. Aŭskultinte la raporton de Rat pri tio, kion alportis la gardistoj, kaj poste la proksimulon de la vojevodo, ŝi diris al li: “Dume mi vivas, ne estos malamikeco inter ni kaj niaj najbaroj! Tuj iru al la vojevodo kaj diru al li, ke mi malpermesas al li eĉ moviĝi al la najbaroj! Li turnu homojn al la domo!”

La sendito de la vojevodo forkuris reen.

“Rat! Ni iru hejmen! Nur ne haste. Sendu patrolojn sen ĉeso!” -Beljana parolis pli mallaŭte kaj denove fermis la okulojn. La febroy denove komencis venki ŝin. Kaj la resaniganto, kiu vartis ŝin, perdis la fidon al si mem. Li provis ĉion, kion li sciis. Poste restis nur fidi nur la forton de Beljana mem, kion li diris al Rat. Ĝis la fino de siaj tagoj, Rat konsideros sin kulpita de la perdo de la armeo en tiu malglora kampanjo. Kvankam Beljana gvidis ilin, li respondecis pri la sekureco de homoj. Li neniam povos kompreni kiel kaj kiu superis lin en la arto de milito.

Bajana ne sciis kion fari nun. Ŝi tre volis reveni hejmen kaj preni paŭzon de ĉio ĉi. Volis iri renkonti sian patrino kaj ekscii kiel ŝi fartas kaj ankaŭ volis trovi Bujanon kaj rigardi en liajn okulojn. Ŝi simple ne sciis, ke neniu denove rigardos Bujanon en la okulojn.

Ŝi perfekte komprenis, ke Sur ne forlasos ŝin. Kaj kie ajn ŝi estos, li persekutos ŝin. Ĉi tio signifas, ke kiu ajn estas proksime de ŝi, estos en morta danĝero. La decido ne estis facila por ŝi. Estis timiga, sed ŝi decidis. Ŝi venis al Alaj kaj diris tre laŭte, por ke ĉiuj aŭdu: “Patro diris, ke kiam mi bezonos helpon kaj konsilon, mi turnu min al vi! Kaj mi faras kiel li diras. Alaj, mi bezonas vian helpon kaj multajn konsilojn nun kaj estonte. Permesu min iri kun vi kaj fariĝi tia, kia mi estas! Bonvolu! Mi estas la filino de Jagg!”

Ĉiuj rigardis ŝin silente.

Alaj estis la unua, kiu rompis la silenton: “Mi estas preta fariĝi via konsilisto dum kelka tempo, filino de Jagg! Venu kun mi!”


Bajana brakumis Onklon Stav. La maljuna militisto kaptis ŝin per la manoj kaj kviete flustris al ŝia orelo: “Ni ĉiam atendas vin! Se vi bezonas helpon, voku!”

“Diru al via patrino, kion vi vidis! Diru, ke ŝi pardonu!” - diris Bajana laŭte, deŝirante sin de sia onklo.

"Bone, mi diros tion, filino de Jagg!" - respondis la viro kaj riverencis al Bajana ĉe la talio. Ĉiuj faris same, krom Alaj. Li jam flankeniris kaj atendis ŝin.

Bajana sekvis lin, turnis sin kaj svingis la manon al ĉiuj, kiuj staris en la maldensejo. Alaj marŝis rekte en la densejon de la Sonora Arbaro kaj jam malaperis en la picejo. Bajana iris kaj haltis, ŝi ne plu rigardis malantaŭen.

Ŝia pasinteco restis ĉi tie en la maldensejo. Restis kune kun la homa nomo. Bajana restis por ĉiam en la maldensejo, kaj la filino de Jagg faris paŝon en la densejon. Ŝi daŭre prononcos ĉi tiun nomon dum longa tempo, Jaga ne aperos baldaŭ. Sed pli pri tio poste... (*daŭrigota*)



elrusigis Sergei Isakov (Rusio)

Chiung Yao (1938-2024)



En Profunda korto (15)

Monato forpasis. Hanyan malaperis kiel ŝtono falinta en la maron. Bai Peiwen utiligis mil rimedojn por serĉi ŝin. Li petis de laboristino Yan Lili la informon pri ŝi, publikigis priserĉan anonceton en ĵurnalo, kaj eĉ sendis ekzameni la registradon de loĝantoj en policejo, sed ŝi ŝajnis ŝaŭmo malaperinta en la maro kaj donis nenian postsignon.

Li bedaŭris, ke antaŭe li ne demandis al ŝi pri la nomoj kaj la adreso de ŝiaj adopto-gepatroj, kaj nun

aŭtorino, Chiung Yao

perdis ĉiujn eblojn. La priserĉa anonceto en ĵurnalo pligrandiĝis kaj daŭris semajnon, sed nenia telefonvoko el ŝi alvenis. Rapide li malgrasiĝis kaj marasmiĝis. Li ne havis apetiton nek emon al endormiĝo, kvazaŭ senhejma hundo tuttage. Li ne povis resti hejme eĉ unu minuton, ĉar li timis, ke ŝi telefonos al la fabriko. Sed en la fabriko li same ne povis teni sin senmova. Ĉiumomente li eksaltis pro subita timo, viziante, ke ŝi edziniĝis, eĉ al tiu idioto. Kaj pro tio li ektremetis kaj sentis konvulsion en la koro kaj la tuta korpo. Ĉio ĉi tio lia ne povis eskapi el la rigardo de lia patrino kaj lia amiko Gao Lide.

Gao estis diligenta junulo, kiu alvenis sola al Tajvano post la okupacio de la ĉeftero, kaj lernis en agrikultura fakultato en universitato, kiel kunlernanto de Bai. Pro intimaj konversacioj, li kaj Bai fariĝis koramikoj. Tial, post diplomiĝo, li translokiĝis en Domon Bai kaj administris la tutan te-plantejon, kiun Bai komisiis al li. Aplikante tion, kion li lernis en lernejo kaj kun granda intereso pri te-kreskigo, Gao eĉ prosperigis la te-plantejon pro sia laboremo. Oni povis rikolti sep aŭ ok fojojn la tefoliojn en la plantejo de Domo Bai, kio tute ŝuldiĝis al li. Por danki lin, Bai disponigis al li akciojn kaj pagis al li altan dividendon ĉiujare. Pro tio, Gao ĝuis specialan pozicion en la familio Bai, kiel koramiko, frato kaj helpanto de Bai.

Tiun nokton Gao kaj maljuna sinjorino Bai estis en la halo, dum Bai paŝadis tien kaj ĉi tien senĉese en sia ĉambro. Lastatempe, preskaŭ ĉiuvespere, li tiel paŝadis tien kaj reen eĉ ĝis profunda nokto. En sia dormoĉambro li same paŝadis tiel ĝis tagiĝo.

“Peiwen,” kriis lia patrino nereteneble, “kio okazas al vi?”

“Ho?” Haltinte, li ĵetis nekompreman ekrigardon al ŝi.

“Ĉu laboristino povus tiel distrigi vin?” Ŝi fikse rigardis lin.

“Ho, panjo?” li mire demandis, “Kiel vi povus scii...”

“Mi scias ĉion,” ŝi ekbalancis la kapon. “Mi persvadas al vi forlasi ŝin! Ŝi ne konvenas al vi, nek al nia familio. Ŝi nur tantaligas vin, kaj vi neniel falu en ŝian kaptilon!”

“Panjo!” li reziste protestis, “Vi tute ne scias! Vi tute ne konas ŝin! Tio, kion vi diris, ne estas justa!”

“Ĉu mi ne scias?” La maljuna sinjorino levis la brovojn. “Tiaspecajn junulinojn mi bone konas. Mi konsilas, ke vi ne obstine insistu pri via konduto! Jen vidu, kiel ŝi vin turmentas! Rigardu vin en la spegulo, ĉu vi havas decan aspekton? Vi estas vere stranga. Vi faris elektadon mil kaj mil fojojn, sed vi nur korinklinas al laboristino en via fabriko, anstataŭ al belaj filinoj de distingitaj familioj!”

“Ŝi ankaŭ estas abituriento!” li laŭte diris. “Ĉu laboristino malsuperas? Multaj gravuloj devenis de laboristoj!”

“Kompreneble,” ŝi ekrikanis. “Tiu laboristino tre baldaŭ fariĝos la mastrino!”

“Ne diru tiel, panjo.” Starante antaŭ sia patrino, li ŝajnis ŝtonstatuo, kun pala vizaĝo kaj malserenaj okuloj. “Ŝi fakte ne inklinas edziniĝi al mi. Ŝi jam senspuriĝis de unu monato.”

“Ŝi aperos,” ŝi diris kviete. “Ŝi jam elĵetis la hokon kun logaĵo, kaj iam venos por ĉasaĵo. Sed, Peiwen, mi diru al vi, ke mi ne volas tian bofilinon.” Li rigide staris tie. Findirinte tiujn vortojn, la maljuna sinjorino stariĝis kaj rekte supreniris laŭ la ŝtuparo. Li ankoraŭ restis staranta en stuporo ĝis kiam Gao Lide aliris kaj donis al li bruligitan cigaredon.

“Ŝajnas al mi, ke vi bezonas cigaredon,” Gao diris ridete.

Bai prenis la cigaredon. Eliginte longan suspiron, li deprime sidiĝis en la sofona, kun siaj fingroj enŝovitaj profunde en la haroj. Bruliginte cigaredon, Gao sidiĝis kontraŭ li kaj diris kviete, “Kio do okazis? Eldiru kaj mi donos al vi proponon.”



Levinte la kapon, li ĵetis rigardon al Gao, kies rigardo estis kuraĝiga. Refoje li eksuspiris kaj forte eksuĉis la cigaredon, el kiu la densa fumo ŝvebis inter la du viroj. Gao sidis kun unu kruro metita sur la alia kaj mienis senzorge kaj senĝene, dum li firme kuntiris la brovojn kun la vizaĝo plena je malĝojo kaj ĉagreno.

“Kiel panjo sciigis pri Hanyan?” li demandis al Gao.

“Ŝi telefonis al direktoro Zhao kaj informiĝis pri tio,” Gao diris. “Nu, ĉu ŝi vere estas laboristino?”

“Jes.” Ekscitite li kriis, “Se vi vidus la laboristinon! Se vi vidus ŝin!”

Gao ekridetis leĝere. “Kiel ŝi malaperis?” li demandis.

Bai mallevis la kapon kaj denove silentis. Dum kelka tempo ili restis senparolaj. Siaflanke Gao ne urĝis lin respondi kaj nur elblovis cigared-fumon.

Post tre longe Bai malrapideme diris, “Antaŭ kvar monatoj mi rimarkis ŝin la unuan fojon.” Li sputis plenuĝon da fumo kaj fikse rigardis ĝian disiĝon. En la ŝvebanta fumo li ŝajne viziis la vizaĝon de Hanyan malforte, leĝere kaj iluzie duonkaŝitan de fumo. Malrapide li rakontis la historieton inter si kaj Hanyan tute kaj senrezerve. De Gao li neniam kaŝis sekreton. Finrakontinte, li apogis sian korpon al la sofo kaj gapis al la plafono. Kun senviglaj okuloj, li diris mallaŭte, “Mi volontus ŝanĝi ŝin per la tuta mondo! Per la tuta mondo!”

Enpenseme silentis Gao, kiu estis lerta en pensado. Post kelka tempo, li subite diris, “Ĉu vi iris al la publika dancejo por peti informojn?”

“Publika dancejo?” Bai surpriziĝis.

“Nu, ŝi servis en publika dancejo antaŭe. Por renovigi sian vivon, ŝi decideme liberigis de ĝi kaj fariĝis laboristino. Sed vi donis batojn al ŝi kaj frakasis ŝian esperon. Se la junulino, kiu troviĝas en malespero, trovas, ke tiu renovigo ne alportas al ŝi respekton kaj reputacion, kaj des pli, ke tio ne faras la viron, kiun ŝi amas, havi altan kaj decan opinion pri ŝi, kiel ŝi farus?”

“Kiel?” La frunto de Bai ŝvitis.

“Ŝi voluntas degenerigi sin! Tial ŝi diris, ke ŝi volas flosi sur ondoj, perej kaj degeneri. Ŝi jam tute senkuraĝiĝis! Nun estas du ebloj pri ŝi: aŭ ŝi jam edziniĝis al tiu idioto aŭ reiris al dancejo kiel kundancistino. Do, mi proponas al vi serĉi ŝin en dancejo!”

Penetreme rigardante al Gao, li restis senparola longan momenton. Poste li eksaltis, kaj ekkaptinte la jakon pendantan sur la seĝdorso, kuris eksteren. Gao surprizite kriis, “Kien vi kuras?”

“Al dancejo!”

“Kiu dancejo? Ĉu eblas, se vi ne havas nenian informon pri ĝi?”

“Mi serĉu de unu dancejo al alia!” Post kiam li impetis eksteren, Gao aŭdis la

motoran bruon de la aŭto. Stariĝinte, li iris al la fenestro kaj okule akompanis lian aŭton, kiu elkuris kiel sago. Li eklevis la brovojn kaj iom klinis flanken la kapon. Ŝovinte ambaŭ manojn en la poŝojn de sia jakto, li parolis al si, "Do, mi vere volas vidi tiun Zhang Hanyan!"

Pliaj tri tagoj forpasis. Bai iris al pli ol dek kelkaj dancejoj por serĉi ŝin, sed li povis trovi neniun spuron de ŝi, unuflanke pro tio, ke li ne sciis la nomon, kiun ŝi uzis en dancejo, kaj aliflanke pro tio, ke li ne havis ŝian foton en la mano. Tial li devis subaĉeti la direktoron de la dancejo, petante, ke tiu montru al li la fotojn de kundancistinoj. Sed tio ne helpis multe, ĉar multe da kundancistinoj ne disponigis siajn fotojn. Do, li ofte sidis silente en la angulo de dancejo, forte fumante cigaredon kaj rigardante kundancistinojn, kaj silente foriris. Tamen, tiun nokton li vere vidis ŝin.

Tio estis duaklasa, eĉ triaklasa publika dancejo, kie regis bruo, malordo kaj cigared-fumo, kaj malgranda bando ludis laŭtan muzikon. En mallarĝa danc-areno interpuŝiĝis paroj da gedancantoj, kiuj dancis rapidritme. Kaj Hanyan turniĝis en la brakumo de mezaĝulo. En malhela lamplumo, ŝiaj orelingoj kaj kolĉeno brilis. Kvankam en tia malhela lamplumo, kvankam en tia ĥaosa interpuŝiĝo, kvankam ŝia aspekto tute malsamis kiel kutime... tamen li rekonis ŝin je la unua ekvido. Tuj kiam li eniris la dancejon, li rekonis ŝin! Li sentis rapidajn korbatojn kaj vertiĝon. Li ektemetis pro surpriziĝo. Sidiĝinte sur sidlokon, li diris kelkajn vortojn al la direktoro kaj fingromontris ŝin. Poste li subskribis ĉekon al la direktoro de kundancistinoj. Tiu mirplene gapis al li kaj foidis. Li mendis botelon da vino kaj bruligis cigaredon. Tiamaniere atendante kviete, li verŝis en sian ventron unu glason da vino post alia. Post longa tempo, lin vualis malluma homa ombro staranta antaŭ li. Li malrapide levis sian kapon. Jen timida kaj delikata figuro estis volvita per okcidentstila vesto el nigra velveto, el kies larĝe malfermita kolumo montriĝis ŝia delikate longa kolo. Ŝiaj malgrasaj kaj malfortaj ŝultroj aspektis pale kaj alloge kompatinde, kaj la brilanta koliero kroĉiĝis al ŝia delikata kaj glata haŭto. Lia rigardo supren leviĝis kaj tuŝis la ŝian.

Ŝajne ŝi trafis grandan skuadon. La sango rapide forlasis ŝiajn vangojn kaj lipojn. Ŝi apogis sin al la tablo per la mano, kun kolapsanta korpo. Li tuj stariĝis kaj ŝin helpis. Poste li sidigis ŝin sur seĝon. Per tremetantaj manoj li verŝis por ŝi glason da vino kaj donis al ŝi. Preninte la glason, ŝi eltrinkis la vinon per unu gluto. Li sidiĝis kontraŭ ŝi kaj fikse rigardis ŝin tra la larva nebulo abrupte formita. Ŝi aspektis pli malgrase kaj marasme. La tualeta pudro ne povis kaŝi ŝiajn palecon kaj lacecon, kaj sub ŝiaj okuloj klare montriĝis nigraj ringoj. Ŝiaj longaj okulharoj svingiĝis, duonkaŝante paron da malklaraj kaj timidaj okuloj. Li mordis al si la lipojn, sentante tordan doloron en la koro profunde.

“Hanyan!” li mallaŭte vokis. Li per tremetanta mano kovris ŝian maneton sur la tablo. “Kiel penige serĉi vin!”

Ŝi eliris sian manon malpeze, levante siajn brovojn. Ŝia rigardo fiksiĝis sur lia vizaĝo la unuan fojon hodiaŭ nokte, kun ioma prijuĝemo kaj flegmo. “Ĉu vi volas danci, sinjoro?” ŝi demandis kun frida mieno. “Dankon pro via atentemo al mi!”

“Hanyan!” li kriis, ne sciante, kion diri, pro urĝemo. Ŝia senesprima vizaĝo pikis lin. Li konfuziĝis kaj streĉiĝis, sentante sian internon dolore turniĝanta. “Hanyan, ne kondutu tiel. Mi venas pardonpeti de vi kaj kunporti vin eksteren!” li hasteme diris. Liaj manplatoj malsekiĝis de ŝviteroj.

“Kunporti min eksteren?” ŝi murmuris. “Jes, se vi pagas por ekstera tranoktiĝo, vi povas kunporti min eksteren.” Ŝi stariĝis kaj rigardis lin kviete. “Ĉu ni eliru nun, sinjoro?”

Li rigardis ŝin, ŝian marasman vizaĝon, ŝian lacan mienon kaj ŝian flegman vizaĝesprimon, kvazaŭ li estus nur ordinara kundancanto kaj fremdulo tre malproksima de ŝi. Lia koro disŝiriĝis de ŝia konduto. Li ekkomprenis, ke ŝi ne volantas daŭrigi antaŭan intiman rilaton kun li, kaj ke li jam perdis ŝin! Iam li tenis ŝin en la mano, sed nun li perdis ŝin!

“Kiel do?” ŝi demandis. “Iri eksteren aŭ danci?”

Li ekgrincis siajn dentojn kaj subite stariĝis. “Bone, ni iru eksteren unue! Antaŭ ĉio ni forlasu ĉi tiun lokaĉon!”

Ŝi alportis sian ventmantelon. Li helpis al ŝi surŝultrigi ĝin, kaj ĉirkaŭbrakumante ŝian talion, li eliris kune kun ŝi el la dancejo. Siaflanke ŝi ne rifuzis lian ĉirkaŭbrakumon, kio naskis strion da espero en lia koro. Fikse rigardante ŝin tra siaj okulharoj, li trovis indiferecon kaj senzorgemon sur ŝia vizaĝo. Tio refoje pikis lin.

“Kien ni iru?” ŝi demandis al li.

“Kie vi loĝas nun?”

“Proksime de ĉi tie.”

“Ĉu mi povus sidi kelkan tempon en via loĝejo?”

“Jes,” ŝi eklevis siajn brovojn., “se tio plaĉas al vi.”

Senvorte ŝi nur paŝis antaŭen. La vento de profunda aŭtuno renkonte atakis ilin per penetrema malvarmeto. Ŝi iom ektremetis kaj li nereteneble firme ĉirkaŭprenis ŝin, kiu ne rezistis. Ili iris sur la norda strato Zhongshan kaj turnis sin en strateton. Ili eniris apartementan domon kaj supreniris al la dua etaĝo. Ŝi elprenis el la mansako ŝlosilon kaj malfermis la pordon de la ĉambro. Nun li sin trovis en malgranda kaj bela salono, kiu estis nekompareble supera al ŝia antaŭa ĉambro: tapetitaj muroj, luksa lustro pendants el la plafono, gramofono, ŝranko kun kelkdek specoj da vino eksponitaj, kompleto da elegantaj sofoj, malhele ruĝa fenstrokurteno pendants ĉe

fenestropordo... Ĉirkaŭrigardante, li sentis malklaran doloron en la koro. Li vidis la tipan ĉambron de kundancistino, kaj krome li sciis, ke ofte gastoj frekventas ĉi tien.

“La ĉambro estas bone dekoraciita,” li laŭdis malsincere.

“Jes?” ŝi demandis senemocie. “Mi luis ĝin, kune kun ĝiaj mebloj kaj ornamaĵoj. Mi ne faris ŝanĝiĝon al ĝi. Se ĝi estus mia, mi elektus kreman kaj kafan kolorojn por la salono, blankan, oran kaj nigran kolorojn por la dormoĉambro, kaj aldonus ruĝan litkovrilon kaj similajn.” Ŝi montris la sofon, “Bonvole sidiĝu!” Kaj malferminte la cigared-skatolon sur la tableto, ŝi demandis, “Cigaredon?”

“Ne.”

“Kion vi volas drinki?” Ŝi aliris al la ŝranko kaj elprenis vinglason, “Kion vi emas drinki, viskion aŭ brandon?”

“Nenion. Mi volas nenion,” li diris ekscitite, fiksante sian rigardon sur ŝin.

“Do, kio pri aliaj trinkaĵoj, oranĝa suko aŭ soda akvo aŭ kokakolao? Vi devas trinki ion, ĉu ne! Vi jam elspezis tiom multe da mono por mi, kaj miaflanke mi devas bone regali vin!” ŝi diris, intence evitante lian rigardon.

Alirinte al ŝi, li tenis ŝian brakon per la mano, turnigis ŝian korpon kaj devigis ŝin fronti al li. Kaj li penetreme rigardis ŝian vizaĝon. Li havis okulojn plenajn je sangaj strioj kaj distaŭzitajn harojn. Li rapide spiregis, kun pala kaj marasma vizaĝo.

“Sufiĉe!” li diris raŭke. “Ne turmentu min, Hanyan. Mi eraras, mi eraras. Ne turmentu min plu!” Li ne povis regi sin. Li firme alpremis ŝin en sian sinon kaj ŝovis sian kapon en ŝian kolumon. “Superŝutu min per via kolero! Batu kaj skoldu min! Kriegu al mi! Diru al mi, ke mi estas la plej granda malsaĝulo! Sed ne turmentu min per flegmo tiamaniere! Ne kondu tu tiel! Sciu, ke mi faris nenion alian ol serĉi vin dum ĉi tiu monato. Sufiĉas via puno al mi, jam sufiĉas! Hanyan, indulgu min!”

Ŝi elbaraktis kaj forsaltis de li. Apogante sin kontraŭ la muro, ŝi gapis al li kun larĝe malfermitaj okuloj. Ŝia vizaĝo montriĝis morte pala kaj ŝia mieno kaptiĝis de retiriĝemo kaj konfuziteco.

“Kion... kion vi volas, sinjoro?” ŝi demandis, kvazaŭ li ankoraŭ estus fremdulo.

“Mi volas doni al vi edziĝpeton,” li urĝeme diris. “Mi petas, ke vi edziniĝu al mi. Mi amas vin kaj mi volas vin.”

Ŝi rigardis lin. Ŝia vizaĝo pli paliĝis kaj laceco riveligis en ŝiaj okuloj. Malrapide deturninte sian kapon, ŝi mallevis siajn palpebrojn.

“Se vi petas mian edziniĝon, do, mi rifuzas, sinjoro,” ŝi diris seke kaj malforte.

“Hanyan!” kriante, li sin ĵetis antaŭ ŝin kaj kaptis ŝiajn manojn. “Mi scias, ke vi koleras kontraŭ mi kaj vi malamas min. Mi scias. Mi tute scias. Sed ne diru tiel definitive. Bonvole donu al mi alian ŝancon. Provu min ankoraŭfoje, Hanyan, mi petas!”

“Ne,” ŝi diris mallaŭte, rigardante malplene tra la fenestro, sen ajna vizaĝesprimio.

“Vi malestimas min, kaj konsideras min malpura. Mi ne povas edziniĝi al tiu, kiu min malestimas. Ne, neniel. Mi jam diris antaŭe, ke mi ne meritas pariĝi kun vi!”

”Ne, ne, Hanyan, ne estas tiel. Estas mi, kiu ne indas je vi. Mi estas vulgara, malgrananima kaj egoista. Nun mi jam ekhavas klaran komprenon, ke tiu afero neniom damaĝas vian purecon kaj bonecon. Mi estas tre malsaĝa, Hanyan! Nun nenio malhelpas nin. Mi ne plu zorgas pri via deveno kaj via pasinteco. Vi estas la plej perfekta en mia koro. Mi petas, Hanyan, ke vi edziniĝu al mi, edziniĝu al mi! Hanyan, ne rifuzu min!”

Ŝi ektemis, ankoraŭ rigardante tra la fenestro, sed larma ondo inundis kaj mergis ŝiajn nigrajn pupilojn. Ŝiaj lipoj iom moviĝis kaj malforta rideto naĝis al la liprando. “Se vi volontus diri tiujn vortojn antaŭ monato,” ŝi diris malgaje, “mi genuiĝus ĉe viaj piedoj kaj kisus ilin. Sed nun tio ne helpas. Mi jam reiris al la dancejo, kaj mi ne plu revis pri tio. Mi ne edziniĝas al vi, sinjoro Bai. Tamen vi povas iri al la dancejo. Kiel riĉulo, vi povas pagi miajn servohorojn aŭ pagi por mia eliro kun vi.”

“Ne, Hanyan!” kriante, li peteme skuis ŝin, kaj karesis ŝiajn vangojn kaj harojn. Lia rigardo arde fiksiĝis sur ŝian vizaĝon. “Mi ne permesas al vi resti en la dancejo, neniel! Mi nepre edzinigos vin, kiel ajn vi diras! Ne estus tiom kruela, Hanyan...”

“Jen vi estas kruela, sinjoro Bai!” dirante, ŝi deturnis sian rigardon el de la ekstera pejzaĝo kaj faligis la rigardon sur lin. Larmeroj glitis laŭ ŝiaj vangoj kaj fale gutis sur ŝian veston. “Bonvole forlasu min kaj ne tedu min,” dirante, ŝi komencis plorsingulti mallaŭte kaj reteneme.

Ŝia plorsingultado disŝiris al li la koron kaj dolore pikis lian koron. Li ambaŭmane levis ŝian vizaĝon kaj forkisis ŝiajn larmerojn per la lipoj. Li peteme diris, “Indulgu min, indulgu min, Hanyan. Mi estas kulpa. Mi kondutas kiel azeno. Mi igis vin multe suferi por nenio kaj fali en multajn maljustaĵojn. Mi estas kulpa. Hanyan, donu al mi ŝancon, la ŝancon al mi por renovigi min kaj ripari mian kulpon. Mi certigu al vi, Hanyan, ke viaj dumvivaj suferoj jam finiĝis kaj mi donos al vi la plej dolĉan kaj la plej feliĉan vivon. Hanyan, promesu edziniĝi al mi! Hanyan, promesu tion!”

“Vi... vi pentos pri tio,” ŝi diris plorante, “Iun tagon vi malŝatos kaj forĵetos min...”

“Mi neniel, absolute neniel faros tion!”

“Vi faros tion, ĉar vi jam malŝatos kaj forĵetos min foje. Kaj poste vi ankoraŭfoje faros tion. Mi timas tiun tagon. Mi ne kuraĝas akcepti vin, mi ne kuraĝas!” Ŝi kovris sian vizaĝon per la manoj. Plorado konvulsiigis ŝiajn ŝultrojn kaj larmeroj falfluis el inter ŝiaj fingroj. “Mi jam diris, ke mi hontas pri mia malindeco, mi estas humila kaj sensignifa... Mi ne volontas edziniĝi al vi, mi ne volontas! Iun tagon, kiam vi ne plu amos min, tiam vi malbenos min kaj vi pentos... Ah, ne, ne,” ŝi skuis sian kapon inter la manoj. “Forlasu min! Forlasu min! Mi estas tiel humila. Ne serĉe trompu

min...” Ŝi ne plu eldiris kaj eĉ povis eligi neniajn sonojn pro dolora plorado. Li perforte tiris ŝian manon el de ŝia vizaĝo kaj rigardis ŝiajn vizaĝeton terure makulitan de larmeroj kaj maljuste ofenditan kaj retiriĝeman mienon. Lia koro spasme konvulsiis. Li ekkomprenis, kiom serioze li vundis tiun fragilan koron, tiel ke, ŝi ne plu kuraĝis kredi aŭ akcepti la amon. Li fikse rigardis ŝin longe kaj profunde, kaj poste li eligis ekkriojn kaj timplene altiris ŝin al sia sino. Tremete prenante ŝian kapon en sian brakumon, li kriis, “Aĥ, Hanyan, kion mi faris al vi? Mi devas esti damnita, mi devas esti kondamnita en la inferon! Ho, Hanyan, batu kaj malbenu min!”

Levinte ŝian kapon per la mano, li alpremis siajn lipojn al la ŝiaj tremetantaj lipoj. Siaflanke ŝi ankoraŭ ploris. Plorante, ŝi ĉirkaŭprenis lin tre forte kaj demandis plorsingulte, “Ĉu vi... vi... vi vere... volas min?”

“Jes, jes, Hanyan! Mia ĉiu osto kaj ĉiu fibro volas vin! Mi volas vin! Mi volas vin, Hanyan! Ni geedziĝu tuj morgaŭ! Mi pagos por vi la monsumon, kiun vi ŝuldas al viaj adopt-gepatroj, kaj mi finos anstataŭ vi vian kontrakton kun la dancejo. Hanyan, vi ne plu havas mizerajn tagojn! Tion mi certigas al vi. Mi protektos vin dum nuna vivo kaj estonta vivo!”

“Vi... ne estas sincera...”

“Mi estas sincera, sincera!” li diris ripetade.

“Vi scias, ke mi ne estas... bona junulino, kaj ne pura, ne...”

Li kovris ŝian buŝon per la mano. “Vi estas bona kaj pura junulino! Vi estas perfekta kiel neprilaborita jado! Vi estas la junulino, pri kiu mi revadas!”

Ŝi levis sian kapon kaj ŝiaj pupiloj larme vualitaj flagradis. Ŝi rigardis lin longe tiamaniere, kaj poste timide kaj malforte demandis, “Ĉu vi... ne... pentos?”

“Penti?” Li fikse rigardis ŝin. “Jes, mi pentas, ke mi prokrastis unu monaton kaj ke mi multe suferigos vin!”

Ŝi mallevis siajn palpebrojn kaj staris senmove.

“Hanyan,” li softe vokis. “Ĉu vi jam pardonis min?”

Sen diri ion, ŝi nur malpeze ĉirkaŭprenis lin, malpeze apogis sin al lia sino kaj malpeze alpremis sian vangon al lia firma kaj larĝa ŝultro. (*daŭrigota*)

elĉinigiĝis Veĵdo (Ĉinio)

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



poeto, Mikaelo Bronŝtejn

Penseroj

Veturad' en la urbego,
en premanta busa grego
estas longa kaj enua.
Sed apuda ĉarmulin'
elokvente okulumas
miajn ŝuojn. Ve, ne lumas

respegulo en la ŝuoj,
hontigantaj, certe, min.

Kara, mi demandu : - Ĉu al
vi ne plaĉas miaj ŝuoj?
Jes ja, ilin kovras koto
pro kapricoj de l' veter'.
Sed ne estas mia kulpo –
malstreĉiĝu la okulo
por atenti verajn trajtojn
de la vira karakter'.

Post konstat' de propra miso
eble venos via kiso
al la nerazita vango
de l'amindumanta ul'.
Sed se ne permesas prudo
kisi min, mi diru: - Nu do
restu ĉe la kotaj ŝuoj
ĉi-okaze la okul'.

Mi konscias, ke nun
post la viv' duonplena

staras mia fortun'
inter "se" kaj "apenaŭ".
Mi konscias, ke hor',
forpasinta malŝpare
en ĉagren' aŭ amor',
evitendas avare.

Serĉas klavojn la man',
forte frapas ondar' de
la animocean',
kaj elplaŭdas plenarde
al ekrana blanket'
rimoj, kiujn prirevas
mi, sed scias mi, ke
ĉion ĉi mi ricevas

el la plag', el plezur'
el la vivo plej simpla
el la svaga forkur'
de l' horeto pasinta.
Do, mi ploras kaj amas
kun ĉagren', kun kares',
kaj fortune ekrampas
de "apenaŭ" al "jes".

2003

La peterburga plenluno
kaj la fumeta mateno
min inspirigas en nuno.
Mia destina fadeno
foje direktas la vivon
mezen de l' brua urbego
por la tumulta ekdriv' en
ĉiam gastanta hom-grego.
Eble en hastomanio
flame flirtema fortune
venos kun nova linio
por poemet' pri l' plenluno.

Ho jes, hodiaŭ mi prelegas en Seulo
por la esperantista rondo simpatia.
Raŭkete sonas parolado arda mia -
jen malkomforta nervoziĝo senebria -
kvazaŭ hazarde mian gorĝon trafus kulo.

Ho jes, hodiaŭ mi prelegas en Seulo
por aŭskultantoj miaj, preskaŭ nekonataj.
Kaj ekvilibron trovas miaj kruroj vataj
kun peno. Kaj paroloj miaj ne tro glataj
kun peno lasas fridan langon de l' timulo.

Ho jes, hodiaŭ mi prelegas en Seulo,
trankvilon prenas en vizaĝoj atentemaj,
en vigla fluo de l' demandoj diverstemaj,
kaj la parolo venas pace, sen ekstretoj,
kaj la aplaŭdoj ardas - estas la stimulo

por la kantad' elana, por anima brulo -
Ho jes, hodiaŭ mi prelegas en Seulo !

januaro 2015

Katenis la stratojn glacio,
faladas paŝantoj.
Katenis la koron glacio,
stuporas la koro.
La vintro ĉeestas en ĉio,
kaj mankas la kantoj,
per kiuj degelu glacio,
solviĝu angoro.

Kaj foras amikoj fidelaj,
kapablaj subteni,
kaj feblas iama akcel' al
antaŭaj gloragoj.
Sufloras racio ke stelaj
momentoj reveni
ja povas post vintre malhelaj -
ĉu jaroj... ĉu tagoj...

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



poeto, Yi Qiao

Amo estas pli forta

Vi revenas en la sonĝon glite,
kun ridet' konata ja tiam.
Ŝajne temp' regresas mir-subite,
ni redronas en delico ama.

Sur la holm' aromas jen gazono,
ni brakume flustras kor-pasie.
Tempo haltas tiam kun sindono,
min memor' obsedas nostalgie.

Mi vekiĝas el la sonĝ' ĉagrene,
kaj konscias, ke vi ne plu estas.
Pli ol kvardek jaroj pasis ĉene,
vi delonge en l' edeno restas.

Estas am' pli forta ol la morto,
flegma restas mi al fata sorto.

Spiro de Printempo

Ho printempo estas jen veninta
Brizo freŝe lantas tra l' arbaro
Ĝus vekiĝas Tero ja mirinda
Mevoj ŝvebas vigle sur la maro.

Delikatas rozoj kaj violoj
Spiro de printempo bonodoras
Abelaro zumas inter floroj
Birdoj sur arbpinde dolĉe ĥoras.

Nin salutas lumo primavera
Blankaj nuboj flirtas sur ĉielo
Verdas la kamparo tuj prospera
Sorĉas nin printempdiina belo.

Mondo nova helas kun aspiro
Homoj plenesperas per inspiro.



Nia beletra ĝardeno

Jen Penseoj en ĝardeno nia,
kun aromo de beletra ĉarmo.
Ili pimpas kun belec' huria,
okulplaĉaj je kortuŝa varmo.

Pioniras ĝardenisto Vejdo,

sindonema kaj rikolto plena.
Kunlaboras ni je glor-avido
por l' ide' komuna esper-bena.

Alte for sin sternas la ĉielo,
ĝis l' Edeno bela kaj beata.
Brilas helflagrante l' verda stelo
super nia fronta voj' benata.

.
La Penseoj floras en fervoro,
E-kulturo pompas kun la gloro.

Se vi havas


Se vi havas revon en la koro,
kial ne malkaŝas ĝin fiere?
Realigu l' revo kun honoro,
kaj l' diino benas vin prospere.

.
Se doloron havas vi en koro,
kial ne konfesas ĝin sincere?
Ŝi karesu l' vundon kun favoro,
tiel sentas vi vin kor-libere.

.
Se vi havas amon en la koro,
kial ne ĝin fandas kun la ŝia?
La homar' progresu al aŭroro,
regos fine l' mondo harmonia.

.
Kiel la lumtur' en nokt' obskura,
ŝi prilumas nin kun grac' am-pura.

Tiberio Madonna (Italio)



poeto, Tiberio Madonna

Sen ni

La floroj
en la mallumo
ne havas kolorojn

kaj la luno
defalinta en la malamon
perdis la helecon.
La suno
kiu brilegos morgaŭ matene
pli eta ol oranĝo
pluvigos
sian acidan sukon
sur niajn okulojn
soifajn
kaj bruligos
kiel senutilajn paperaĉojn
la songojn
kvankam jam cindriĝintajn.
Kaj kiel faros intertempe
la nokto
por trinki la tutan akvon
de ĉi freneza
fulmotondro
kaj viŝi la nubojn
malkovrante
ke ĝi perdis la lunon?
Kie ni trovos
helfarban pentraĵon
por povi eniri kaŝite
kaj promeni en ĝi?

Horloĝoj kaj kalendaroj
diras nenion plu
al niaj fantazioj
kaj l' atendoj
longaj
lacigantaj
kaj dolĉaj
dronis
kun siaj falsaj promesoj
en unu guto
da fumo.
Kion ni diros
al niaj koroj
kaj kion ni rakontos
al la emocioj?
Aeron
silentojn
kaj pluan aeron
plenigitan per vakuo. De vi.

Via kaŝita amo

Mia neĝa
arida
fajra dezerto
ne havas sablon
nek blankon
nek ion tuŝeblan
pri kio mi povus skribi, verki, paroli
fantazii...
kaj do mi rakontas
flugojn sen birdoj
paŝojn sen piedoj
ĉielarkojn sen koloroj
en mia libro
sen paĝoj.
En la centro de mia universo
brilas obskura
via animo avara

via figuro fora
kiu lumigas per siaj sentoj
ĉiujn aferojn neekzistantajn
kuŝantajn
en miaj dezirplenaj revoj.
Kaj ĉiu el tiuj aferoj
tute senmove
rondiras
ĉirkaŭ vi
superverŝite
de la lumo nigra
kaj montrante
en ĉiu direkto
sian tristan ĝojon.
Senkompate min tremigas
la lontana varmo apuda
de via animo.
Malproksimo kaj proksimo
perfekte kunfandiĝas.
Nokto kaj tago
estas nur unu afero.
Mia miranta koro
ebriiĝas de l'odoro
de via riĉa
kolora bukedo
sen floroj.
Mia gorĝo soifa
trinkas
la pluvon sekan
falantan
el la nuboj dancantaj
de via animo,
kaj miaj okuloj melankoliaj
pasigas sian tempon legante
en tiu senesprimo
de l' animo
la vortojn sen literoj
skribitajn de via mano.

Marzena Wawrziczkoa (Pollando)

la matena suno vekas vin el letargio
pasantaj tagoj lulitaj en nebulon
la birdoj kuŝis en kompostamasoj
serĉu grasajn larvojn kaj larvojn

la ĉielo denove estas krado kiel ŝaktabulo
chemtrails* etendiĝis ĉiudirekten
mi ne atentis tion, mi elmontras mian frunton
lasu la pinean glandon kapti la radiojn

ses gradoj da varmo sur la termometro
muŝoj gaje zumas en la aĉero
la avelo* kalkulas la horojn de lumo
la betulburĝonoj* ŝveligis la branĉetojn

mi pendigas la vestaĵon kaj ĝi forprenas la humidon
milda vento portas alte
superkape predanto* krias
la birdo vidis ŝanĝojn en la mondpaco

**chemtrails- kemiaj spuroj*

**avelo - Corylus avellana*

**betulburĝonoj - Betula*

**predanto - Buteo buteo*

nia konversacio estas pura kiel la fonto
temoj diskutataj de ĉiuj flankoj
kiam la vualo estas forigita kaj la tago estas tiel mallonga
la signifo de "ne laboranta lundo"*

frezio* kreskas en skatolo ekstere
elmetas foliojn kiel cebolojn*
leontodorozetoj* kaj neĝfloroj*
ili kalkulas la horojn ĝis la fino de la vintro

la arboj estas plenaj de freŝaj fungoj

ostrofungoj* brilas kun fruktkorpoj
spuru per amanita* la mondo sendas al ni
relikvo de politeismaj kultoj

ni, kiel plantoj, soifas je la suno
ni daŭre gratas niajn kapojn scivoleme
la milda klimato hodiaŭ estas drolota
promeni li vokas — iru kun ni

*nedelya kaj ponedelnik - semajno kaj lundo - el la rusa

*fresia floro - Frezio

*ceboleto - Allium schoenoprasum

*leonda herbo - Taraxacum officinale

*negroplanto - Galanthus nivalis

*ostrofungoj - Pleurotus ostreatus

*amanita fungoj - amanita muscaria

kial konekti kun malhela energio
la diablo donos ion ajn por igi vin pagi poste
kiel facile timo kreas sklavojn
kiam ĝi malrapidigas la ŝanĝojn sur la tero

nescio embuskas - kaptilo por la homaro
maŝinado daŭre estas en progreso
la nigra vojo malaperas
partoj de la matrico detruos la tuton

la programo havas sian propran antiviruson
analizas neklarajn vojojn
nombroj venas de statistiko
rekonu kaj detruu ajnajn entrudulojn

vivas subtere - la avataro supre
artefaritaj dividoj generitaj
vi estas plena de energio - vi amuziĝas
mi revas kiel Alico en Mirlando

Erika Godó (Hungario)



poetino, Erika Godó

Monatoj

Januaro kondukas jarkomencon kun favoro:

neĝeroj flirtas, vento fortas en fervoro.

Februaro ekas kun ĉarmaj glacifloroj,

homoj revas pri vestoj en buntaj koloroj.

Marto alproksimiĝas kun bonaj promesoj,

printempo ja ĉeas kun ĝojplenaj impresoj.

Aprilo donas freŝajn pluvojn al la tero,

radias suno, verdas herbo june en apero.

Majo floras, ĝardeno plenas de belo,

bonodoro de floroj flugas kiel abelo.

Junio alvenas, varmas somero la hela,

longas tagoj, neniam vespero estas malhela.

En Julio, ni bezonas siesti en varma vetero

sub la ombroj, kiu baras sunlumon en leĝero.

Aŭgusto koronas someron per meritoj:

rikoltoj riĉaj, varmaj noktoj, senta ekscitoj.

Septembro portas ŝanĝiĝon al la vento,

folioj falas en dancmovaj prezento.

Oktobro venas kun fortaj ventpeloj,

arboj vestitas per flavaj manteloj.

Novembro malheliĝas tagon post tago,

sed la koro kovas esperon en svago.

Decembro fermas la jaron per frosto,

ferioj venas, kun neĝamaso en jar-vosto.

La pensoj de poeto

La vortoj naskiĝas sur papero,

kiel sekreta revo, nekonata afero.

Profunde en la koro kuŝas doloro,
el kiu fontas poezio kun valoro.
Liaj pensoj ŝvebas al fora marbordo,
ke sub lia plumo vi troviĝas en bonordo.
Vortoj estas la resonadoj de la animo,
kaj la beleco de ekzistado en sublino.
La poezio estas lia sekreta rifuĝo,
li montras sentojn per kora muĝo.
Ĉiuj poemoj havas siajn proprajn markojn,
ĉiuj pensoj ŝprucigas surpapere pens-sparkojn.

La blua violo

Ho heroldo de printempo, blua violo,
viaj petaloj malfermiĝas kiel dolĉa parolo.
En la silento de rosaj herbejoj kaj arbaroj,
la mesaĝo de vivo lumas en viaj valoroj.
Etaj bluaj petaloj, la mirindaĵoj de la ĉielo,
skuas la homan koron al kalmio per ventpelo.
Vi donas al mi ĝojon en ĉiu momento,
en la koro de la naturo, vi estas la sento.

Ho, blua viola, fidela kunulo en soleco,
via beleco sorĉas mian koron por eterneco.
Ĉiam vi memorigas min pri tio, kio gravas,
en la vivo plena je mirindaĵoj homoj revas.
Via beleco restas, kiam la suno malaperas,
sed en mia memoro vi ĉiam aperas.
Blua violo, en la vento via odoro ŝvebas,
en pluvaj tagoj vi ĉiam al viveco strebas.

Bedo de Ĉinesko

Vejdo (Ĉinio)



poeto, Vejdo

*Jenaj poemoj estas skribitaj laŭ ĉinesko
Sopir-al-sudo, kies skemo konsistas el kvin
verslinioj respektive kun 3, 5, 7, 7, 5
silaboj, kun rimarango xaxaa (x =
senrima).*

Balai la korton

rakonto pri Afanti

Afanti
jen kiel junul'
penlaboris tagnokte
por vilaĝa bienul'
kiel stulta mul'.

Laŭ regul'
la mastro al li
devas pagi salajron
je jarfino sen vari'
kaj ajna menci'.

Nun
venis la tago
lasta de la jaro jam,
la mastro per fi-ago
volis je l' pago

senigi

lin ruzoplene.
Al Afanti ordonis
li balai zorgeme
la korton pene.

Li diris:
“Balau pure
ĝin sen akvoverŝo, sed
ĝi malsekas plezure
kaj brile pure.”

Afanti
obeiis jen
kaj ekbalais korton.
Li pensis, kiel, kun pen’,
ja purigi sen

akvoverŝ’
korton espere,
sed kun malseka grundo.
Do, li elprenis vere
zorg-maniere

la tutan
stokon da ole’
de l’ mastro kaj aspergis
ĝin sur la teron ĉie
glate, glite tre.

Post tio
li ĉe koridor’
sidiĝis kaj atendis,
ke la mastron pro l’ labor’
laŭdos per honor’.

Revenis
la mastro ĝoje
sed kiam li rigardis

la teron fojrefoje,
li kriis boje:

“Ho, Alah”!
Redonu al mi
oleon, ho, oleon!
Mi ne salajron al vi
donos, al vi fi!”

Afanti
diris kviete:
“Ĉion mi faris bone
laŭ ordono diskrete
kaj belrimede.

Bonvole
pagu salajron
al mi laŭ interkonsent’.
Ne ludu kolerfajron
nek ja kanajlon.”

La mastro
nenion tute
diris, al Afanti
pagis salajron mute
kaj sendispute.

Tri maksimumoj

rakonto pri Afanti

Por vivpan’
Afanti kun ŝnur’
iris al bazaro por
dunganton kun kora pur’
kaj favoro nur.

Li staris
por taglaboro

kaj rigardis ĉirkaŭen.
Alvenis grandsinjoro
kun ruza koro.

Deklaris
li malĝentile
jen al laborserĉantoj:
“Aŭskultu min trankvile
kaj senbabile.

Aĉetis
mi je alta prez’
keston da glasoj luksaj,
kiu volas kun komplez’
por buŝa enspez’

dorsporti
al mia domo.
Mi donos tri maksimojn
je mia nobla nomo
al li, sen mono.

Neniu
reagis jese,
sed Afanti konsentis
dorsporti ĝin promese
kaj sinforgese.

Afanti
jen kun granda pen’
dorsporti l’ keston fine
ĝis la riĉula ĝarden’
de bela teren’.

Li petis
de la riĉulo
tri plej altajn maksimojn
jen per sia postulo

kun avid-brulo.

“Aŭskultu
laŭ via ŝato,”
La riĉulo do diris:
“La diron, ke malsato,
ho, mia frato,

ol sato,
ne kredu ĝua.”
“Bone!” diris Afanti,
“Kio estas la dua?
Jen mi senbrua!”

“La diron
ne kredu tute,
ke piediri bonas
pli ol rajdi ĝoj-lude,
ne absolute!”

“Pravege!
Jen akceptas mi
tiujn brilajn konsilojn!
Kaj la tria opini’
de l’ saĝa radi’?”

Daŭrigis
la riĉulo jen:
“Tion neniel kredu,
ke malsaĝas ne azen’
pli ol vi en splen’.”

Aŭdinte
tion kolere,
Afanti lasis ŝnuron.
Krak! La kesto libere
falas sufere

surteren.
Afanti moke
fingromontrante l' keston,
ja maksimis provoke
kaj solid-roke:

“La diron
plene kredu ne,
ke tiuj glasoj tute
ne disrompiĝis ja tre
en pecojn, ho ve!”

Ne ŝercu per via vivo

rakonto pri Afanti

Juĝisto
rajde sur ĉeval’
jen renkontis Afanti
revenantan de bazar’
kun porviva var’.

Salutis
li riverence
kaj diris: “Kien iras
via moŝto intence?
Ne konfidence?”

La juĝist’
diris fiere:
“Ha, al la paradizon!
Ĉu vi iros espere
kun mi prefere?”

Afanti
diris decide:
“Ho, ne, eĉ se mi volus.
Vi mem iru rapide
ne nur rajd-side.”

“Pro kio?”
Afanti al li
diris: “Ja via moŝto
forĝesis, ke iam vi
konsilis al mi

ke homoj
malbonojn faras
ĉiame kaj Alaho
kontraŭ ili jen staras,
punojn ne ŝparas.

Ja pri vi
mi maltrankvile
zorgas, ĉar, se renkontos
vin Alaho alire,
kaj laŭaspire,

do kio
okazos vere?
Nu, ne ŝercu per vivo
via nekonsidere,
ha, tre danĝere!”



Rovere Emanuele (Italio)



tradukinto, Rovere Emanuele

Kiom pluvis

Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)

Muziko / vortoj: Armando Gill 191

Ni amegis reciproke, unu jaron, eble plu.
Tamen, poste, ni disiĝis: kiu kulpis el ni du?
Sed okazis, dum vespero, pro hazarda okazaĵ',
ke, dum pluva la vetero, ni rifuĝis sub arkaĵ'.
Elegantis per vualo ŝi, sub blanka ĉapelet',
ĉarmis dolĉe la okuloj sed malĝojis la vizaĝet'.

Kaj mi pensadis pri rev' en lontano,
pri eta ĉambro de lasta etaĝo,
kiam, ŝi, vintre, al kor' mia sin premis.
Ho, kiom pluvis, ho, kiom pluvis!

Kiel fartas vi? mi diris "bone, dankon kaj, ĉu vi?"
"Ne malbone", mi aldonis, "sed nun pluvas pli kaj pli".
"Se mi iom malsekiĝos, mi jam hejmeniros nun".
"Jen ombrel', mi akompanos!" "Dankon, baldaŭ venos sun".
Tiam vidas mi taksion, vokas ĝin, ŝi diras "ne",
mi insistas "venu, venu, ni eniru!" Ŝi diras "Jes".

Tiel, tutkore, mi ŝin prenis permane,

dum miaj pensoj vagadis lontane,
kiam, ŝi, vintre, al kor' mia sin premis.
Ho, kiom pluvis, ho, kiom pluvis!

Sed memori l'pasintecon por ŝi estis nur dolor',
ĉar ŝi estis jam perdinta la purecon de la kor'...
Tial, ĉe la pordo sia, ŝi mienis per ridet'
sed l'okuloj plenpasiaj vualiĝis per larmet'.
Kaj mi ŝin ne plu revidis... ĉu feliĉas ŝi aŭ ne?
Se, en mondo, ŝi perdiĝis, ŝi pripentos ĉiam, ve!

Kiam, vespere, en revo, lontane,
en la taksio mi ŝin prenis permane,
tiam ankoraŭ sin savi ŝi povis...
Ho, kiom pluvis... ŝi tiom ploris!

Lasu ke mi kantu

Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)
Muziko / vortoj: Emanuele Rovere (Manŭel)

intro: Ho, lasu, ke mi kantu kaj mi ludu per gitaro
ĉar tio, kion diros mi nun, estas nur la vero.

Esperantistoj estas de tri specoj: idealistoj kaj materiistoj,
kaj tria speco por kiuj esperanto estas bela ludo kaj nenio pli.
L'idealistoj ĉiam firme kredas: "per esperanto eblas ŝanĝi l'mondon",
sindone varbas kaj senpage laboras, ne postulas eĉ dankon.
La materiistoj, komercantoj ruzaj, de kelkaj tempoj regas,
ekspluatas la esperantujon por grasigi sian monujon.

Ho, lasu, ke mi kantu kaj mi ludu per gitaro:
pri amo kantojn por la tuta samideanaro.
Kaj klare mi denuncu mankon de demokratio,
dum honte kreskas la sektismo per ekskludoj kaj envio!

Ve! Esperanto, en ĉi situacio, malproksimiĝis de la “fina venko”
ĉar la projekto perdiĝis, ke la novan senton ni disdonu al la tuta mond’.
Ni devas nun retrovi l’idealon, kiu naskiĝis en la granda koro
de Ludoviko kaj de l’samideanoj de la plej frua horo.
Do, ni estu ĉiuj homaranoj veraj, fratece diskonigu esperanton,
semu ni sen laco por la celo de l’monda paco.

Ho, lasu, ke mi kantu kaj mi ludu per gitaro,
ĝis kiam havos spiron mi, al la tuta homaro.
Kaj, se mi jam maljunas nun, pri tio mi fieras
kaj, ĝis mi estos centjarulo, do, plukanti mi esperas.

Kaj ĉiuj agu kune ni, por ke ne estu baro,
por igi esperanton, ja, la lingvo de l’homaro.
Sed ne forgesu ni, ke eblos nur per honesteco
venkigi esperanton “la lingvo de frateco”.

La trajno fajfadas

Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)

Muziko / vortoj: Hedy West

Pensis mi, ke bonos pli
sen adiaŭ disiĝu ni,
ĉar ne havus mi la koron revidi vin.

Sed mi aŭdas en lontan’ la fajfadon de la trajn’:
ŝajnas ĝi lamento trista dum vesper’.

Provis mi imagi vin
doloranta en l’ anim’,
sur la kajo, en svarmado de “ĝis revid”.

Sed mi aŭdas en lontan’ la fajfadon de la trajn’
ŝajnas ĝi lamento trista dum vesper’.

Volis kuri mi al vi
kun dolora mia kri':
malfacile mi kapablis retenigi min.

Kiom foren iros vi tiom grandas la ĉagren',
vi neniam trovos eblon por reven'.

Pensis mi, ke bonos pli
sen adiaŭ disiĝu ni,
ĉar mi sentas, ke jam nun finiĝis ĉio.

Kaj mi aŭdas en lontan' la fajfadon de la trajn'
dum forportas ĝi por ĉiam la amon nian.
Dum forportas ĝi por ĉiam la amon nian.

De mi al vi

Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)

Muziko / vortoj: Lennon / McCartney

Se vi ion deziras nun,
kion fari kapablu mi,
nur voku min
tion sendos mi tuj
kun am' de mi al vi.

Ĉion faris mi por vi jam
kun kreivo kaj fantazi',
do, diru nur
kion donu mi pli,
kun am' de mi al vi.

Miaj brakoj emas teni vin
premite sur la kor',
miaj lipoj volas kisi vin
malĝojojn peli for.

Se vi ion deziras nun
kion fari kapablu mi,
nur voku min,
tion sendos mi tuj,
kun am' de mi al vi.

Patro

aldonita de Emanuele Rovere

Ĉiam agis mi kun sincer'
sed turmentis vin ĵaluzi',
sed kredu, ke estas nur unu ver':
la am' de mi al vi.
Ĉiun horon de la tago, mi volus vin ĉe l' flank',
tiel, ke en mia vivo de feliĉo ne estu mank'.

La sono de silento

*Esperantigo: Rovere Emanuele (Manŭel)
Muziko / vortoj: Simon / Garfunkel*

Bonrevenon al la lum', post nokto de koŝmara fum'.
Restas el la kor' konfuza sent', rampas kaŝe dezir' de pripent'
kaj vizio fuŝe daŭras en la mens' kun intens',
ene de l' son' de silento.

Mi paŝis en senfina song', nudpiede kaj sen manĝ'.
Ĉe l' haloo hela de stratlamp', troviĝis mi en frida, venta kamp',
dum l' okulojn miajn vundis neona lum' kaj kvazaŭ fulm',
la sonon tuŝis de silento.

En nuda lumo vidis mi dekmil da homoj, eble pli.
Homoj diras sen ekspliki, homoj aŭdas sen aŭskulti,

homoj verkas kantojn sed ilin kantos nenies voĉ', ĉu pro riproĉ'
aŭ timo ĝeni la silenton.

Ho, stultuloj, vi ne scias: "silento kiel kancer' kreskas".
Miaj vortoj povus vin instrui, vian firman kredon eĉ detrui,
sed miaj vortoj falis kiel senbruaĵ pluvgutoj
kaj ĉhis en la forumoj de silento.

Klinis sin preĝanta gent', al la nova dio de l' moment',
ĉar, perrete, venis la sciigo kaj, kun admona atentigo,
l' ekrano montris: "Vortoj de profetoj estas nur
surmure de subpasejoj kaj amasloĝejoj
kaj flustritaj en la son' de silento".



Du Fu (712-770)



poeto, Du Fu

Du Fu, vivanta dum la Tang-dinastio de Ĉinio, estis granda realisma poeto kaj liaj poemoj donis grandan influon al la ĉina antikva poezio.

Verskvaro

Sur branĉoj verdsalikaj du orioleoj ĥoras,
Linio da ardeoj al blu' ĉiela soras.
Vidiĝas tra fenestro miljara neĝ' sur monto,
Ĉe l' pord' ankriĝas ĵonkoj de l' regno kiu foras.

Improvizaĵo

Sur sabla vojeto ŝutiĝas
Salikaj pure blankaj floroj.
Lotusaj folioj plenkovras
La rojon per verdaj koloroj.
La fazanidetoj post ŝosoj
Bambuaj apenaŭ vidiĝas,
Ĉe sia panjo anasidoj
Dormante nun dolĉe feliĉas.

Okazaj pensoj

Afliktas min river' de printempo velkoranda,
Mi staras irbastone sur benko floro-planta.
Freneze flirtas flokoj salikaj en vent-danco,

Frivolaj persikfloroj drivas laŭ akv' fluanta.

Ĉe la rivero Qu (ĉju)

(unu el la du poemoj kun la sama titolo)

Per unuflora falo la printemp' ekmalfortiĝas,
Kaj dek mil floroj en ventkirlo nun des pli ĉagrenas.
Flirtantaj ilin en ĉi agonio mi rigardas
Kaj por enkoran splenon peli vinon multe prenas.
Alcedoj nestas en la domo sur rievera bordo,
Ĉe l' tombo en reĝparko ŝtonaj Qilin jam forsvenas
Se bone rezonante pri la leĝo de aferoj,
Kial per vanta kaj malplena fam' mi min katenas?

**Qilin (ĉilin): ĉina unikornulo (legenda besto, kiun la antikvuloj imagis kun kapo de leono, korpo de cervo, skvamoj de drako, vosto de bovo ktp. kaj kiu servis kiel simbolo de bonaŭgureco)*

La vilaĝo ĉe l' rivero

Rivero klara fluas ĉirkaŭ la vilaĝo,
En longaj somertagoj mi senzorgas tie.
Al aŭ de traboj hirundoj libere flugas;
Sur akvo laroj intimiĝas softekrie
L' edzino surpapere pentras ŝaktabulon;
El pingl' fiŝhokon faras mia fil' pasie.
Krom kuracilo kontraŭ la malsano mia,
Kion alian mi postulas ambicie?

La suda najbaro

Sinjoro Jinli, ne riĉulo, kun ermita ĉapo;
Ĝardeno lia plenas je la taroj kaj kaŝtanoj.
La birdoj surperone bekas grajnojn senzorgeme,
Kutimas gaje alrigardi gastojn la infanoj.
Aŭtuna akvo malprofundas je kvar aŭ kvin futoj,
Permesas nur al du-tri homoj noktveturi barke.
Sin lokas la vilaĝo ĉe sabl-duno kaj bambuoj;
Je mia ĝiso ĉe la pordo l' luno lumas arke.



elĉinigi Minosun (Ĉinio)

Han Shan (vivanta dum Tang-dinastio)



poeto, Han Shan

Han Shan, fama bonzo-poeto dum la Tang-dinastio de Ĉinio, postlasis al ni posteuloj ĉirkaŭ 300 poemojn.

Kiel atingi la Frost-Monton?
Al ĝi la voj' baritas plene.
Somere regas ja glacio,
nebulo densas sun-solene.
Kiel mi loĝas en ĉi monto,
aliaj volas tion ene.
Se iu havas mian senton,
li tie trovas sin senĝene.

En urb' fraŭlin' kun belaj brovoj
susuras per pendanta dekor'.
Papagon ŝi amuzas fole
liuton ludas en lunglor'.
Kantvoĉo ŝia eĥas tagojn
ŝi dancas scene kun fervor'.
Ĉu longe daŭros tiu stato?
Ne fridon spitas hibiskflor'.

Mi loĝas sub rok-klifo verda,
ne volas falĉi herbojn plu.
Rampantoj pendas kaj kroĉvolvas,

ŝtonegoj staras jen sen sku'.
Simioj plukas fruktojn ĝoje,
gruoj kaptas fiŝojn en flu'.
Sub arba ombr' taŭistajn librojn
mi legas kun murmura bru'.

Eterne kiu povas vivi?
por ĉiuj morto estas sama.
Fortulo alta post nelonge
fariĝos polv' pro mort' spontana.
Transmond' ne konas tempopason,
herboj strebas al tag' sunbana.
La tempo ĉagreniga venas
eĉ vento igas trist-fontana.

Ekzistas diversspecaj homoj
penantaj por renoma glor',
ĉasantaj enkortegan rangon,
vendantaj por riĉaĵ-valor'.
Sen momenta halto ili
konkuras jen kun ŝvit-vapor'.
Finfine ili havas hejmon
kun servistoj por hejm-labor'.
Ĝis sepdek jaroj ili vivas
kiel glaci' degelas for.
Post morto nul' fariĝos ĉio,
do kiuj pretos je l' honor'?'
Komprenos klare ili tiam:
solviĝas kotoj en akv-vor'.

elĉinigis Eto (Ĉinio)

Liu Weijie (Ĉinio)



poeto, Liu Weijie

Najman-Flago*,

la hejmo en mia koro

Najman-flago, mia kara hejmloko,
Via pejzaĝo bela, kiel pentraĵo, en mia koro restas.
Kie ajn mi troviĝas,
La ombro de la stepo ĉiam min akompanas.

La tero vastas kaj floras mirakloj de la vivo,
La vento milde karesas vian vizaĝon,
kaj la subiranta suno farbas la teron orkolore.
La poezia stepo, trankvila kaj malproksima,
estas loko, kie mia animo ripozas kaj revas.

Najman-flago, poezia pentraĵo,
sur la verdaj kampoj ni renkontiĝu,
kaj niaj koroj strikte interligiĝu.
Ni brakumu la naturon kaj sentu nin liberaj
en eterna poezia etoso, malstreĉitaj kaj memkontentaj.

Naiman-flago en mia koro
belas kiel poemo plena je profundaj sentoj.
La montoj kaj riveroj de mia hejmloko
estas senkompare grandiozaj kaj imponaj.
Kie ajn vi estas,
Mi ĉiam memoras vin en mia koro.

**Flago estas administra unuo de gubernia nivelo de la aŭtonoma regiono de la Interna Mongolio.*

Postpluva Ĉielarko

Per varmaj manoj etenditaj al mi
vi forkaresas miajn vundojn tra la korpo.
Intertempe de flusoj kaj malflusoj
vi rivelas suferojn sub mia peza vualo,
tiel ke miaj malĝojo kaj ĉagreniĝo foriras kun la vento,
kaj malaperis en sekreto ĉe la tempfino.

Vi foriris, silente, trankvile,
min lasante sola sub la serena ĉielo.
Mi petas, ke vi haltu plian momenton
kaj ni rigardu kune la bluan nubaron post la pluvo.

Post pluvo la suno ĉiam revenas,
post ŝtormo ĉiam aperas ĉielarko.
Viaj buntaj koloroj estas lumo de espero,
la plej bela pejzaĝo en la vivo kaj eterna sopiro.

Larmanta ruĝa kandelo

Ruĝa kandelo larmas en silento
en ĉi nokta momento.
La senfina doloro
gravurita en mia koro
neniel povas esti forigebla.

En la brulado
naskiĝas la amsento en nebulo
leviĝas en mincaj fumaj spiraloj,
kaj malaperas el la melankoliaj okulanguloj.

Ĉi ĉio nur estas sonĝa sceno,
ama inko gutadas en ĉagreno.
La kandela larmo fluanta
ŝajne gravedas je nia etera sonĝo.
La sola Altaĵo kuŝanta kviete

rande de frida galaksio
rigardas al mi de malproksimo.

Mi amas vin, Ĉinio!

Sur orienta tero vasta
staras lando antikva kaj majesta,
jen vi nomiĝas Ĉinio.

Tra viaj multkoloraj tradicioj,
ni ekkonas vian gigantan ŝanĝiĝon.
El viaj montoj kaj riveroj
ni sentas vian viglan pulson.

El meritoj de viaj revoluciuloj
ni lernas vian batalantan spiriton.
En via kvinmil-jara brila civilizacio,
Ni vidas vian grandiozan imponecon.

Mi amas vin, Ĉinio!
Ni estas viaj gefiloj, fieraj kaj unuiĝintaj,
La kvinstela flago alte flirtas,
montrante la forton kaj unuecon de ni kvindek ses etnoj.
Kun sento de paco kaj amo en nia sango
kien ajn ni iras,
nia koro ĉiam ligiĝas
kun nia granda patrujo.

Ho, patrujo mia,
vi estas nia eterna fiero.
Vi, orienta drakego, strebas
flugi kaj flugi,
kun levita kapo,
al la nova epoko, al brila futuro.

Ĉinio, vi estas emociplena poemo,
kaj viaj historio kaj kulturo

plenplenas je saĝeco kaj forto
vi inspiras nin per bolanta sentimento.

Ĉinio, vi estas pentraĵo vivplena:
cent ŝipoj konkuras sur riveroj,
strebantaj al potenco kaj progreso,
al konstruado en granda bonordo.

Ĉinio, vi estas eterne ŝvebanta kanto,
vi vibrigas nian koron per belaj revoj.
Viaj ritmo kaj tono
al ni donas kuraĝon kaj esperon.

Ĉinio, vi estas brilanta stelo,
vi prilumas nian koron
kaj ĉiun angulon de la mondo.
Viaj lumo kaj forto
neniam malfortiĝus,
gvidante la orientan ŝipegon
fendi ondojn antaŭen.

Mi amas vin, Ĉinio!
ni sentas honoron pri via nomo.
Ni deziras al vi ĉiaman prosperon,
konstantan potencon kun granda gloro.

Ho, patrujo mia, patrino kara,
mi amas vin, Ĉinio!



elĉinigis Yi Shaomin (Ĉinio)

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



La “Ora Jarcento” de Armena Literaturo

aŭtorino, Rita Mkrtĉjan

Dum sia multjarcenta historio, la antikva armena popolo havis multnombrajn venkojn. En la periodo de frua mezepoko, armenoj ekhavis sian unu el la plej gravaj venkoj, venkon en kultura sfero. Kiam armenoj akceptis kristanisman (en 301-a j. de nia erao), ili ankoraŭ ne havis sian skribaĵon. Pro tio, diservoj en preĝeoj kaj temploj pasiĝis en fremdaj lingvoj, kiuj ne estis kompreneblaj por reprezentantoj de armena popolo. Ĉi-tiu problemoj estis solvitaj post cent jaroj. En 405 jaro, la granda armena kleriganto Mesrop Maŝtoc kreis armenan nacian skribaĵon. Li pripensis sistemon de armena skribaĵo kaj alfabeton. Krom tio, Mesrop Maŝtoc skribis ankaŭ aboclibron por komencantoj, tradukis multajn verkojn de famaj antikvaj kaj kristanaj aŭtoroj, kaj ankaŭ tradukis la Biblion armenlingve. Mesrop Maŝtoc havis multajn talentajn lernantojn, kiuj daŭrigis lian aferon kaj skribis eminentajn historiajn verkojn. La plej eminentaj armenaj historiistoj de la kvina jarcento de nia erao estis:

- Agatangeĥos. Li skribis historion de akceptado de kristanismo en Armenio.
- Pavstos Bjuŝandaci. En sia “Historio de Armenio” li rakontis pri la armenaj reĝoj el dinastio de Arŝakuni (pri Arŝak la Dua kaj pri sia filo Pap), kaj ankaŭ pri lukto de armena popolo kontraŭ fremdlandaj okupantoj en kvindekaj-sesdekaj jaroj de la kvara jarcento de nia erao.
- Korjun. Li skribis verkon “Vivo de Maŝtoc”, en kiu rakontis pri sia instruisto.
- Egiŝe. En sia historia verko li skribis pri la Avarajra batalo, kiu okazis en 451 jaro inter armenoj kaj fremdlandaj okupantoj.
- Kazar Parpeci. En sia “Historio de Armenio” li skribis pri eventoj, kiuj okazis en fino de la kvara ĝis komenco de la kvina jarcentoj de nia erao.
- Movses Ĥorenaci. Li estis la plej fama historiisto de Antikva Armenio. En sia “Historio de Armenio” li priskribis ĉiun historion de Antikva Armenio- de komenco ĝis mezo de la kvina jarcento de nia erao. Ofte oni nomiĝas Movses Ĥorenaci kiel

“Patro de Armena historio”.

Dank’ al ĉi-tiuj grandaj armenaj historiistoj kaj kreitaj verkoj, la kvinan jarcenton de nia erao oni nomigas “Ora jarcento de Armena literaturo”.

Verkistoj kaj historiistoj de la “Ora jarcento de Armena literaturo” lasis profundan spuron en historio de sekvantaj generacioj de armenoj. Multe da historiaj eventoj, nuntempaj sciencistoj priskribis uzante la verkojn de ĉi tiuj historiistoj. Per nomoj de famaj historiistoj de kvina jarcento estis nomataj stratoj en Erevan kaj en aliaj urboj de Armenio. Estis konstruitaj monumentoj, dediĉitaj al ĉi tiuj aŭtoroj. Erevana Matenadaran (rezervejo de antikvaj skribaĵoj) havas nomon de Mesrop Maŝtoc. Antaŭ grandioza konstruaĵo de Matenadaran ĉiu vizitanto ekvidos belegajn monumentojn de Mesrop Maŝtoc kaj de liaj lernantoj. En lernejoj kaj institutoj de Armenio oni lernas verkojn de antikvaj armenaj historiistoj. Sur la bazo de iliaj verkoj, kelkaj famaj armenaj verkistoj (Raffi, Stefan Zorjan, Derenik Demirĉjan) verkis siajn senmortajn historiajn romanojn. Nuntempa Armenio gardas sian historian kaj kulturen trezoron en luksaj monumentaj, en belegaj antikvaj konstruaĵoj, en ĉiuj ŝtonoj de armena tero kaj en dankemaj koroj de vivantaj posteuloj!

P.S. Ĉi tiu artikolo estis publikigita en revuo "Hodiaŭa Ĵurnalo", numero 274, 25.08.2017



Puramo W Chong (Suda Koreio)



Sano estas pli valora ol oro

Preskaŭ ĉiuj homoj asertas, ke la sano kaj la mono estas la plej grandaj bonaĵoj de tiu ĉi mondo. Kaj ili eĉ akceptas, ke el ambaŭ la sano pli gravas, ĉar mono sen sano ne valoras.

aŭtoro, Puramo W Chong

Malgraŭ tiu ĝenerale interkonsentita veraĵo, la agoj de la homoj tamen preskaŭ ekskluzive celas la mongajnon. Rekte aŭ nerekte, pere aŭ senpere, monon celas la terkulturisto, kiu plugas la teron; la scienculo, la studento, la industriisto, la komercisto, la artisto, la pastro, la advokato ktp. Kompreneble, ĉar nur per mono oni povas akiri la ĉiutagan panon, pagi la vestaĵojn, la distraĵojn kaj amuzaĵojn kaj eĉ la rimedojn por sin instrui aŭ sin eduki. Tamen ĉiuj unuanime agnoskas, ke la sano pli valoras ol la mono.

Ĉiu homa estulo alvenas al la mondo kun altvalora kapitalo, kiun li mem ne gajnis, sed ricevis por ĝuorajto: tiu kapitalo nomiĝas „sano“. Ĉiu persono estas komisiita administri tiun kapitalon tiel, ke ĝi ne perdiĝu nek malpliĝu; sed kontraŭe, ke ĝi konserviĝu kaj eĉ pligrandiĝu.

Se ni liveras novan aŭtomobilon al iu aŭtisto, la daŭro de la veturilo dependas de la prudento laŭ kiu li ĝin stiros. Se li estas zorgema, ĝi daŭros multajn jarojn ĝis kiam ĝi ne plu funkcios pro natura eluzado. Sed se la stiristo ĝin kondukas al troa rapideco kaj sur netravetureblaj vojoj kaj malatentas la cent detalojn pri ĝia bona funkciado, finfine ĝi ne plu moviĝos aŭ ĝi bruege dispeciĝos en iu ajn kurbiĝo de la vojo. Ekzakte la samo okazas al la homo.

Ĉiu estas la zorganto de sia propra sano. Tiu, kiu ĝin flegas, ĝuas sanan vivon kiu profitigas lin mem kaj liajn kunhomojn dum multaj jaroj ĝis fine la natura morto, tiel malofta hodiaŭ, lin atingas. Tiu, kiu ĝin malflegas, suferas mil afekciojn, malsanojn kaj perturbojn; li estas devigata viziti hospitalojn, klinikojn kaj sanatoriojn almozpetante vane la sanon, kiun li perdis per sia propra kulpo preskaŭ ĉiam, ĝis la morto venas finfine por liberigi lin de liaj suferoj.

Estas hispana proverbo, kiu diras: „Neniu rememoras la pulvotenejon ĝis tondras“. Kiam la kapitalo “sano” minacas perdiĝi, la koncernato kuras afliktege eviti la

katastrofon, sed jam estas preskaŭ ĉiam malfrue.

Ĉiu persono vekigas frumatene kaj hastas al sia laboro, dirante aŭ pensante: „Mi hodiaŭ gajnos monon”.

Kiu leviĝas pensante aŭ dirante: „Mi hodiaŭ gajnos sanon”?

Malpli manĝi, pli maĉi

En mia infaneco mia panjo ĉiam diris al mi plene maĉi manĝaĵojn en ĉiuj manĝoj. Ĉu tio vere necesas? Kiom gravas bone maĉi la manĝaĵon, kaj kion ĝi signifas?

Eble panjo mem ne sciis sciencaĵon bazon pri plena maĉado. Jen estas kialoj:

Plene maĉi ne nur faciligas engluti manĝaĵon, sed ankaŭ alportas diversajn avantaĝojn por nia sano. Maĉi jam estas unua paŝo al digestado. La maĉado ne nur meĥanike dispremas manĝaĵojn, ĝi ankaŭ stimulas produkton de digestaj enzimoj en buŝo. Se vi plene muelas manĝaĵon en la buŝo per plena maĉado kaj enzimoj, tio draste malpli grandigas la laborŝarĝon de digestado en via stomako kaj intesto. Alkutimiĝu do plene maĉi dum ĉiuj manĝoj, por ke ĝi helpu produkti sufiĉe da salivo. Bone maĉi faras manĝaĵon pli bongusta, ĉar per plena maĉado homoj sentas la teksturon de manĝaĵo, kaj fariĝas pli sentema al la gusto de manĝaĵo. Plene maĉi faras nin malrapide manĝi kaj tio fakte malebligas al homoj tromanĝi, kio fine preventas korpan trodikiĝon kaj grasiĝon. Maĉi manĝaĵon pli longe montriĝis en multaj studoj pliigi kontenton kaj saton kaj redukti malsatajn nivelojn. Prenu sufiĉe da tempo por manĝi kaj ĝuu la guston kiam vi maĉas.

La uzado de muskoloj ĉirkaŭ la buŝo per plena maĉado helpas al la disvolviĝo de makzelo, kio igas homojn pli ekzakte prononci vortojn kaj fari la vizaĝon pli esprimplena. Maĉi ankaŭ plibonigas la sangofluon en la cerbon, kio disvolvas la intelekton de infanoj kaj preventas memorperdon de plenaĝuloj.

Homoj havas entute 32 dentojn, el kiuj 8 estas antaŭdentoj, 4 kojnodentoj kaj la ceteraj 20 estas mueldentoj. Kial do homoj havas tiom multe da mueldentoj? La respondo estas, ke Dio, aŭ Naturo, ordonas al ni utiligi tiujn mueldentojn kaj maĉi kaj remaĉi multfoje.

Spirita Streĉo

Ĉiu spertas streĉon dum sia vivo, sed oni nomas la perdon de la vivopartnero la plej granda streĉo. Ekzemple, divorco estas komparebla al la kvara je 76 el la plej alta nombro de streĉo 100. La perdo de laboro estas je 65, sed la morto de edzo aŭ edzino estas la plej granda streĉo, je ĉirkaŭ 92-97.

Kelkajn tagojn antaŭe, mi vizitis funebraĵon pro la morto de la edzino de proksima

amiko. Rigardante la malsanan aspekton de mia amiko, kiu perdis pli ol 10 kilogramojn pro la zorgado pri sia edzino, mi sentis profundan doloron.

Eble oni pensus, ke estus pli facile perdi edzinon en sia sepdek jaraĝo. Sed se estus tiel, kial do la perdo de vivopartnero estas la plej granda streĉo en la vivo? Mi mem foje pripensis, kio okazus se mia edzino forirus pro malsano antaŭ mi. Ĉiufoje, mi venis al la konkludo, ke tio estus timiga, soleca, kaj malhelpus min trovi vivvolon. Se geedzoj amis unu la alian dum la vivo, la doloro de disiĝo kaj perdo estus multe pli akra. Dum kunvenoj kun amikoj, la edzino de mia amiko fojfoje telefonis kaj demandis lin, ĉu li bone alvenis, je kia horo li revenos, kaj simile. Mia amiko ĉiam respondis kun respekto, kaj tiuj ĝentilaĵoj surprizis nin ĉiujn.

Mi proponis al miaj amikoj, ke ni kunsidu post la funebra ceremonio por konsoli lin, sed unu el ili, kiu jam spertis la perdon de sia edzino, rifuzis. Li diris, ke ni lasu lin en sia malĝojo dum iom da tempo, ĉar en tiu situacio ne helpas konsolo, eĉ de familio aŭ de amikoj.

Iu amiko informis min, ke eĉ post la ceremonio, li ĉiutage iras viziti sian edzinon kaj ploras. Mi esperas, ke li ne tro profunde mergiĝas en la doloro kaj malĝojo, kaj ke lia koro baldaŭ resaniĝos.

Ĉu homoj povas eviti la maljuniĝon?

Aperis moderna versio de Imperiestro Qin Shi Huang, kiu sonĝas pri senmorteco. Li estas Brian Johnson, usona 45 jaraĝa miliardulo, kiu elspezas 2 milionojn da dolaroj jare por retroenigi sian biologian aĝon al 18 jaraĝo. Lia taga rutino inkluzivas vekigon je 5 matene, konsumi 1977-kalorian vegetaranan nutraĵon prilaboritan por li de 30 medicinaj fakuloj, ekzerciĝi dum unu horo ĉiutage, preni pli ol 24 suplementojn kaj sanajn produktojn, apliki sep diversajn nutrajn kremojn sur lia haŭto ktp.

Lia korpa grasokvanto estas aktuale inter 5-6%, lia kor-aĝo estas 37, lia haŭtaĝo estas 28, lia pulma kapacito kaj kondiĉo estas je nivelo de 18-jaraĝulo. Li asertas havi atingita "renversan aĝigadon" de 5.1 jaroj kompare al lia vera aĝo kaj sukcese malrapidigis la maljuniĝadprocezon je 24%.

Kvankam homoj timas la maljunigan procezon kaj la senhelpan staton de maljuneco kaj malsano, la maljuniĝado estas akceptita kiel neevitebla procezo kaj genetika mekanismo, tra kiu organismoj devas iri, malgraŭ la deziro de homoj eviti ĝin.

Kelkaj tamen rigardas maljuniĝadon kiel malsanon anstataŭ natura procezo kaj argumentas, ke oni povas prokrasti, haltigi aŭ eĉ inversi per traktado. Harvard-

genetikisto David Sinclair estas eminenta advokato de tiu vidpunkto, kiu asertas en sia libro "The End of Aging", ke "maljuniĝado estas malsano kaj povas esti traktata per vivstilaj plibonigoj kaj kontraŭmaljunigaj medikamentoj."

Maljuniĝado kaj morto ankoraŭ estas rigarditaj kiel naturaj procezoj en la plejparto de la scienca komunumo. Tamen, estas eble prokrasti maljuniĝadon kaj konservi vigecon per ĝusta nutrado, ekzercado kaj plibonigoj de vivstilo.

Obei la leĝon de naturo estas la vojo al sano

Preskaŭ ĉiuj civilizitaj homoj estas malsanaj ĉar ili ne obeas la naturajn leĝojn, kiuj postulas sanan kaj virtan vivon. Modernaj homoj apartiĝas pli kaj pli de naturo kaj tiu ĉi punas ilin per malsano. Por forigi la malsanon, do, oni devas reveni al saĝaj reguloj de la naturo. Estas scienco kiu resumas tiujn ĉi regulojn: ĝi nomiĝas naturismo. Naturismo ne estas ekskluzive kuracista procedo aŭ indikaro pri manĝaĵoj. Ĝi estas multe pli, ĉar ĝi estas sistemo de la vivo. Homoj devas konvinkiĝi, ke la sano estas rekompenco pro sana kaj virta vivo. Estas neeble, do, aĉeti la sanon ĉe la farmaciisto aŭ en la hospitaloj. Drogaj ne povas resanigi malsanulon kaj operacioj kirurgiaj ne faros el malsana organo alian sanan. Sendube por personoj kiuj ne bone komprenas tiun ĉi gravan kaj samtempe simplan aferon estas multe pli facile engluti drogon, kiu forigos momente la doloron.

Naturismo studas la homon sub la tri aspektoj: fizika, mensa kaj morala. Vera sano ne povas ekzisti se ne estas harmonio inter tiuj tri elementoj. Ĉiutage oni inaŭguras novajn hospitalojn, frenezulejojn kaj resanigejojn; sed la nombro de malsanuloj ne nur ne malkreskas sed kontraŭe, ĝi terure kreskas. Oni ne solvos la problemon de la publika sano per la kreado de novaj hospitaloj tiel same kiel oni ne solvos la problemon de la krimo per la kreado de novaj malliberejoj.

Sano kaj virto estas sinonimoj. Kiu ne akceptas tiun simplan principon ne povos eviti, frue aŭ malfrue, tristan rezulton.

